NYPL RESEARCH LIBRARIES
3 3433 08990477 9

Digitized by Google

Original from
NEW YORK PUBLIC LIBRARY

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from
NEW YORK PUBLIC LIBRARY

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from
NEW YORK PUBLIC LIBRARY

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from
NEW YORK PUBLIC LIBRARY

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from
NEW YORK PUBLIC LIBRARY

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Digitized by Google

Original from
NEW YORK PUBLIC LIBRARY

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from
NEW YORK PUBLIC LIBRARY

FUNDAMENTOJ DE LA KVAKERISMO

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from
NEW YORK PUBLIC LIBRARY

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from
NEW YORK PUBLIC LIBRARY

FUNDAMENTOJ DE LA KVAKERISMO

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from
NEW YORK PUBLIC LIBRARY

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from
NEW YORK PUBLIC LIBRARY

E. melia

CAROLINE STEPHEN

FUNDAMENTOJ DE LA KVAKERISMO

ESPERANTIGITA DE

MONTAGU C. BUTLER

EL LA KVARA ELDONO DE LA ANGLA ORIGINALO

PRICE: 1s. 9d. PREZO: Sm. 0·875.

POR LA TRADUKINTO ELDONIS

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION
(INCORPORATED)
LONDONO: 17, HART STREET, W.C.
1916

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

THE NEW YORK
PUBLIC LIBRARY
ASTOR, LENOX AND
TILDEN FOUNDATIONS
R L

Presita de
Garden City Press Limited
Letchworth, Herts, Anglujo

[*Ĉiu rajto de preso aŭ reprodukto en ĉiu lingvo krom Esperanto apartenas al John Bellows, Gloucester.*]

Digitized by Google
Original from
NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

ENHAVO

PAĜO

ANTAŬPAROLO DE LA TRADUKINTO - - - - vii

VORTARA NOTO - - - - - - - - - xvii

ENKONDUKO - - - - - - - - - - 1

ĈAPITRO I

ORGANIZO - - - - - - - - - - - 5

La Libro de Disciplino—Kunvenoj Apartaj, Monataj, Kvaronjaraj, kaj Jaraj—Interna organizo—Pliaĝuloj—Kontrolantoj—Ministroj—Vojaĝado de Ministroj—Doktrinoj.

ĈAPITRO II

LA INTERNA LUMO - - - - - - - - - 15

La fundamenta kredo de la Societo—Kio estas la "Interna Lumo"?—La fruaj Amikoj—La vorto "interna"—Inspiro—Kvakerismo kaj mistikismo—Konscienco—Dia gvido—Kiel ĝin koni—Ĝia naturo kaj kampo—Persona sperto kaj ĝia gravo por aliaj.

ĈAPITRO III

ADORO - - - - - - - - - - - - 36

Difino—Efikoj de silento—Kia silento—Silento kaj inspiro—"Movata de la Spirito"—Individua respondeco—Vera signifo de kunveno "bazita sur silento"—Adoro familia kaj privata—La ideo ke preĝo estas neracia fontas el neinda koncepto pri ĝi—Malfacilaĵoj—Petoj rifuzitaj—Ĉu Dio aŭskultas?—Respondoj al preĝo—Persona sperto—Ĉu citi ĝin publike?—Rilato inter peto kaj respondo.

Digitized by Google

Original from
NEW YORK PUBLIC LIBRARY

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

ĈAPITRO IV

LIBERA MINISTRADO - - - - - - - - 63

"Libera": ĝenerala, nearanĝita, senpaga—Ĝia sufiĉeco—Amikoj kaj aliaj Kristanoj—Malfacilaĵoj pri la ordinancoj—La Sankta Manĝo—Bapto—Aparta pastraro—Malfacilaĵoj—Arbo juĝebla per la frukto—Respondeco individua—Difino de Ministrado.

ĈAPITRO V

APARTAJ ATESTOJ - - - - - - - - - 82

Ilia origino—Danĝeroj—Profitoj—Ilia naturo—Militado—Superfluaĵoj—Simpleco kaj asketismo—Vestaĵo—Simpla parolo—Juroj—Dekonaĵoj—Festoj—Funebrado—La celo.

ĈAPITRO VI

NIA MISIO - - - - - - - - - - - 109

Kial nia aparteco?—Sinteno al aliaj Kristanoj—Historia skizo—Modernaj tendencoj—Agado kaj kvietismo—La kvakera atesto ankoraŭ bezonata—Interna kaj ekstera—Rilato inter mistikismo kaj kvietismo—La kvakera idealo—La profitoj de nia libereco—Nia devo al aliaj.

ALDONO A

ANTAŬPAROLO AL LA DUA ELDONO - - - - 139

ALDONO B

ANTAŬPAROLO AL LA KVARA ELDONO - - - 146

ALDONOJ C, D

ĜENERALAJ KONSILOJ KAJ DEMANDOJ, ELDONITAJ DE LONDONA JARA KUNVENO - - - - 148, 151

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

ANTAŬPAROLO

DE LA TRADUKINTO

Meze de la 17a jarcento aperis en Anglujo Kristanaro, kies anoj sin nomis "Amikoj al vero," kaj poste "La Religia Societo de Amikoj." La nomon "Amikoj" (*Friends*) ili uzas inter si ankoraŭ nun, sed la ekstera publiko ordinare nomas ilin "Kvakeroj" (*Quakers*), kiu estis komence moknomo kun signifo "tremistoj," kaj originis el tio, ke Fox (la Patro de la Societo) admonis persekutantan juĝiston ke li "tremu je la vorto de la Sinjoro."

En ĉi tiu libreto la aŭtoro traktas kelkajn doktrinojn —"fortikaĵojn"—de la kvakera kredo. Malgraŭ lingvaĵo iafoje tre mistika, kaj la natura malfacileco de la temo, la libro havas ĉarmon propran, kiun oni sentas des pli forte, ju pli atente oni legas. Oni trovas en ĝi ne tiom polemikan argumentadon aŭ metodan rezonadon, kiom provón komuniki la helpon de persona vivanta sento kaj sperto. La aŭtoro ne timas konfesi malfacilaĵojn, aŭ ilin fronti. Ŝi verkas kun modereco kaj singardemo, kaj pro timo fari aserton tro fortan, emas prezenti aferon malpli forte, ol ŝi eble povus. Oni rimarku, ekzemple, la karakterizan uzon de esprimoj kiaj "ŝajnas al mi, ke

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

estas" anstataŭ "estas." Mi provis konservi la stilon de la originalo; tamen, mi kelkafoje permesis al mi por klareco dividi unu frazon en kelkajn malpli longajn.

La sekvantan skizon pri la Societo mi ĉerpis el *La Londona Rondiranto*. La verkinto ne estis Amiko, sed liaj vortoj kredeble ne estas malpli interesaj pro tio, ke li priskribas ĝin de ekstere.

"La Religia Societo de Amikoj" fondiĝis meze de la 17a jarcento, rezulte grandaparte el la predikado de George Fox (pr. Ĝorĝ Foks) kaj aliaj, kiuj protestis kontraŭ la formalismo kiu tiam minacis sufoki la religian vivon de Anglujo. Ĝi ne estas multnombra, sed ĝi ĉiam havis influon tute senproporcian al sia grando, kaj ĝiaj idealoj kaj kredoj nun disvastiĝis en multajn direktojn tute ekster ĝiaj limoj. Interese estas rimarki, ke kvankam en antaŭaj tempoj la cetera religia mondo opiniis la Amikojn pestaj herezuloj, ĝi nun ĝenerale respektas kaj amikas ilin kiel personojn, kiuj (malgraŭ kelkaj strangaĵoj) ofte estas el plej bonaj Kristanoj. Inter nomoj de konataj anoj de la Societo, tiuj de William Penn la fondinto de Pensilvanio, John Bright la oratoro, John Greenleaf Whittier la poeto, Robert Barclay la teologo, John Woolman kaj Elizabeth Fry la reformistoj, kaj aliaj, tuj venas en la kapon.

"La laboroj kaj la influo de la Societo rilate la forigon de la sklavkomerco, kaj la movadojn por paco kaj arbitracio, edukado, abstinenco, kaj aliaj reformoj, estis grandegaj. La giganta movado *Adult School* estis fondita de Amikoj.

"La doktrinojn de la Societo mi ne celas trakti ĉi tie. Eble la plej konataj al eksteruloj estas, ke ĉia militado kaj ĵurado estas kontraŭ la Kristinstruo. Oni scias,

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

ankaŭ, ke la Amikoj ne solenas sakramentojn (laŭ la ordinara kompreno de la termino).

"La Kvakerismo estas grandaparte protesto kontraŭ la ideo, ke la spirita vivo estas afero de formuloj kaj ceremonioj. En siaj religiaj kunvenoj Amikoj celas antaŭ ĉio adori Dion 'laŭ spirito kaj vero.' Opiniante, do, ke ritoj, simboloj, kaj eksteraj objektoj, malgraŭ plej bona intenco, tendencas distri la pensojn for de interna meditado kaj aferoj spiritaj, la Amikoj lasas ilin flanke kiel malhelpaĵojn. Ju pli da eksteraj distroj, des malpli facile oni fiksas la atenton internen.

"Pro tio, vizitanto al Amika kunveno iom mire trovas sin en ĉambro skrupule pura kaj neta, sed sen kolora vitro, skulptaĵo, aŭ alia ornamaĵo. Ĉie regas plena simpleco. Nenia sonorilo vokas al ĉeesto, aŭ funebras morton. Estas uzata nek orgeno, nek incenso, nek libro preĝa aŭ himna, nek ceremonio, formularo, aŭ ordo de diservo. Oni ne faras 'monkolekton,' krom en specialaj okazoj tre maloftaj.

"La unuafoja vizitanto al la kunveno eble sin demandos: 'Kiam la diservo komenciĝos?' Sed por ĉiu, la diservo devus komenciĝi kiam li sidiĝas. Povas okazi, ke eĉ tuta horo pasas en kvieta meditado; sed plej ofte la silenton rompas de tempo al tempo laŭdo, preĝo, lego de Biblia ĉapitro, aŭ vortoj de klarigo, admono, aŭ helpo. Ĉiu en la ĉambro (viro aŭ virino) egale rajtas kaj devus paroli, se li sentas vokon tion fari; kaj silenti, se ne. Sed ekzistas nenia programo aŭ antaŭa aranĝo, kaj troviĝas nenia pastro aŭ alia isto por estri la procedojn; oni deziras, ke la sola kunvenestro estu Kristo, ĉeestanta kvankam nevidebla.

"La Amikoj ordinare ne vestas sin nigre, nek uzas

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

plumfaskojn, nigrorandan leterpaperon, aŭ similajn senutilaĵojn, por montri funebron. En la tombejo, ĉiuj tomboj estas egalaj laŭ grandeco kaj simpleco; la ŝtonoj estas senornamaj, kaj surhavas nur nomon kaj daton sen vortoj laŭdaj. Ekz., *Daniel Jones, 74-jara, mortis 14an tagon de 5a mo.*, 1875. Sammaniere, en ĉiu kunveno, aŭ religia aŭ afera, oni faras nenian distingon inter riĉa kaj malriĉa, alta kaj malalta, viro kaj virino; antaŭ Dio tiaj diferencoj neniom valoras.

"Edziĝoj estas egale simplaj kaj senparadaj. Sed malgraŭ la preskaŭa foresto de rito aŭ ceremonio, krom la leĝe necesa subskribo de atestoj, edziĝo Amika estas afero tre solena, kaj zorgege antaŭkontrolita. Inter Amikoj nur tre malofte okazis eksedziĝo.

"La Amiko rifuzas ĵuri, aŭ konsenti, ke estas du specoj de verparolo: unu por la ĉiutaga vivo, kaj alia (pli vere vera) por la juĝejo. Laŭ li, la jeso de Kristano devas esti jes, kaj la neo ne. Lia penado ke ĉiu vorto estu severe vera, igas lin malrapida esprimi opinion. Elektante siajn vortojn pripense kaj singarde, li inklinas paroli maltro forte prefere ol tro.

"Ĉi tiu zorgego ekzameni siajn vortojn, diri nenion nekonvenan por Kristano, kaj ĉe parolo pri religiaj aferoj uzi prefere la vortojn de la Skribo, kondukis la fruajn Amikojn al parolmaniero iom aparta. Ekzemple: 'Unua Tago,' 'Dua Tago' (k.s.), 'de Sepa Monato'; (pro konscienca nevolo honori la sunon, lunon, mortintan militiston, aŭ falsajn diojn *Thor*, *Woden*, k.c.); kaj la uzo de 'ci' anstataŭ 'vi' kiam la alparolato estas nur unu persono. Multaj vortoj kaj esprimoj kiaj *a convincement, an opening, to have a stop in one's mind, to have a concern, left well alone, Yearly Meeting, Meeting-house,*

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

private retirement, transdonite de generacio al generacio, formas preskaŭ apartan idiomon kvakeran. La skrupula peno eviti ĉion, kio povus konduki al tento, rezultis en ekstrema simpleco de vivado. La tradicia kvakera kostumo devenas de tio, ke la fruaj Amikoj konservis simplan tiaman vestmanieron, ne atentante aŭ sekvante la ŝanĝiĝojn de la modo. Same pri la kutimo stari ĉe publika preĝo. Ili havis skrupulojn pri uzo de nenecesa ornamo, kaj de ĉiu senutila kaj parada luksaĵo. Ili suspekte rigardis la dancadon, la teatron, la muzikon, kaj diversajn aliajn artojn kaj sportojn, kiel distraĵojn nekonvenaj por Kristano, ĉar se ne pekaj en si mem, danĝeraj pro tendenco kaj asociaĵoj. Ili hezitis aranĝi kunkantadon de himnoj, timante, ke tiel oni riskus paroli aŭ paroligi vortojn, kiujn la koro ne vere sentas. Ili ne demetis la ĉapelon antaŭ alia homo, eĉ reĝo; kaj ili uzis neniajn moŝtajn titolojn, nomante sin simple William Penn, Elizabeth Fry.

" Kelkajn el la suprenomitaj apartaĵoj kaj kutimoj la Amikoj nun ĝenerale forlasis kiel ne plu necesajn aŭ signifajn. Sed ankoraŭ restas la spirito naskinta ilin; ke, ne kondamnante aliajn, kiuj ne havas samajn skrupulojn, oni kun humileco celu mem havi 'purajn manojn,' kaj evitu ĉion eble duban.

" Kiajn efikojn havas tia simpla vivado sur la personan karakteron kaj temperamenton? Mi observas, ke Amiko emas esti kvieta kaj antaŭpripensema; nerapida formi opinion, aŭ ĝin ŝanĝi; sendependa de aliaj rilate kredon; severe honesta en la ĉiutagaj aferoj kaj la komerco; neflata, nekaŝema, kaj sincera. La rimarkinda longviveco de Amikoj sendube rezultas el ilia senekscita kaj regula vivmaniero.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

"Pro tio, ke ili ne subtenas multekostajn preĝejojn, orgenojn, pastraron, ĥoron, kaj similajn instituciojn (kiel devas anoj de aliaj eklezioj), la Amikoj havas pli da mono elspezebla je aliaj aferoj eble pli utilaj. Ilia malavareco pri ĉiuspecaj filantropiaĵoj estas preskaŭ proverba. Ili aparte zorgas, ke malricaj anoj ne troviĝu sen la necesaĵoj de la vivo.

"Ili estas plej altgrade toleremaj por la religiaj kredoj de aliaj. Manko de spaco malpermesas, ke mi priskribu ĉi tie la internan organizon de la Societo. Sed sendube, eĉ en la nuna tempo, oni malfacile trovus sistemon de regado pli demokratan, ol ĉi tiu, antaŭ 250 jaroj ellaborita.

"Kiaj estas la malfortaĵoj de la Societo? Ĝi faras preskaŭ nenion por sin reklami. (Kvankam mi tre ofte ĉeestis kunvenojn, neniu provis min varbi al la Societo, aŭ konvinki pri ĝiaj kredoj.) Ĝi ne tiom altiras la mondon eksteran kaj nekredantojn, kiom nutras kaj fortigas kredantojn. Estas demandeble, ĉu la severa Amika kunveno konvenas egale al la bezonoj de *ĉiu* temperamento. Ĝi logas individuojn pli ol la amason. Ŝajne ekzistas nesufiĉe da sistema penado konservi en la Societo la infanojn, kaj instrui ilin pri Amikaj kredoj; sekve junaj anoj facile kaptiĝas de la superaj eksteraj logoj de aliaj ekleziaj. Oni ja povas demandi, ĉu la prava penado ne perforti la kredon de aliaj, ne iafoje iras troen, kaj rezultas en deteno de gvida konsilo rajte atendebla.

"Antaŭ jarcento, la Societo estis en danĝero vivi tro multe por si mem, esti tro ekskluziva, kaj, zorgante pri tradicioj kaj la litero de la leĝo, forgesi ĝian spiriton. Sed tiu danĝero nun grandaparte forpasis. La Societo mem

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

estas multe pli vigla kaj unuigita ol antaŭe, ĝi daŭre kreskas, kaj ĉie sentiĝas revekiĝo, aparte ĉe la generacio juna."

• • • • •

Caroline Emelia Stephen, filino de Sir James Stephen, K.C.B., kaj fratino de Leslie Stephen, naskiĝis en 1835 ĉe Kensington Gore, kaj de infaneco edukiĝis ano de la anglikana eklezio. Unue kontaktinte kun Amika kunveno je ĉ. 1872, ŝi aniĝis la Societon, kaj poste enskribiĝis kiel ministro. En la pli fruaj tagoj de aneco en la Societo, ŝi okazigis kunvenojn ĉe sia domo en Chelsea. La lastaj dekdu jaroj de ŝia vivo pasis ĉe The Porch, Newnham, Cambridge. Ŝi mortis Aprilo 7an, 1909, post mallonga sed dolorega malsano, je aĝo 74, kaj estis cindrigita ĉe Golders Green, kaj enterigita ĉe Winchmore Hill. Pri la doloro ŝi diris: "Ĝi daŭros kiom longe mi ĝin bezonos, kaj tiam mi iros hejmen." El ŝiaj verkoj, la nuna (unue eldonita en Majo, 1890) kredeble estas la plej konata. Pri ĝi oni skribis post ŝia morto: "Kvankam ŝi ĉiam havis antipation al ĉio sinreklameca, por la bono de aliaj ŝi faris ĝin ĝis iu grado spirita aŭtobiografio."

La jenaj eltiraĵoj el ŝia recenzo pri la "Biografio de Caroline Fox" (1882) havas apartan intereson pro la aludo al la kunveno priskribita sur paĝo 3 de la nuna volumo.

"Mia propra sperto ĉe Penjerick komenciĝis nur la jaron post ŝia morto . . . Sed la medio ĉe tiu domanaro ankoraŭ estis io unika. Neniam mi forgesos la impreson kiun ĝi faris sur min—impreson sendube pli vivan kaj daŭran pro tio, ke tiam por la unua fojo, almenaŭ de post la frua infaneco, mi kontaktis kun vera kvakera hejmo. Ĝi venis al mi je tempo kiam la premo de liturgiaj formoj

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

kaj ekleziaj ordinancoj jam iĝis preskaŭ netolerebla por mia animo, tiam perpleksegata pri temoj la plej profundaj, kaj turmentata de la ŝajna neeblo scii la veron, kaj de la malfacilo trovi komunan adoron kiun mi povus partopreni sen risko de nesincereco.

"De Penjerick mi iris al Falmouth'a Kunveno—la unua Amika kunveno kiun mi iam ĉeestis—kunveno malgranda, kiu okazis en silento preskaŭ nerompita, sed silento kiu helpis min pli ol ajnaj vortoj. Lasante la kunvenon, mi rigardis la radiantajn vizaĝojn de miaj nove trovitaj amikoj, kaj sentis: 'Ja povas brili vizaĝoj ties, kies tuta vivo pasis en tia libereco, en la ĝuo de tia dimanĉa trankvilo.' . . .

"Ne eĉ momente mi volus pensigi, ke nur ĉe la Kvakerismo estas trovebla tiu nekatenita spirita vivo [de kvakera hejmo], kvankam mi estas certa, ke la spirito de la Kvakerismo estas tre favora al ĝi. Mi scias, ke ekzistas personoj, kiuj povas uzi formojn kaj ordinancojn ne sklaviĝante al ili. . . . Sed se ĉiuj Kristanoj ankoraŭ sin kroĉus al tiuj eksteraj aferoj, estus eĉ pli malfacile ol nun malimpliki la puran Kristanismon de tio, kio surkreskis ĝin. . . .

"Estas bone konate, kun kia rimarkinda libereco kaj simpleco la Amikoj ofte renkontas Kristanojn tre malsamkredajn, sur la komuna tero fideleco al la unu Sinjoro; kaj ankaŭ, kiom ofte la Kristanismo, kiel vivata kaj prezentata de Amikoj, ricevis de nekredantoj ateston de escepta respekto kaj admiro. La kialo de ĉi tiu estimo ŝajnas esti, ke la Kvakerismo estas sincera provo distingi inter la esenco de la Kristana religio kaj ĝiaj akcidentoj, kaj doni al la pli pezaj aferoj la relativan gravon kiun ili havis por ĝia Fondinto. . . . Oni facile komprenos, ke la

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

foresto de ĉia pastraro kaj de eksteraj ordinancoj evitigas al la Amikoj kelkajn malfacilaĵojn polemikajn. La Societo estas vivanta pruvo, ke la spirito de Kristo estas dependa de nenio tia."

* * * * *

Mi kore dankas al Edward A. Millidge pro multaj korektoj kaj proponoj; al John A. Gill, Frederic W. Hipsley, kaj Alexander E. Lee pro kritika tralego de parto aŭ la tuto de la manuskripto, kaj al Elizabeth O'Brien kaj Gertrude C. Sentance pro lego de la presprovaĵo. Pri difektoj de la traduko mi sole estas responda, kiel ankaŭ pri ĉi tiu Antaŭparolo. La Aldonoj al la nuna volumo anstataŭas tiujn de la angla originalo.

La elspezojn de ĉi tiu eldono malavare pagis iu, kiu deziras resti anonima; mi uzas la okazon voĉi al tiu la dankojn de la esperantista mondo.

Deka Monato, 1915. M. C. B.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from
NEW YORK PUBLIC LIBRARY

VORTARA NOTO

La teknikaj terminoj *Minister*, *Elder*, *Overseer* estas tradukitaj per **Ministro, Pliaĝulo, Kontrolanto.** Klarigo troviĝas en la teksto. *Diakono*, *episkopo*, kvankam ĝustaj, preskaŭ certe miskompreniĝus de la ordinara leganto.

La vorton **komunio** mi uzis en sia devena, neteknika, nesakramenta senco, por traduki *communion* (*with God*, k.s.), kun signifo "dolĉa intima interrilatado (interkomunikiĝado, komunsento, kunuleco, pensinterŝanĝado)," neniu el kiuj terminoj tre konvenas.

La radiko **koncern** (kiel la angla *concern*) en kvakera buŝo uziĝas iafoje kun iom aparta kvazaŭteknika senco; "oni estas bone koncernita, sentas koncernon, rilate ion" (t.e., oni agas sub sento pri misio aŭ voko deviga).

La sola vorto kiun mi elpensis estas **ordinanco,** kiu ŝajnis necesa en ĉi tiu verko por traduki la anglan *ordinance*, sed kiun mi tamen *ne* deziras vidi enkondukita en Esperanton. La vorto signifas iom malprecize "preskribita rito aŭ ceremonio, speciale sakramento."

La jenaj vortoj, kvankam ankoraŭ ne en la plimulto de vortaroj, jam estas ofte uzitaj de diversaj aŭtoroj:

Kazo (medicina, matematika, k.s.), *case*, *cas*, *Sache* (kp.

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

"okazo," *occasion*, *occurrence*, *event*, *événement*, *Fall*, *Vorfall*). **Mesaĝo**=Sendito-diro, parolsendaĵo, sciigitaĵo, *message*, *Botschaft*. **Perpleksi**=mense konfuzi aŭ embarasi, malcertigi, *to perplex*, *rendre perplexe*, *verwirren*, *bestürzt machen*. **Riveli** (figura uzo de la fotografa termino)=malkaŝi, *to reveal*, *révéler*, *offenbaren*

La subajn jam longe proponitajn afiksojn mi uzis, ĉar mi trovas ilin bonaj kaj ne kontraŭfundamentaj; tamen, mi tute ne celas trudi ilin al aliaj.

Mis- (prefikso, angle *mis-*)=erare, malĝuste.

-End (sufikso el la latina)=kiu devas aŭ devus esti -ita. Ekz., Lat. "*Delenda* (detruenda) *est Carthage*" (Carthage must be, or is to be, destroyed). "Kotizaĵoj estas nun pa*gendaj*" (subscriptions are now payable). "Pag*otaj*," kiu profetas tion, kio okazos en la estonteco, kaj "pag*eblaj*," kiu rilatas eblecon de pago, esprimas ideojn tre malsamajn; "*devas esti pagitaj*" estas iom longa.

M. C. B.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

FUNDAMENTOJ DE LA KVAKERISMO

ENKONDUKO

Ĉu (kiel kredas kelkaj Amikoj) la Kvakerismo destiniĝis al rimarkinda kresko, aŭ ne; ŝajnas almenaŭ certe, ke ĉia grava reviviĝo religia rezultos nur el freŝa rekono kaj akcepto al la principoj sur kiuj la Societo de Amikoj fondiĝis. Kio efektive estas tiuj principoj, kaj la rezultantaj kutimoj, estas temo pri kiu oni trovas kvanton da nescio mirigan pro tio, ke aliaj Kristanoj multe rilatas al kaj interesiĝas pri Amikoj. Preskaŭ ĉiu havas ian rilaton kun la Societo, tamen malofte oni renkontas neanon, kiu posedas scion iom ĝustan pri ĝia vidpunkto aŭ ĝia organizo.

La konata malinklino de Amikoj al prozelitismo kredeble klarigas la ĝeneralan impreson, ke kvakera kunveno estas esence privata—kunsido mistera, en kiun estus trude deziri enlason. Multaj kredeble eĉ supozas (se iam ili pensas pri la afero) ke tiaj kunvenoj ne plu okazas; ke la Societo rapide formortas, kaj ke la tradicia "silenta diservo" estas afero pasinta—nepraktika, kaj apenaŭ inda seriozan pripenson en la nuna epoko babilema kaj senspire agema.

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

Nebula impreso tia kredeble ŝvebis en mia menso, kiam, en 1872, mi unuafoje trovis min oportune proksima de kvakera kunveno, kaj, je mia surprizo, ricevis koran bonvenon. La invito venis en tempo de bezono, ĉar mi jam komencis senti kun konsterno, ke mi eble ne multe plu povos konscience partopreni la Anglikanan Ordon de Diservo; ne pro tio, ke mi ne plu ŝatis ĝian senrivalan riĉecon kaj belecon, sed pro duboj pri ĝia doktrina vereco; kaj plue mi pli kaj pli sentis, ke ĝia ellaboriteco, kaj la konstanta intenso de religia fervoro, kiun la ellaboriteco celis parolprovizi, estas por mi la tro peza kiraso de Saŭlo. Ĝi estu vera aŭ ne en siaj spekulativaj kaj teoriaj premisoj; mi klare konsciis, ke ĝi estas tre nevera, kiel esprimo de mia sperto, kredo, aŭ aspiro. Ju pli vive oni sentas la forton de ĝia elokvento, des pli, ŝajnas al mi, oni devas heziti ĝin alpreni kiel lingvon de la propra animo, kaj des pli dube estas, ke la altoj kaj profundoj de sento, kiujn ĝi postulas, estos pretaj plenigi ĝiajn grandiozajn fluujojn ĉiudimanĉmatene je difinita horo. La ekdubojn kontraŭ kiuj mi tiam pene baraktis duoble fortigis la oftegaj dogmaj asertoj kaj supozoj de la Liturgio, kaj ĝia senrompa fluo lasis al mi nenian okazon eligi la proprajn, malpli poluritajn, sed por mi pli urĝajn, kriojn por helpo. Tiel la horo diserva, anstataŭ esti tempo de spirita fortigo kaj trankviligo, iĝis por mi tempo de denova konflikto, kaj de okaza ekzalteco kaj emocia ekscitiĝo nepre sekvotaj de reakcio kaj apatio.

Mi ne provos prijuĝi ĉi tiun spiritan staton. Mi priskribis ĝin iom plene, ĉar mi ne povas kredi ĝin tute escepta, aŭ sen signifo. Ĉiaokaze, mi komencis antaŭtimi

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

momenton kiam en nenia diservejo inter miaj kunkristanoj mi povos trovi la bezonatan helpon, kaj prezenti mian tributon de adoro. Kiam jen! unu neniamforgesotan dimanĉmatenon, mi trovis min unu el malgranda aro de silentaj adorantoj, kiuj estis kontentaj sidi kune sen vortoj, ke ĉiu povu sentesplori kaj proksimiĝi al la Dia Alesto, ne malhelpate almenaŭ, se ne helpate, de homa parolo. Parolon mi sciis libera, se vortoj doniĝus; kaj antaŭ la fino de la kunveno, unu-du frazojn tre simple parolis maljuna kaj ŝajne neklera viro, stariĝinte en sia loko inter ni. Liajn vortojn mi ne multe atentis, kaj mi havas nenian memoron pri ilia signifo. Mia tuta animo pleniĝis per la nedirebla paco de neĝenata okazo por interkomunikiĝo kun Dio—per la sento, ke fine mi trovis lokon kie mi povos, sen plej eta nuanco da nesincereco, akompani aliajn en serĉo al lia kunesto. La sidado en silento povus ligi min neniel; aliflanke, ĝi povus malfermi al mi (kiel tiumatene) eĉ la pordon de la ĉielo. Kaj de tiu tago, la kvakera kunveno efektive estis por mi la plej granda ekstera helpilo al ĉiam pli plena eniro en la spiriton kiu naskis ĝin; la ejo de la plej animonvenka, fidonredona, fortiga kaj paca komunio, per manĝo de la pano de vivo, kiun mi iam konis. Mi ne povas kredi alie, ol ke tio, kio tiel nedireble helpis min, povus esti helpa al tre multaj en la nuna epoko de skuado al ĉio skuebla, kaj de malserena serĉado al spirita bono. Kun la espero, do, pli vasten sciigi la veran fonton kaj naturon de tiu anima helpo, mi nun provos priskribi kion mi nomis niaj fundamentoj—tiun principaron, kiu restos firma, kia ajn la estonteco de la Societo pli ol ducent jarojn bazita sur ĝi. Mi deziras skizi, kiom povigas min mia sperto kiel Amiko pro konvinkiĝo, kie kuŝas la vivo

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

kaj forto de nia Societo; kaj kiamaniere ĝiaj principoj, kiel efektivigitaj en ĝia praktiko, ĝia organizo, kaj (super ĉio) en ĝia diservmaniero, kapablas satigi la apartajn bezonojn de granda klaso en la nuna tempo.

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

ĈAPITRO I

ORGANIZO

La organizo de la Societo de Amikoj estas, mi kredas, ne tre konata ekster ĝiaj limoj, kaj skizeto eble estos interesa, kaj prepare oportuna por klarigo pri nia sinteno ĝenerale. Mi do proponas liveri skizeton pri nia konstitucio kiel Societo, kiom mi ĝin konas. Plenaj detaloj estas troveblaj en la *Book of Discipline*, kiu estas la aŭtoritata klariganto pri ĉio tia.

Ĉi tiu libro estas freŝdate reviziita, kaj la eldono de 1906-1911* (en du oktavaj volumoj) enhavas la plej lastajn regulojn pri ĉia detalo de interna organizo. Ĉiujare la Jara Kunveno ankaŭ eldonas volumon en kiu troviĝas citaĵoj el ĝiaj protokoloj, plena raporto konta kaj statistika, kaj resumo de la raportoj ricevitaj el subaj kunvenoj tra la tuta lando.

Ĉiu "aparta kunveno"—tio estas, ĉiu aro kiu kunvenas por diservo je la unua (ordinare ankaŭ je iu alia) tago de la semajno—estas unu el grupo de kunvenoj por diservo

* "Kristana Disciplino de la Religia Societo de Amikoj en Granda Britujo kaj Aŭstralio; konsistanta el citaĵoj pri Doktrino, Praktiko, kaj Eklezia Organizo, el la Epistoloj kaj aliaj Dokumentoj eldonitaj kun la sankcio de Londona Jara Kunveno, 1672 ĝis 1911." Parto Ia, *Kristana Doktrino* (1883), Sm. 0.125; Parto IIa, *Kristana Praktiko* (1911), Sm. 0.500; Part IIIa, *Eklezia Organizo* (1906), Sm. 0.175. Londono: Headley Brothers, Bishopsgate, E.C.

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

(ordinare kvin aŭ ses), kiuj kunsidas unufoje en ĉiu monato, por trakti aferojn kaj disciplinon; kaj kiuj kune formas kion oni pro tio nomas "Monata Kunveno." Ĉiu Monata Kunveno, plie, estas unu el grupo de Monataj Kunvenoj, ordinare kvar aŭ kvin, kiuj simile unuiĝas por formi "Kvaronjaran Kunvenon," ĉe kies ĉiutrimonataj kunsidoj oni konsideras aferojn de pli vasta amplekso. La dek ok Kvaronjaraj Kunvenoj de Granda Britujo (kun kelkaj aliaj kunvenoj *N.d.l.t.*) formas siavice la "Londonan Jaran Kunvenon," kiu estas la plej supera aŭtoritato en la Societo. Oni povas eĉ diri, ke ĝi ja *estas* la Societo de Amikoj de Granda Britujo, ĉar ĉiu Amiko estas ano de la Monata, Kvaronjara, kaj Jara Kunvenoj, al kiuj li aŭ ŝi apartenas, kaj rajtas la parolon en ĉiu interkonsiliĝo. La Jara Kunveno okazas en Majo, kaj ĝiaj kunsidoj (kiuj de la unua tempo estis en Devonshire House, Bishopsgate Street (*Esceptoj:* Leeds, 1905; Birmingham, 1908; Manchester, 1912) daŭras ordinare ĉirkaŭ dek tagojn. Kompreneble, la efektiva ĉeesto estas malgranda kompare kun la nombro de anoj. En la nuna tempo la Societo konsistas el ĉirkaŭ dudek mil anoj, kaj la Jarajn Kunvenojn ĉeestas mil ducent ĝis mil kvincent proksimume.*

La viroj kaj virinoj havis ĝis 1907 Jarajn Kunvenojn apartajn. La virina Jara Kunveno fondiĝis longe post la vira, en 1790 (1784 *Trad.*), kaj traktis ĝenerale pri aferoj malpli gravaj, aŭ almenaŭ malpli ampleksaj, ol la vira. Ĝi havis nenian leĝdonan povon, sed posedis tamen influon ne malgrandan. Ne malofte okazis, ke viraj

* Ĉi tio rilatas nur al Londona Jara Kunveno. Ekzistas en aliaj partoj de la mondo 15 aliaj Jaraj Kunvenoj kun simila konstitucio. (*N.d.l.t.*)

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Amikoj "kun religia koncerno," vizitis la virinan kunvenon, kaj ke Amikinoj pro simila motivo vizitis la viran.

"Kunaj kunsidoj"—tio estas, kunsidoj de Amikoj viraj kaj virinaj kune—ankaŭ okazis de tempo al tempo, kiam temo speciale interesa por ĉiu ano estis konsiderota, kaj je tiuj okazoj la virinoj estis plene liberaj partopreni la diskutojn. Pro la kreskanta ofteco de tiuj kuniĝoj, oni en 1907 decidis, ke ĉiu kunveno estontece estu "kuna"; alivorte, la Vira kaj la Virina apartaj Jaraj Kunvenoj fariĝis unu kuna Jara Kunveno; kvankam ankoraŭ okazas ĉiujara Konferenco de Amikinoj.

Kredeble ŝajnas strange al la plimulto, ke oni neniam decidas demandon per kalkulo de voĉoj. De la unua tempo, oni atiṇgis ĉiun decidon per kion oni povas nomi praktika unuanimeco. La Jara Kunveno, kiel ankaŭ ĉiu alia kunveno "afera" aŭ "disciplina," havas sian protokoliston, kiu, kun unu aŭ pli da helpantoj, kunigas en si la rolojn de prezidanto kaj sekretario. Kiam demando estas plene konsiderita, la protokolisto devas interpreti la senton de la kunveno, kaj fari protokoleron, kiu protokolero, legite al la kunveno, ofte ricevas iom da modifo vorta aŭ eĉ senca, laŭ la proponoj de individuaj Amikoj, sed, enskribite en la libro, akceptiĝas kiel decido de la kuveno. Se montriĝas konsiderinda diverso de juĝo pri grava demando, oni kutime, se eble, prokrastas decidon ĝis la sekvonta Jara Kunveno; kaj tiu metodo, mi kredas, preskaŭ senescepte sufiĉis rezultigi la praktikan unuanimecon necesan por fina decido pri la demando. Certe estas rimarkinda la fakto, ke neniam voĉdonante, tia granda aro faras ĉiujn siajn aferojn je plena kontento de la granda plimulto el la koncernatoj.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

La Kvaronjara kaj la Monataj Kunvenoj estas, plejparte, ripetoj je malpli granda skalo de la Kunveno Jara. La aferoj de ĉiu suba kunveno, kiel ĉe la Jara Kunveno, fariĝas sen kalkulo de voĉoj, kaj decidiĝas simile per la juĝo de la protokolisto, post atingo de praktika unuanimeco. Ĉiu Monata Kunveno nomas "reprezentantojn" por la sekvonta Kvaronjara, kaj la Kvaronjaraj Kunvenoj same nomas "reprezentantojn" por la Jara. La reprezentantoj ne havas devon precize formulitan, sed oni laŭte legas iliajn nomojn, kaj notas ilian ĉe- aŭ foreston je la komenco de ĉiu kunveno por kiu ili nomiĝis; kaj estas celate, ke ili servu ĝeneralmaniere kiel specialaj peruloj inter la pli kaj la malpli grandaj kunvenoj al kiuj ili apartenas.

Simile, pri temo kiu rilatas la tutan Societon, la Jara Kunveno komunikas al la Kvaronjaraj Kunvenoj, kiuj siavice difuzas la impulson tra siaj Monataj kaj Apartaj Kunvenoj, ĝis ĝi atingas ĉiun individuan anon; kaj, resende, sciigoj pri ĉiu Aparta Kunveno de tempo al tempo estas liveritaj al la Monataj Kunvenoj, de ili raportitaj resume al la Kvaronjaraj, kaj tiel fine prezentitaj al la Jara Kunveno en Londono. Ĉiuj ĉi procedoj supren-malsuprenaj plenumiĝas laŭ detala precizeco kaj reguleco, kaj registriĝas ĉiustadie en la libroj de ĉiu kunveno. Ekzistas, do, kompleta sistemo de cirkulado, kvazaŭ vejna kaj arteria, per kiu ĉiu ano individue kontaktas al la Societo kiel tuto, kaj per kiu informoj, influo, kaj disciplino portiĝas ambaŭdirekten inter la centro kaj la ekstremaĵoj.

La "disciplino" de la Societo estas afero treege interesa, pri kiu mi ne kuraĝas diri certe kiom nia konfesata idealo praktike plenumiĝas. Sen ia dubo, en la

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

lastaj jaroj okazis iom grandaj ŝanĝoj, plejparte en la direkto al malseveriĝo de disciplino pri aferoj kompare malgravaj. En la plej frua tempo la Jara Kunveno formulis kelkajn demandojn por lego kaj konsidero en la subaj kunvenoj je diversaj okazoj, kaj pri la plimulto el la demandoj (el kiuj kelkaj rilatis diversajn fakojn de Kristana moralo, kaj kelkaj ofton de ĉeesto ĉe kunvenoj kaj konformon al akceptitaj normoj de simpleco vesta kaj lingva) oni kutimis postuli detalajn respondojn el ĉiu aparta kunveno, siatempe transsendotajn resume al la Jara Kunveno mem. En 1861, tamen, la Jara Kunveno instrukciis, ke kelkajn el la demandoj onu nur "konsideru," sen devo ilin respondi. En 1875 oni same decidis pri preskaŭ la tuta demandaro, kaj nuntempe oni respondas nur tiujn, kiuj rilatas ofton de ĉeesto ĉe kunvenoj religiaj kaj aferaj. (La demandoj nun uzataj troviĝas en la Aldono.) La ŝanĝo havas tre evidentan signifon; kaj mi kredas, ke ĝia efekto estas eĉ pli rimarkebla ol komprenus nescianto pri la treega zorgo kaj seriozeco, laŭ kiuj oni antaŭe pesis kaj priraportis ĉi tiujn aferojn en ĉiu "prepara kunveno" (t.e., ĉiu aparta kunveno sidanta kun la speciala celo prepari la aferojn traktotajn en venonta Monata Kunveno), kaj denove ĉiustadie en la progreso de la raporto ĝis ĝia fina prezentiĝo de la Kvaronjara Kunveno al la Jara. Vestaĵon kaj lingvaĵon, kaj aliajn eksterajn aferojn, oni nun (sendube plisaĝe) lasas preskaŭ tute al la konscienco de la individuo. Rilate al pli gravaj aferoj, kiel ekzemple severa honesto negoca, sobreco, kaj morala rekteco de konduto, ankoraŭ ekzistas, mi esperas kaj kredas, ne malmulte da prizorgo reala kaj vigla, per anoj speciale difinitaj. En ĉiu Monata Kunveno troviĝas Amikoj kiuj

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

oficas kiel *pliaĝuloj* au kiel *kontrolantoj*. La devo de la "pliaĝuloj" estas konsili la ministrojn pri la uzo de ilia talento; la devo de la "kontrolantoj" atenti pri helpo al la malpli riĉaj anoj, pri flego al la malsanaj, kaj aliaj aferoj tiaj; prizorgi la anojn ĝenerale rilate ilian Kristanan konduton, admoni private ĉiun, kiu eble kaŭzos falpuŝiĝon aŭ skandalon; kaj (se necese) venigi la aferon antaŭ la Monatan Kunvenon por trakto laŭbezona. Se la Monata Kunveno opinias necese eksigi anon pro persisto en konduto nekonforma al nia Kristana konfeso, aŭ alikiale, la dirita ano povas apelacii al la Kvaronjara Kunveno, kaj de ĝia decido al tiu de la Jara Kunveno, kiu estas ĉiuokaze definitiva.

La Londona Jara Kunveno havas konstantan komitaton, kiu traktas tiajn el ĝiaj aferoj, kiaj bezonas atenton pli ofte ol unufoje en la jaro, kaj prizorgas ĝiajn financajn kaj aliajn ĝeneralajn aferojn. Ĝi havas la strangan kaj pensigan titolon "Kunveno pri Suferoj," pro tio, ke ĝi komence sin okupis plejparte per helpo al Amikoj persekutataj.

"Komitatoj pri Ministrado kaj Kontrolo" kunvenas en ĉiu Kvaronjara kaj Monata Kunveno, kiel ankaŭ en la Jara. Ili konsistas el la enskribitaj ministroj, la pliaĝuloj kaj la kontrolantoj de ĉiu aparta kunveno, kune kun (en kelkaj Kvaronjaraj Kunvenoj) kelkaj Amikoj titolitaj "anoj per asocio," kiuj ĉeestas ilin kvazaŭ neoficiale, sed per konstanta invito. Ĉi tiuj komitatoj koncerniĝas, kompreneble, kun demandoj rilate la specialajn oficojn de siaj anoj.*

* La paragrafo ankoraŭ estas ĝusta esence; tamen en 1906 oni faris kelkajn ŝanĝojn, kiuj donis liberon al la subaj kunvenoj maldaŭrigi la komitatojn.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

La *ministroj*, kiel oni bone scias, ne estas difinitaj aŭ dediĉitaj per konsekro homa ; kaj neniu el ili iam ricevas salajron, aŭ havas devon respondi al postulo de homa aŭtoritato por servoj. Per la vorto "ministroj" ni nomas tiujn, ili estu viroj aŭ virinoj, kiuj ricevis talenton kaj vokon "ministri," tio estas, fari voĉan servon, en religiaj kunvenoj. Kiam Amiko uzis tian talenton ioman tempon laŭ maniero, kiu ŝajnas al la aliaj anoj evidentigi veran vokon, la Monata Kunveno notas la fakton en la libroj de la kunveno. Ĉi tiu enskribo estas farita nur por "bonordo," kaj oni ne supozas, ke ĝi aldonas ian plian povon aŭ aŭtoritaton al la ministro "enskribita." La ministroj estas tute liberaj daŭrigi siajn kutimajn okupojn, kaj multaj el ili, efektive, enspezas sian vivrimedon per laboro metia, komerca, aŭ profesia.

Kiam ministro, ĉe la uzado de sia talento, sentas vokon vojaĝi malproksimen, oni opinias bone, ke la "koncerno" venu antaŭ la Monatan Kunvenon, kaj, se ĝi estas tre grava aŭ malproksimena, antaŭ la Kvaronjaran, kaj kelkafoje eĉ la Jaran Kunvenon ankaŭ. La kunvenoj, se ili sentas "unuecon" pri la koncerno, liveras al la ministro protokoleron aŭ ateston tiusencan, kiu servas kiel prezentilo kaj garantio en ĉiu kunveno kiun la ministro vizitas dum tiu "servado." En tiaj kazoj oni pagas la vojaĝelspezojn de la ministro, de unu Monata aŭ Kvaronjara Kunveno al la proksima, kaj li kutime gastas ĉe anoj de la kunvenoj vizitataj. La ofteco de tiaj vojaĝoj, en Anglujo kaj ankaŭ alilande, "por servo al la vero," estas afero pri kiu malmultaj neanoj ion scias. Inter Anglujo kaj Ameriko estas konstanta interŝanĝo de vizitoj tiaj, kaj la tre abunda biografia literaturo de la Societo svarmas per raportoj pri entreprenitaj "sub

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

impreso de religia devo" vojaĝoj, kiuj daŭris iafoje monatojn, aŭ eĉ jarojn, antaŭ ol la Amiko "sin sentis libera" de la afero. Oni neniam antaŭdifinas limon al tia laboro. Oni sentas, ke ĝi estas laboro rilate kiun oni devas atendi kaj sekvi la ĉiutagan disvolviĝon de la Dia gvido.

Tia konture estas kion oni povas nomi la meĥanismo de la Societo. Restas nun aludi kelkajn ĝiajn karakterizajn kredaĵojn, antaŭ ol konsideri la spiriton kaj internan fonton el kiu ili kreskis, kaj de kiu ili ricevas sian tutan signifon kaj valoron.

Mi jam aludis la apartaĵon kiu kuŝas ĉe la radiko de ĉiuj ceteraj; nome, nian kredon pri la naturo de la vera evangelia ministrado, kiel voko al viroj kaj virinoj, junaj kaj maljunaj, kleraj kaj nekleraj; veninta rekte de supre, kaj ne transdonebla per homa aŭtoritato aŭ luebla por mono; obeenda laŭ la sola kaj senpera direktado de la unu Majstro, la sola Kapo de la Eklezio, Kristo la Sinjoro. Konsekvence de tiu kredo, la Amikoj, kiel oni bone scias, pro konscienco ĉiam rifuzis pagi dekonaĵojn, aŭ iel ajn kontribui al la subteno de pagata pastraro, kaj de la diservoj kiujn preskribas la Ŝtata Eklezio.

Tre parenca al ĉi tiu kredo pri ministrado estas nia atesto kontraŭ la observo de ĉia religia rito aŭ ceremonio. Nek bapto per akvo, nek rompo de pano kaj trinko de vino, estas akceptita de ni kiel Diordonita institucio konstante deviga, kaj neniun el tiuj ceremonioj ni observas. Ni kredas, ke la veno de Kristo metis finon al la malnova reĝimo de eksteraj observoj; kaj ke la tendenco de lia instruo estas rekte kontraŭ la graveco de aferoj tiaj. La tekstoj kiuj priskribas lian lastan vespermanĝon kun

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

la disĉiploj, kaj tiuj en kiuj li parolas pri sia konstanta influo sur ilin per la figuroj de pano, sango, k.c., ŝajnas al ni multe pli kompreneblaj kaj impresaj legite sen interpreto per la sakramentaj teorioj, kiujn oni greftis sur ilin. La "unu bapto" "en la Sankta Spirito kaj en fajro," kaj la konstanta spirita komunio ricevita per manĝo de la viva pano, estas, ni konscias, la esenco mem de vera kaj spirita diservo; kaj ni kredas ilin tute sendependaj de ceremonioj eksteraj. Ni do sentas, ke la solaj kondiĉoj necesaj por la plej altaj agoj de diservo estas la ĉeesto, kaj la konvena spirita stato, de la adorantoj.

Ĉe nia malakcepto de aparta pastraro kaj de ĉiu ekstera observo kuŝas la ĉefa divergo inter ni kaj aliaj Kristanoj. Kontraŭ militado ni ĉiam atestis, pro ĝia nekonformeco al plena akcepto de la Spirito de Kristo; kaj kontraŭ ĵuroj, ĉar li kategorie malpermesis ilin. Ni ankaŭ gvidiĝis forlasi la sekvadon post la ŝanĝiĝema modo, kaj ŝati simplecon vestan kaj lingvan; simplecon kiu nun rapide aliformiĝas laŭ tipo, sed, espereble, ne vere malaperas. Ĉi tiuj malpli gravaj atestoj kredeble estas pli vaste konataj, ol la pli fundamentaj; sed kvankam ili rilatas aferojn kompare bagatelajn, ili tamen kreskas el profunda radiko de principo. Rimarkinde estas, ke de tempo al tempo, en diversaj partoj de la mondo, naskiĝis religiaj sektoj, kiuj, ne komunikiĝinte kun ni, akceptis similajn doktrinojn pri multaj, se ne ĉiuj, el ĉi tiuj punktoj. Tiu fakto, aldone al la ekzistado kaj la ampleksa influo de nia Societo, ŝajne montras, ke ĝiaj radikoj profunde penetris iajn fundamentajn principojn de la vero.

Mi nun provos pritrakti ĉi tiujn principojn, ne analize,

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

aŭ serĉante lingvan precizon, sed konstatante, plejparte el persona sperto, ilian praktikan funkciadon.

Mi konfesas, ke ne sen ioma sinmalfido, mi, noveveninto, entreprenas la taskon. Ĉe la ĝisnuna skizo de efektivaj faktoj, kompreneble estis facile sin gardi kontraŭ diro grave erara ; sed en la venontaj ĉapitroj mi devos trakti aferojn malpli facile kontroleblajn. En kelkaj rilatoj, ŝajnas al mi apenaŭ eble, ke iu ne naskita kaj edukita en la Societo estu plene kompetenta priskribi ĝiajn principojn kaj morojn. Sed aliparte, la fakto, ke oni aniĝis ĝin de ekstere, mem donas apartan taŭgecon por la ofico interpreti ilin al eksteruloj. Oni memoru, mi petas, ke tute neniel mi pretendas paroli en la nomo de la Societo. Mia celo estas (kiom ebligas al mi la propra sperto) klarigi la sekreton de ĝia forto kaj de ĝia logo por neanoj ; kaj por tiu provo ja povas senti specialan liberon iu edukita ekster ĝia limo, kaj parolanta nur kiel individuo. Se mi ne povas pretendi plene posedi la akcenton de Amiko naskita tia, mi tamen povas esti ne malpli komprenebla por tiuj, ĉe kiuj miaj Kristanaj principoj ĝis matura aĝo ensuĉiĝis kaj nutriĝis.

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

ĈAPITRO II

LA INTERNA LUMO

La kreda fundamento sur kiu la Societo de Amikoj konstruiĝis, estas la konvinko, ke Dio ja efektive komunikas, per senpera kaj viva enblovo de iom el la spiro de sia propra vivo, kun ĉiu spirito kiun li kreis; ke li neniam lasas la homon sen atesto je li en la koro, kiel ankaŭ en la ĉirkaŭaĵoj; ke la mezuro de lumo, vivo, aŭ graco tiel donita kreskas per obeo; kaj ke por klare aŭdi en si la Dian voĉon parolanta decas ke oni estu trankvila—sola kun li en la kaŝejo de lia apudesto—ke ĉiu karno silentu antaŭ li.

Ĉi tiu kredo povas esti pli precize formulita, klarigita, kaj (ni kredas) pravigita, de la kompetentaj ĝin pritrakti filozofie. La fondintoj de nia Societo ne estis filozofoj, sed ili parolis pri la afero el intensa kaj abunda persona sperto, sekve de kiu ili konfide alvokis al la sperto de homoj ĉiuspecaj por konfirmo de sia doktrino pri la interna lumo. Kaj tiu konfirmo ne mankis. La historio pri la subita apero de la Societo, pri ĝia rapida formiĝo en fortan organizaĵon, kaj pri la eksterordinaraj persisto, fervoro, kaj sincero de ĝiaj unuaj anoj, plej imprese pruvas la ĝustecon de ilia celado.*

* En 1680 (tridek du jarojn post kiam George Fox komencis prediki) la nombro de Amikoj kredeble estis ĉirkaŭ 40,000. "En 1656 Fox kalkulis, ke malofte estis malpli ol 1,000 en malliberejo; kaj estas

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Mi tute ne deziras prezenti la fundamentan doktrinon de nia Societo per lingvaĵo malpli populara, ol tiu de la unuaj Amikoj. Mi preferas, kaj mi necese devas, kiel ili, apelacii al la komuna sperto. Mia celo estas per moderna kaj simpla lingvaĵo, kaj por praktikaj celoj, klarigi kiamaniere la konstitucio de nia Societo, kaj niaj apartaj atestoj, ĉiuj rezultis el tiu unu ĉefprincipo.

Al tiu, kiu demandis pri la realeco kaj naturo de la lumo interna, la unuaj Amikoj kutimis demandi responde, ĉu li ne kelkafoje sentis en si ion, kiu konsciigas lin pri liaj pekoj; kaj certigi al li, ke tiu sama povo, kiu aperigas, kaj tial estas vere lumo, ankaŭ, sekvate, kondukos lin el la peko. Tiu certigo, ke la lumo kiu malkaŝas la pekon, estas ankaŭ la povo kiu ĝin forigas, estis la evangelio de George Fox. La povon mem li priskribis multmaniere. Kristo en vi, la espero de gloro; la lumo, vivo, Spirito, kaj graco de Kristo; la semo, la renaskiĝo, la povo de Dio al savado, kaj multaj pluaj esprimoj tiaj, eltorentas en abundaj fluoj de kora elokvento. "Turni la homojn al la interna lumo," "direkti ilin al Kristo, ilia senpaga Instruisto," estis lia ĉiutaga laboro.

Tiucele li kaj liaj amikoj tien kaj reen vojaĝadis tra la lando, ĉie okazigante kunvenojn. Ke respondo neniam mankis al ilia alvoko, pruvas mem la multnombreco de tiuj, kiuj post tre malmultaj jaroj troviĝis pretaj renkonti persekuton, kaj konservi sian ateston dum longaj jaroj da mallibereco kaj suferado. En la komencaj tagoj de nia Societo, la doktrino pri la Interna Lumo evidente

asertite, ke inter 1661 kaj 1697, 13,562 Kvakeroj malliberiĝis, 152 ekziliĝis, kaj 338 mortis aŭ en malliberejo, aŭ pro siaj vundoj." (*Encycl. Brit.*, 9a eldono, art. *Quakers.*)

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

facile kompreniĝis kaj akceptiĝis de la ordinara angla menso. Nuntempe, kontraŭe, oni kutime aludas ĝin kiel dogmon misteran, kiu naskiĝas de tempo al tempo en la mensoj de izolaj entuziasmuloj, sed kiu estas indiĝena nur en Orientaj landoj, kaj nature abomena por la praktika prudento de la nia popolo.

La diferenco, mi kredas, venas el la fakto, ke ekzistas rondoj en rondoj, aŭ sferoj en sferoj. La lumo kiun la unuaj Amikoj atestis ne limiĝas en tiu plejinterna sanktejo, kies ekziston mem konscias eble neniu krom kelkaj mistikuloj. Kontraŭe, ili konstatis, ke kvankam ĝi fontas el tiuj plejprofundaĵoj, ĝi lumas ankaŭ al la konscienco, la konduto, kaj la tuta ekstera kadro de la vivo. Oni nomis ĝin "interna" ne sole laŭ la senco, ke ĝi, pli ol ĉio cetera, proksimas la centron de nia esto; sed ankaŭ laŭ la (por ordinaraj mensoj) pli komprenebla senco, ke ĝi rilatas la homon mem—ke ĝi estas por ĉiu la rekompenco de lia propra fideleco, senpere de pastroj kaj ordinancoj. La religio de ili predikita estis unu, kiu akcentas ĉies individuan respondecon pri la propra animo; ĝi estis religio portebla kaj kontrolebla—kiu postulas verecon ĉe vorto kaj faro, rektecon kaj bonkorecon kaj sinregon, sed ne ceremoniajn observojn aŭ pastrajn garantiojn; religio ĉe kiu la praktiko plipezas la teorion, kaj ĉiuj devas samnivele partopreni la Diservadon kaj la aferojn de "la Eklezio." Oni facile komprenas, kiom potence tia predikado sin rekomendus al la angla sendependemo. Ĝi nepre vokas al la senŝanĝa veramo en la homa koro, kaj ricevos bonvenon kiam ajn predikata el persona sperto pri ĝia potenco.

"Kion vi serĉas ekstere, vi jam posedas interne." La vortoj, kiuj ŝanĝis la vivon de Madame Guyon, neniam

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

perdos sian povon dum la homa naturo sin okupas per penado al stato de starema ekvilibro. La ĉiama pravigo de la Kvakerismo kuŝas ĉe ĝia energia aserto, ke la regno de Dio interne de ni estas; ke ni ne kreiĝis dependaj, por nia spirita bonfarto, de organizaĵo ekstera. Ĝia ĉiama malfacilo kuŝas ĉe la obstina emo de la homoj sin turni por spirita helpo unu al alia, ĉe la malforteco de ilia percepto de tiu dia Voĉo, kiu parolas al ĉiu per lingvo nur por li aŭdebla, kaj ĉe la apatio kontenta traekzisti la vivon sen provo al vera individua komunio kun Dio.

"La regno de Dio interne de vi estas." La veron de tiu profunda parolo de Kristo mem neniu Kristano disputas. Sed ĝia signifo estas tre ampleksa. Li mem kontraŭmetis ĝin al la "Jen tie ĉi!" aŭ, "jen tie!" kontraŭ kiu li avertis la disĉiplojn. Ili ne forrapidu serĉi la Kriston ĉiudirekte; ili memoru, ke lia regno (nepre kunsignifanta lian vivan ĉeeston) estas en la koroj de lia popolo. Li mem faras neniun el tiuj subtilaj distingoj inter konscio kaj esto, akcidento kaj esenco, subjektiva kaj objektiva, aŭ eĉ supraĵa kaj profunda, kaj similaj, kiujn plaĉis al multaj liaj plej sindonaj sekvantoj enteksi en la simplajn vortojn "interne de vi."

Al mi ŝajnas neeviteble, ke ju pli funden oni penetras la kaŝejojn de la homa animo, des pli oni devus havi senton de proksimiĝo al interna sanktejo. Sendube, oni povas tre vere kaj profunde kompreni la parolon "interne de vi" laŭ la senco "antaŭ ĉio en via plej intima esto." Sed tio ne estas ĝia origina kaj plej evidenta signifo. Nia Sinjoro en sia instruo ofte distingas inter ekstera kaj interna, sed la distingo estas farita larĝe kaj

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

simple. Plej ofte ĝi pli postulas nian sincerecon kaj tutkorecon, ol nian povon de sinesploro—ĝi estas pledo por la pli gravaj aferoj de la leĝo prefere ol observoj trivialaj kaj ceremoniaj. Mi kredas, ke oni apenaŭ povus vere diri, ke la doktrino pri "lumo interna," kiel ni komprenas ĝin, estas precize formulita en la Evangelioj; kvankam ĝi ŝajnas al mi preskaŭ neevitebla konkludo el ilia instruo. Mi tamen ne provas plene trakti la demandon. Mi nur deziras atentigi pri la tre ampleksa signifo de esprimoj kiaj "la lumo interne de ni," kaj "la ena" aŭ "interna lumo."

Kiel de nia Majstro mem, tiel ankaŭ de la Amikoj, kiuj predikis Lin kiel la Lumon, la figuro estis uzata laŭ larĝa kaj populara senco. Lumo estas la plej evidente konvena kaj ĉiam kontentiga figuro por la Dia vero. Ĝi tamen estas apenaŭ pli konvena aŭ kontentiga, ol la alia figuro tiom ofte, kaj preskaŭ interŝanĝeble, uzata de la samaj instruantoj, nome, spiro—inspiro. Apenaŭ mi scias, ĉu pli plene esprimus la veron diri, ke la fundamento de nia Societo estas kredo je la "interna lumo," aŭ je "*immediate* inspiro."* Mi ne scias ĉu la du ideoj estas ĉiurilate tute distingeblaj. Nia vera fundamento

* Mi volus ĉi tie rimarkigi pri la dusenceco de la angla esprimo "*immediate* inspiration." Per *immediate* oni povas kompreni "senpera," kiusence ĝi ŝajnas superflua; ĉar oni ja ne povas koncepti inspiron peran, kvankam rivelo tre povas esti tia. Sed rilate la komunikon de iu penso, ĝi povas signifi ankaŭ "tuja"; kaj tiusence kelkaj Amikoj kalkulas al ĝi specialan gravecon (kiun, mi kredas, aliaj malkonsentas) kvazaŭ ĝi limigus ministradon je la parolo de vortoj, kiujn oni kredas ĵus donitaj por parolo per (kion oni nomas) "freŝa sanktoleado" de supre. Parolante do pri nia kredo, ke en ĉiu koro ekzistas al la vero atestanto kvazaŭ radiata el la centra vero, mi preferus nunmomente eviti la esprimon. Entute, la figuro malplej misinterpretebla ŝajnas esti "lumo."

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

estas kredo je la fakto, kiun ili ambaŭ rilatas; la fakto de efektiva dia influo komunikata al ĉiu homa spirito.

La fakton de inspiro neas neniu Kristano, sed plena konfeso de ĝia nuna kaj konstanta funkciado estas iugrade propra al Amikoj. Ekster la Societo ne malofte aŭdiĝas paroloj kvazaŭ la Dia inspiro estas afero pasinta; dono tute escepta, ordinara nur en apostolaj tempoj. Al mi ŝajnas, ke tiel limigi ĝian amplekson preskaŭ estas nei ĝian realecon. Mi apenaŭ povas kompreni la ideon, ke antaŭ longe Dio ja parolis al la homoj, sed ke li neniam tion faras nun. Certe, ĝi ŝajnas kontraŭa al inda sento pri lia senŝanĝeco.

Multaj el ni konvinkiĝis, ke unu plej granda baro kontraŭ efektiva kredo je inspiro estas la tre kruda kaj meĥanika koncepto pri ĝi per ĝia atribuiĝo al la litero de la Skribo. Kontraŭ tiu prema kaj supraĵa koncepto, la Amikoj des pli generale ŝirmiĝis, ju pli firme ili tenis la Kvakeran doktrinon pri la lumo interna. Kelkaj, sen ia dubo, tro malproksimen iris, transigante la ideon de senerareco al si mem. Sed, entute, mi opinias, ke la instruo de Fox kaj Barclay (t.e., mallonge, ke la "Vorto de Dio" estas Kristo, ne la Biblio, kaj ke la Skriboj des pli donas profiton, ju pli oni legas ilin en la sama spirito de kiu ili devenis) bone kontraŭpezis la emon de aliaj Protestantaj sektoj transigi la ideon de senerareco for de la Eklezio al la Biblio. Nenio, mi kredas, povas vere instrui la naturon kaj signifon de inspiro krom persone ĝin sperti. Ke ĉiu povas havi tian sperton, se li nur atentas la Dian influon en sia koro, estas la fundamenta doktrino de la Kvakerismo.

Ĉu vivo konforme al ĉi tiu doktrino rezultigos la

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

hejmecan kaj solidan, sed preskaŭ tro sobran moralecon de la tipa Kvakero, aŭ ĉu ĝi kondukos al la mistikaj fervoroj de ia Isaac Penington, aŭ la apostolaj laboroj de ia John Woolman aŭ Stephen Grellet, dependas plejparte de la natura temperamento, kaj apartaj ecoj, de la vivanto. La amplekso de la diversaj konsekvencoj de la doktrino estas tiel vasta, kiel la amplekso de homaj talento kaj sperto. Kredo komuna al la profeto kaj al la infano kompreneble liveros grandan diverson de praktika rezulto.

Ĝi estas kredo kiun oni apenaŭ povas propagandi alie ol per alvoko rekte al la sperto, al la atestanto interna; kaj ekzistas la plua malfacilaĵo, ke sperto, al kiu oni povas alvoki nur partopreninte ĝin, necese esprimiĝas per lingvaĵo tre ofte kaj nature miskomprenata. La aserto, kiom ajn singarda, ke oni efektive mem spertas la Dian inspiron, tre povas soni kiel pretendo al persona senerareco. Nenio, tamen, povus esti pli maltrafa ol tia kompreno. La unua efiko de la brilo de lumo interna estas montri kio estas malĝusta, "konvinki pri peko." Ne estas pretendi superecon je ordinaraj homaj kondiĉoj diri, responde tian alvokon, "Jes, mi ja sentis potencon internan, kiu konsciigas min pri miaj pekoj kaj eraroj, kaj mi ja spertis ĝian kuracan kaj emancipan povon krom ĝiajn fajrajn purigojn kaj akrajn kondamnojn. Kio montris al mi mian kulpon, tio resanigis min; la lumo min gvidis, kaj ankoraŭ gvidas, antaŭen kaj supren, el la abismo, pli kaj pli proksimen al sia eterna Fonto, kaj mi scias, ke kiom mi ĝin obeas, mi estas ekster danĝero." Kio estas tia respondo krom konfeso, ke "la lumo, la Spirito, la graco de Kristo" ja estis enloĝanta, enblovanta povo en la koro? Se tio estas pretendo al

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

inspiriteco, ĝi estas pretendo, kiu supozigas nenian meriton aŭ eminentecon ĉe la pretendanto; ĝi havas bazon komunan por la impostisto, la diboĉulo, kaj la pekulo; por Paŭlo kaj Maria Magdalena. Ĝi estas la historio de ĉiu infano revenanta al la domo de la Patro.

Sed ne por ĉiu estus nature priskribi tiun sperton per lingvaĵo tiel mistika, kaj kredeble la mistikulo siaflanke ne haltus ĉe io tiel simpla kaj elementa. Kaj ĉi tie frontas nin la vera "apartaĵo" de Kvakerismo—ĝia rilato al la mistikismo. Sen ia dubo George Fox mem kaj la aliaj patroj de la Societo posedis fortan mistikemon, kvankam ne laŭ la senco de ĝenerala nebula revemeco, kiun iom riproĉe donas al tiu vorto la adorantoj al "sana prudento." Certe, nenia riproĉo povus esti malpli trafa rilate la unuajn Amikojn. Ili estis fajraj, dogmemaj, kaj treege praktikaj kaj sobranimaj. Sed sendube ili estis mistikuloj laŭ la, miaopinie, pli ĝusta senco de la vorto —homoj, tio estas, vive konsciantaj la internecon de la lumo de vero.

La mistikismo tiusence estas konata fenomeno, de kiu multaj ekzemploj estas troveblaj en ĉiu religio. Efektive, ĝi pliĝuste estas persona apartaĵo, ol formo de kredo; kaj pro tio, kvankam de tempo al tempo socioj (ekzemple, la nia) baziĝis sur tielnomitaj mistikaj kredoj, apenaŭ povas ekzisti—almenaŭ, en Eŭropo—ia vera skolo mistika. La mistikismo, kiel oni konas ĝin, estas esence individua. Ĝi rifuzas esti formulita aŭ resumita. Laŭ unu senco ĝi estas komuna al ĉiuj religioj; laŭ alia, ĝi egale estas nedependa de ĉiuj. La konsiston de mistikismo oni facile komprenas, sed la kvalito mem estas nekomunikebla. La kredo de

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

mistikuloj estas konata sekreto. Ili mem ĉiam deziris ĝin komuniki, kvankam ili ĉiam sentis tion nefarebla per vortoj sole. Ĝi estas la sekreto de la lumo—interna lumo sin vestanta per la vivo, kaj vivanta por ĉion konduki al la lumo. Mistikulo, miakomprene, estas tiu, kies animo estas memkonscie lumata de interne; kiu sentas, alivorte, senperan internan komunikiĝon kun la centra Fonto de lumo kaj vivo. Li nature havas viglan senton kaj de la distingo kaj de la harmonio inter la interna kaj la ekstera—senton tiel vivan, ke li ne povas kredi ĝin nepartoprenata de aliaj. Vera mistikulo kredas, ke ĉiuj homoj (kiel li konscias pri si mem) havas vivon internan, en kiun, kvazaŭ en privatan ĉambron, ili povas retiri sin laŭvole.* Ĉe tiu internejo li trovas azilon for de la kalejdoskopaj aspektoj de ekstera ekzisto; for de la multaj ĝenoj kaj plezuroj kaj agitiĝoj de la vivado senta kaj afekcia; for de homaj juĝoj, de ĉia ŝanĝiĝo, kaj hazardo, kaj malkvieto, kaj distriĝo. Li tie trovas, unue ripozon, poste sanktan gvidon; lumon, kiu brulas kaj purigas; voĉon, kiu obeigas; li sin konscias antaŭ la vizaĝo de sia Dio. Ĉi tie estas, en tiu plejsanktejo, kie "abismo resonas al abismo"; ĉi tie, kie la nepereemaj, nesondeblaj, senŝanĝaj elementoj de homeco renkontas la Dian Fonton de vivo, de kie ili fluas, kaj estas unu kun ĝi; ĉi tie, kie la vivakvo ŝprucas supren por eterna vivo.

"La regno de Dio interne de vi estas." Persona religio estas reala kaj vivanta nur kiom ĝi kreskas

* Oni ne komprenu min ke "teni la animon" (laŭ kvakera esprimo) "retirita al la Sinjoro" estas facile. Kontraŭe, tio povas postuli energian penadon. Sed peni oni povas laŭvole, kaj eĉ la nura peno retiriĝi de la supraĵo al la profundoj de la vivo nepre alportas helpon kaj forton—estas mem procedo fortikiga kaj firmiga.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

el ĉi tiu profunda interna radiko. La radiko mem estas komuna al ĉiuj veraj kredantoj. Per kio povas esti, ke por kelkaj animoj la vortoj "interna kaj ekstera" esprimas la plej vivan kaj kontinuan fakton de konscio, dum por aliaj ili ŝajne havas nenian ajn signifon; kiel okazas, ke unuj naskiĝas mistikuloj, dum aliaj trovas la raporton de la mistikulo pri la interna vivo nekredebla kaj apenaŭ komprenebla—jen psikologiaj problemoj nesolvotaj de mi. Se, tamen, ia rilato inter ekstera kaj interna ja vere ekzistas (kaj tion supozeble oni ne neos, kia ajn estu la plej filozofie ĝusta maniero ĝin esprimi), la kapablo ĝin percepti estas necese talento donita. Mi efektive kredas, ke la povo tiudirekta, kiu karakterizas mistikulojn kiaj, ekzemple, Thomas à Kempis, Jakob Boehme, Tauler, Fénélon, Madame Guyon, George Fox, William Law, Sta. Terezo, kaj Molinos, estas esence la sama talento, kiu aliforme, aŭ ĉe malsama temperamento kaj donoj alispecaj, faras poetojn. Ĝi estas la talento vidi la veron proprokule, la kapablo ricevi senperan rivelon. Tamen, kiu havas okulon vidi "la lumon, kiu lumas al ĉiu homo venanta en la mondon," tiu ne dubas, ke ĝi estas heredaĵo ĝenerala. Predikantoj kiaj la ĵus aluditoj ĉiam konfide alvokas al ĝi kvazaŭ al atestanto trovebla en ĉies koro. Kaj ĉu la sperto ja ne konfirmas tiun kredon? Nur laŭ la grado estas ilia dono escepta. Eble ili havas vidon aglan, tamen, ili vidas per la sama lumo kiel vesperto.

Sed la viva senpera percepto de vero, aŭ lumo, evidente tendencas igi ties posedanton tiugrade sendependa de instruistoj eksteraj. Oni ja scias, fakte, ke tiaj lumatoj ĉiam emis iri la vojon propran, kaj malatenti, aŭ eĉ kontraŭi, instruon tradician; kio ofte okazigis konflikton

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

inter ili kaj ekleziaj aŭ aliaj aŭtoritatoj. La Roma Eklezio, kun sia kutima sagaco, provis kiom eble utiligi tiun strangan povon, kaj provizi savklapojn por la neregebla restaĵo. Sufiĉe facile estas tion fari, pro du rimarkeblaj karakterizaĵoj de mistikuloj—sendependeco kaj kvieteco.

Mistikuloj estas nature *sendependaj*, ne nur de eklezia aŭtoritato, sed ankaŭ ĉiu de alia. Tio nepre rezultas el la fakto de senpera ricevo de lumo. Kvankam ĝi necese estas forta ligo de kunsento inter tiuj, kiuj rekonas ĝin en si mem kaj en aliaj, ĝi nature malinklinigas ilin por disĉipleco. Ili sidas kutime ĉe nenies piedoj, kaj ordinare ne tre ŝatas, ke oni sidu ĉe iliaj. La mistikismo, el ĉi tiu vidpunkto, ŝajnas nature kontraŭa al tradicio. Vera mistikulo ne sin ligas per pensoj aliulaj. Li ne sentas bezonon por ili, ĉar li estas certa pri la sufiĉeco kaj konscia pri la posedo de tiu interna gvido (ĉu nomata lumo, aŭ voĉo, aŭ inspiro) por ĉiu individuo videbla, aŭdebla, sentebla, aŭ en la propra koro, aŭ neniel. Sed ke tiun gvidon oni devus serĉi kaj obei estas principo plantebla kaj transigebla de generacio al generacio. Ĝia heredita influo estas tre rimarkebla en malnovaj kvakeraj familioj, ĉe kiuj ankoraŭ troviĝas unika tipo de Kristana karaktero kaŭzita de ĝi.

El kredo je interna gvido nature rezultas ankaŭ la *kvieteco*; ne nur pro tio, ke ĉe apudesto al Dio ĉio nure homa necese malŝvelas en silentan malgravecon; sed ankaŭ pro instinkta sento, ke nur dum trankvilo povas esti perfekta reflekto de supre en la spegulo de la homa spirito. La natura frukto de mistikismo estas kvietismo.

Mankas al mi rimedo kalkuli kiagrade mistikaj kaj

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

kvietismaj principoj efektive enestas la Societon de Amikoj nuntempe. Sed mi estas certa, ke nia Societo estas la natura hejmo de tiuj, kiuj ilin posedas, ĉar ĝi estas la sola sukcesa enkorpiĝo de tiuj principoj en Eklezian Konstitucion. Oni celas en ĉio subteni kaj konservi la kutimon atendi gvidon individuan, internan; lasante por ĝia energiado la plej liberan kampon, kaj forigante kaj malkonsilante ĉion kun tendenco malhelpi obeon al ĝi. En posta ĉapitro mi provos skizi la rezulton diversdirektan de tiu celado. Ĉi tie mi provos klarigi, kiom mi povas, precize kion mi komprenas per tiu interna lumo, voĉo, aŭ Dia gvido, kiun atendi pri ĉio ni Amikoj kredas nia devo kaj nia plej alta privilegio.

Mi ja ne pretendas, ke mia propra parto en ĉi tiu regiono de homa sperto estas pli ol malforta kaj intermita iometo da tio, kion mi scias ebla. Mi fervore deziras klarigi al aliaj, kion mi mem trovis aparte bena kaj helpa en la pli profunda disvolviĝo, aŭ per vorto aŭ en la vivo, de kvakeraj principoj. Mi tamen sentas, ke tiu tasko postulus por sia plena plenumiĝo ne nur pli grandajn povojn ol la miaj, sed ankaŭ kunhelpon de la leganto per io pli ol sincereco, per vera deziro prihelpi la balbutan parolon, kaj forigi la mankojn de individua netrafo. Al tia helpema aŭskultonto, do, mi nun image min turnas.

Fideleco al la lumo estas la devizo de ĉiu, kiu malsatas kaj soifas al justeco—kiu celas la regnon de la ĉielo. Ĉu tio estas nur ekvivalento por la pli ordinara esprimo "obeo al la konscienco?" Mi kredas, ke ne. La konsciencon, oni scias, povas difekti malrektiĝo, malsaneca troiĝo, parta sensentiĝo, tordiĝoj kaj kapricoj ĉiuspecaj;

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

kaj ĝi mem bezonas kontrolon laŭ diversaj eksteraj normoj. La konscienco, do, ne povas esti gvidanto nepra kaj superega. Ĉu iam povus esti prave ĝin malobei, dependas de la senco kiun oni donas al la vortoj "konscienco" kaj "prave"—enigmo kiun mi ne intencas tuŝi.

En senco larĝa kaj praktika, ĉiu scias, ke se super la konscienco estus nenio, la konscienco nepre kondukus multajn en foson; kaj plie, ke pro manko de lumiĝo el supre, ĝi tien efektive jam kondukis. La lumo, kiun sekvi estas la superega bono, necese estas io pli pura ol la eraripova konscienco kiun ĝi devas gvidi. Ĝi nepre estas tiu potenco interne de ni, se ekzistas tia, kiu estas unu kun ĉiom de la saĝo, de la bono, de la ordo kaj harmonio, ekstere de ni; unu kun "la potenco, ne ni mem, kiu energias al justeco"; unu kun "la eterna volo al ĉia boneco." Ĝi estas potenco tiom ĉiea kaj enestanta en la spirito de la homo, kiom estas la gravitado (aŭ kiu ajn eĉ pli elementa forto al kiu ĝi eble reduktiĝos) en la ekstera mondo, en kiu li loĝas. Ĝi estas la potenco per kiu ni vivas kaj moviĝas kaj estas—la potenco kaj la apudesto de Dio.

Mi ne provas—en tiaj manoj la provo estus ja senutila—ion kontribui al argumentoj por la Teismo. Kompreneble, por tiu, kiu ne kredas la ekziston de la vivanta Dio, la tuta temo kiu min okupas estas sen intereso aŭ signifo. Kaj al aliaj mi lasas akordigi (aŭ montri ke ne necesas tion provi) la ekziston de malbono kun la ĉiopoveco de Dio. La mistero, en kiun nepre sin perdas ĉiu serĉado al plena teorio pri la Aŭtoro de nia esto, ne nebuligas, kvankam ĝi povas ombri, la praktikajn demandojn (kiuj solaj estas mia temo) rilate nian

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

ĝustan teniĝon antaŭ li. Fidon kaj aliĝon al li mi antaŭsupozas kiel starejon; se oni ne donas tion, senutile estas pluen iri. Mia motivo por esploro eĉ tioma en niaj fundamentaj postulatoj estas, ke mi ne povas ne pensi, ke nia kvakera doktrino pri senpera Dia gvido kuŝas sur pli larĝa bazo de komuna kredo, ol oni ordinare supozas. Ĝi ne estas, mi kredas, nura elkreskaĵo de unu aparta formo de Kristanismo; ĝi estas la konsekvenca kvankam neofta rezulto el ĉiu sincera kredo je Dio, kiel ajn atingita. La plej flegma kaj singarda Teisto ne povas konfesi malpli, ol ke Dio nepre iasence direktas la iradon de la mondo kaj de ĉio en ĝi. La plej ekstaza mistikulo povas atesti nenion pli, ol la fakton ke Dio ja efektive enas kaj regas la plej intimajn lokojn de lia interna vivo. Ĉu tio ne estas efektive nur la sama vero, vidata tra la pligrandiga vitro de persona sperto?

Al mi ŝajnas senutile serĉi restejon inter unuflanke, ateismo pro konvinko, kaj aliflanke, plena sincedo al la interna influo de la Dia spirito. Kredi je Dio, adori lin per tuta koro, fidi lin senlime, kaj ami lin super ĉio, ŝajnas al mi nur diversaj stadioj en la kresko de unu sama semo. Mi nur tro bone scias, ho ve! ke tiu kresko estas malrapida, kaj ke ĉiumomente ĝi renkontas barojn kaj haltigojn. Mi scias, ke nia fido devas ne nur barakti, sed barakti tra la mallumo, kaj ke ĉiupaŝe ĝi povas renkonti problemojn por ĝi nesolveblajn. Sed mi ne povas konsenti, ke estas konsekvence aŭ logike iradi en fido nur duonvoje. Se estas racie kredi je Dio kiel la Superega Estulo, kiel povas esti neracie atendi lian vivan kuneston kaj gvidon rilate al la plej etaj detaloj de nia ĉiutaga vivo? Antaŭ li, nepre malaperas niaj distingoj inter granda kaj malgranda, kaj "eĉ mallumo ne mallumas."

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

" Kien mi kuros for de via vizaĝo ? Se mi leviĝos al la ĉielo, vi estas tie ; se mi kuŝiĝos en abismo, jen vi tie estas. Ĉu mi okupos la flugilojn de la matenruĝo, ĉu mi loĝiĝos sur la rando de la maro—ankaŭ tie via mano min kondukos, kaj via dekstremano min tenos."

Sed oni eble respondos : " Ĉio ĉi povas esti tute vera, sed kiel distingi la voĉon Dian de la multaj aliaj voĉoj kiuj fordistras de ĝi la atenton ? Se Dio estas ĉie, kiel (rilate gvidon) tio diferencas praktike de lia nenieesto ? " Mi ja sentas la grandan forton de la malfacilaĵo. Ĝi ŝajne resendas nin por gvido al la konscienco, kies nesufiĉecon ni ĵus konstatis. Se mi respondos, ke Dio estas videbla en " kio ajn estas vera, kio ajn estas justa, ĉasta, ŝatinda, kaj bonfama," oni tre povas rediri, " Kaj kiel, krom per la eraripova konscienco, oni povas koni la veran, justan, ŝatindan ? "

Mi kredas, ke la malfacileco distingi (kaj distingi ni devas) inter la volo, aŭ voĉo, aŭ lumo Dia, kaj voloj aŭ voĉoj aŭ lumoj malsuperaj, estas unu kiun ni devas ne ignori ; kaj plie, ke la unua paŝo al lerno de la leciono estas kompreni, ke leciono ĝi estas, kaj malfacila—disciplino dumviva. Sed ĝuste kiel la infano fidas la gepatrojn instinkte, absolute, senhelpe, eĉ antaŭ ol ĝi provas kompreni ilin, tiel same, ŝajnas, ni povas kaj devas fidi Dion senrezerve, antaŭ ol komenci, malrapide kaj senforte, tamen persiste, akiri konon pri li. Kaj same kiel la fido de plenaĝa filo aŭ filino estas io pli nobla ol la fido de infaneto, tiel la sperto de saĝo kaj prudento sendube havas rivelon propran—altvaloran aldonon al tiu esenca rivelo kiun ricevas unue la infanoj, kaj poste la saĝaj nur kiom ili havas korojn infanecajn. Ke la

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

sentoj ekzerciĝu distingi inter vero kaj malvero, lumo kaj mallumo, ordo kaj malordo, la volo Dia kaj la volo karna, estas, mi kredas, la celo de edukado en la nuna vivo. Ekzistas nenia ebenigita vojo tion atingi. Tamen, ĉu oni povas honeste diri, ke ĝi estas neatingebla ?

Se, do, nur malrapide kaj grade oni povas ĝisveni proksimiĝon al vera kono de Dio (eĉ laŭ homa mezuro), ĉu ne estas kredeble, ke nur malrapide kaj grade li igas sian voĉon kaj sian gvidan tuŝon distingeblaj kaj kompreneblaj al ni ? Ĉu mirinde, se tiu, kiu ne atribuas al Dio eĉ la larĝajn evidentajn leĝojn, kiuj baras ĉies vojon al krudaj malbonfaro kaj eraro, ne konscias la realecon aŭ la signifon de tiuj delikataj detenaj tuŝoj, per kiuj la spiritoj cedintaj sin al lia prizorgo ricevas iomete da simileco al la Filo en kiu li havas plezuron ? Ĉu ne la unua paŝo al kompreno de tio, kio estas persona kaj individua, estas akcepti tion, kio rilatas egale ĉiujn ?*

Tiu individua kaj senpera gvido, ĉe kiu ni konscias ke "la fingro de Dio venis al ni," ŝajnas kvazaŭ kompletigi kaj perfektigi la laboron malnete hakitan de moraleco kaj konscienco. Oni povas figuri la leĝojn de nia lando per la marbordaj krutaĵoj de nia insulo, de kiuj oni malofte sentas riskon defali ; kaj la moralan normon de nia socia rondo per la ŝoseo, kiun oni apenaŭ povas maltrafi. La individua konscienco prezentiĝus, simile, per barilo, kiu por ĉiu enfermas partojn de la kamparo, kaj eĉ foje baras kaj mallarĝigas la vojon mem. Kaj tiu Dia gvido, pri kiu mi parolas, povus figuriĝi per premo de mano sur

* "Se vi ne estis fidelaj en tio, kio apartenas al alia homo, kiu donos al vi tion, kio estas via propra ?" (*Luko* xvi. 12.)

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

la nia, dolĉe direktanta nin paŝi dekstren aŭ maldekstren, halti aŭ iri antaŭen, en maniero intencata sole por ni, kaj de ni solaj komprenata.*

Kiam mi diras, ke mi "prave gvidiĝis" al iu faro, mi volas diri, ke estante plene en la limoj difinitaj de la moralo, de personaj postuloj, de plej severa atento al la voĉo de konscienco, mi tamen sentis, ke ankoraŭ restas elekto farenda inter aferoj egale permeseblaj, sed kredeble ne egale farindaj—elekto, povas esti, inter du niveloj preskaŭ senlime for unu de la alia—kaj ke farante tiun elekton mi agis influate de deviga aŭ detena povo ne la mia. Ordinare, mi volas diri, plue, ke elektante mi atendis, kaj kredeble petis, lumon de supre, kaj ke la sekvoj de tiu elekto tendencis firmigi la fidon ke mian agon direktis Unu, kiu je la komenco povas vidi la finon, kiu scias aferojn al mi kaŝitajn, kaj kiu "konas mian vojon jam antaŭe"; mallonge, ke mi kondukiĝis kiel blindulo per vojo kiun mi ne konis. Al tia sperto ĉu ne atestas multege da Kristanoj, kaj speciale la pliaĝaj?—ĉar eble bezoniĝos longaj jaroj da pacienco, antaŭ ol vidiĝos la

* Mi kompreneble ne forgesas, ke pro la neperfekteco de homaj leĝoj kaj homaj povoj, povas esti, kaj efektive estas, kazoj, kie la Dia gvido kondukas laŭ vojoj kiuj kontraŭas ilin. La supra figuro celas nur ilustri la ĝeneralan analogion inter la kvazaŭa mapo, kiun povas desegni la homa racio, kaj tiu individua kaj senpera gvido, kiu sole povas montri al ni vojon pli altan kaj mallarĝan, sed pli liberan—la vojon de tiu plej alta servado kiu estas perfekta libero. Kiam, en escepta kazo, iu kontraŭeco montriĝas inter la homa kaj la Dia gvidlinioj, oni povas diri, konservante la figuron, ke nur potenco viva povas liberigi la homan spiriton de la tro prema enbarado de malsanema aŭ malklera konscienco, kaj ĝin gvidi laŭ vojoj kontraŭaj al la rutino de la akceptita moralo, aŭ eĉ, en escepta kazo, permesi kaj ebligi, kaj eĉ postuli, ke ĝi forsaltu de la krutaĵoj de la leĝo mem. Kaj instruite de la sperto ni povas fidi, ke en tia kazo la martira sango ankoraŭ estos la semo de la Eklezio.

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

ŝlosilpecoj de la enigmo, kaj oni povos diveni la intencon de la tuto.

Mi bone konscias, ke mi parolas pri regiono de sperto, en kiu facilege estas sin trompi. Mi scias, ke tiu, kiu el la abundo de la koro parolas libere pri ĉi tiuj aferoj, emas ne nur ofendi la senton de respekto, sed montri bedaŭrindan senlogikecon per siaj konkludoj el faktoj bagatelaj—faktoj kies signifo estas tute persona kaj nekomunikebla al aliaj, kaj kiuj mem tre povas esti grandaparte fantaziaj aŭ distorditaj. Mi opinias, ke pruvon aŭ argumenton subtene de tio, kion oni nomas " aparta providenco," oni malprave bazus ekskluzive sur okazaĵoj el la propra vivo. Oni forgesas, ke tio, kion oni persone trovas plej konvinka pro tio ke ĝi estas sperto propra, pro tiu sama kialo—kiel *argumento*—estas por aliaj malplej konvinka. La *impreso*, kompreneble, povas esti simpatie kunsentata, kaj ĝi prave posedas apartan gravecon por tiu, kiu havas kaŭzon fidi la parolanton. Sed mi opinias, ke respekto kaj racio ambaŭ postulas, ke ĝenerale ĉies persona kaj intima rilato kun Dia Providenco estu rezervita plejparte por uzo kaj edifo persona. Pruvo aŭ argumento pri la ĝenerala vero, ke Dio gvidas sian popolon individue, devas fondiĝi sur bazo pli vasta, ol unuhoma sperto kies ajn.

Ke ĉiu prave ja povas atendi individuan gvidon plej detalan estas kredo, por kiu, ŝajnas al mi, abundas kialoj, ampleksaj kaj profundaj. Kiel mi jam diris, mi ja ne povas kompreni, ke kredanto je providenca reĝimo povas fiksi ĝian limon ĉe ĝeneralaĵoj, aŭ, kiel ofte okazas en la praktiko, ĉe tiuj rezultoj de la Dia regado kiuj lin plaĉas. Ĉar se oni efektive kaj sincere kredas, ke la dispono de ĉiuj homaj aferoj estas en la

Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

manoj de unu superega Reganto, kiel kredi malpli, ol ke la plej eta bagatelo rilate ĉiun el ni ricevas la saman ĉienpenetran prizorgon? Ĉu ne estus egale racie aserti, ke Dio kreis la bestojn, sed lasis al ĉiu disvolvi sian felon aŭ plumaron? Kaj, plue, se al Dio oni atribuas la ŝirmiĝon kontraŭ danĝero, kiel malakcepti la paralelan kredon, ke egale laŭ lia ordono oni elmetiĝis al ĝi, kaj sekve, en kelkaj kazoj, nerevokeble destiniĝis al eĉ plej ekstrema doloro?

Tial mi kredas, ke antaŭ ol povas esti espero ĝui la intiman kaj benan komunion kun Dio kiu aliformiĝas la tutan vivon, devas plenumiĝi du gravaj kondiĉoj. Oni devas kompreni, ke ĉio, de plej eta ĝis plej granda, estas lia lingvo—lingvo kies interpreto estas la ĉefa afero de la nuna vivo; kaj ankaŭ oni devas esti kontenta suferi ĉian doloron kiel lian disciplinon.

Mi scias, kompreneble, ke la du kondiĉojn oni povas plenumi nur per multa lernado kaj el longa sperto pri la dirita gvido. Sed iliaj radikoj—instruiĝamo kaj kuraĝo—iugrade plantiĝis en la homo longan tempon antaŭ ol li komencas pripensi demandojn kia la regado de la mondo aŭ la dispono de sia vivo.

Mi kredas, ke plejparte ĉe la kondiĉo dua—la postulo al kuraĝo—kuŝas la morala malhelpo kontraŭ plena kredo je Dia gvido. Malfacile estas *senti*, ke dolorigo estas ago de Tiu, kiun oni deziras koni kiel Amon. Jen tamen, la centra postulo mem de la Kristanismo. Kio estas la kuraĝo, krom volonteco suferi, preteco levi la krucon?

Per la potenco de la Spirito de Kristo, la eterna Filo de la Patro, tiun venkon de fido ni ja *povas* atingi. Sentime ni povas fronti la vivon, kaj legi ĝiajn plej kaŝitajn

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

enigmojn per la lumo de tiu rivelo de Dia amo, kiun li gajnis por ni per sia suferado kaj morto. Vidate per tiu lumo, ĝi estas, laŭ la universala atesto de la sanktuloj, delikata kvankam ofte severa malvolviĝo de la ĉiela saĝo —profundo interne de profundo—nedireble milda rilate metodojn, sed nedepetebla rilate kondiĉojn. Ĉiupaŝe ni devas renkonti la fajran bapton. La profundaĵoj de Dio ne estas atingeblaj krom per detruiĝo de la pereema karno. Nur tra la morto ni eniras la vivon. Sed enirante, ni povas rigardi malantaŭen, kaj el sperto diri, ke liaj disponoj superis niajn projektojn—ke liaj pensoj altas super niaj pensoj, kiel la ĉielo super la tero.

Se oni deziras koni la gvidon de Dio, oni devas celi ĉielen. La hejmo al kiu li nepre gvidos la fidantojn je li, estas nenia hejmo tera, sed Ciono—la ĉiela Jerusalemo—la bela urbo de paco, enirebla nur tra multaj suferadoj. Tiu, kiu serĉas vojojn ebenajn kaj luksajn ripozejojn ja povas diri, ke li rimarkas nenian signon de gvido. La gvido Dia estas for de sinindulgo, ofte for de ekstera sukceso; tra humiliĝo kaj malprospero; tra multaj kaptiloj kaj tentoj; laŭ vojoj malglataj kaj kontraŭ fortoj malamikaj—ĉiam supren. La atesto de sukceso estas en la regiono de sperto kiu estas plej interna, profunda, kaj spirita. Ja senutile estas priparoli ĝin al tiu, kies vizaĝo ne firme rigardas Cionen. Ĝi donos nenion celitan de li. Tiu, kiu konas la voĉon de la Dia Gvidanto, kaj tiu, kiu neas, ke ĝi estas aŭdebla, ne tiom kontraŭdiras unu la alian, kiom uzas malsamajn lingvojn—aŭ pli ĝuste, aludas malsamajn statojn de ekzisto.

Mi estas parolinta pri "lumo," "voĉo," "gvido," kiel terminoj preskaŭ samsencaj kaj interŝanĝeblaj, esprimantaj konscion pri la apudesto de Dio kun ni kaj en ni.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:46 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

En la vorto "inspiro" oni vidas plie la simbolon de lia potenco—de la subtena, puriga, vigliga dono de lia Spirito. Ĉi tie vortoj estas preskaŭ senpovaj; kaj aŭdante aŭ parolante, ĉe alproksimiĝo al tiuj profundaĵoj "neeldireblaj," oni bezonas singardemon denovan. Sur la sojlo de la interna kamero de la koro, la sanktejo de adoro vera, mi paŭzas.

Generated on 2019-12-29 00:47 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

ĈAPITRO III

ADORO

NIA maniero de diservo estas la natura (kaj, ŝajnas al mi, eĉ la neevitebla) sekvo de vivanta kredo je la realeco de Dia inspiro—je efektiva, nuna kaj plena komunikiĝo inter la homa spirito kaj Tiu, kiu estas la Patro de spiritoj. Kiu, vere atendanta aŭdi la voĉon de Dio, povas fari alie ol silente kliniĝi antaŭ li ?

"Adori Dion," diras Episkopo Butler en unu sia prediko,* "estas sin retiri for de la mondo kiun li faris, al li sola ; ĝi estas forlasi la okupojn sentajn, *sin cedi al la influoj de la Dia apudesto*, kaj lasi plenan liberon al dankemo, amo, respektego, fido, kaj dependo ; kies natura kaj sole adekvata objekto estas senlima Potenco, Saĝo, kaj Bono." Neniaj vortoj povus esprimi pli plene aŭ inde la celon de Amika kunveno—de unu el tiuj "religiaj kunvenoj" kiuj, laŭ ĝenerala scio, okazas "sur bazo de silento," sed en kiuj estas libereco por kion ajn la Dia influo inspiros da voĉa preĝo, prediko, atesto aŭ

* Prediko xiv, "Pri la Diamo." (*Butler's Sermons*, p. 278. London, 1726). Kaj en sia epistolo al la pastraro de Durham, publikigita kun la "Analogio" (London, 1802), li ripetas la vortojn kiujn mi supre kursivigis, kaj parolas pri publika diservo kiel "tempo de adoro, kiam oni kunvenas por sin cedi al la plena influo de la Dia apudesto."

Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

profetado: kunvenoj ĉe kiuj, oni sentas, ĉiu devus komence eniri la plej internan sanktejon de la propra koro, kaj esti sola kun Dio; estante kvieta, por klare aŭdi lian voĉon interne, ke la lipoj povu prave malfermiĝi por rakonti lian gloron aŭ liajn konsilojn al aliaj. El la profundoj de tiu kvieteco vortoj ja aŭdiĝas de tempo al tempo—vortoj leviĝintaj laŭ simpla obeo al la ŝpruco de la fonto interna. Jen kion ni nomas "esti movata de la Spirito," kaj mi ne povas trovi vortojn pli inde kaj vere esprimantajn la idealon de adoro spirita.

La mistera diverso enteksita en nia simileco, kaj apartenanta al la naturo komuna al ĉiu, malebligas, ke unu juĝu por alia pri kia maniero de diservo estos por li plej helpa. Mi ne scias kiagrade mia propra sento pri Amikaj kunvenoj estas idiosinkrazia. Mi ne pretendas aŭ sentas, kiel kelkaj fruaj Amikoj, ke ĉia antaŭarangô estas en si mem nepermesinda aŭ peka. Mi bone komprenas la vidpunkton de tiu, kiu kredas, ke en la majestaj kaj tempo-sanktigitaj vortoj de liturgio kia la anglikana troviĝas la plej ebla proksimiĝo al inda formo de komuna adoro. Mi eĉ povas kompreni, tamen malpli kunsente, la vidpunkton de tiu, kiu timas ke la paroloj de liaj nekleraj kunadorantoj ĝenos lian propran penadon atingi konvenan mensstaton. Sed kvankam mi estas preta konsenti, ke pro diversaj kialoj la ekstremo de simpleco kaj libereco trovebla en niaj kunvenoj eble ne estus helpa al ĉiu, kaj kvankam mi havas nenian deziron kaŝi la tro evidentan fakton ke tre ofte ni malatingas nian idealon, mi devas tamen konfesi mian propran konvinkon, ke tiu idealo de komuna diservo estas la plej pura iam konita, kaj ankaŭ ke ĝi estas praktike identa kun tiu, kiu ŝajne akceptiĝis en la tagoj apostolaj. Mi kredas plie, ke

Generated on 2019-12-29 00:47 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

ekzistas multaj, precipe nuntempe, por kiuj ĝi estas la sola maniero de diservo ankoraŭ ebla en la praktiko, pro tio, ke estas en ĝi nenio polemikebla, aŭ konscienconimplika. Mi jam rakontis (p. 3), kiel nedireble ĝi malŝarĝis mian animon en tempo kiam (kiel kiom aliajn nuntempe!) turmentis min duboj pri la honesteco proprigi por mia uzo vortojn, kiom ajn belajn, tiel multe kaj grave dubindajn. Mi sentis bezonon, ke en diservejo mi trovu ne freŝan renkonton kun duboj kaj polemikado, sed rifuĝejon, aŭ almenaŭ pordon al rifuĝejo, for de ili. Tamen, ŝajnis al mi neeble, ke iu turmentita de la konfliktaj instruoj per kiuj nun "svarmas la aero" povu forgesi polemikon, aŭskultante lingvaĵon kia tiu de la "Libro de Komuna Preĝo."* Ŝajnas, ke nur silento povas kuraci la vundojn kiujn faras disputoj en la regiono de la nevidata.

Nenia ekstera helpilo, almenaŭ, iam estis miasperte tiom plene efika kiom la kutimo partopreni en publika diservo bazita sur silento. Komence, ĝi allogis min per tio, ke ĝi neniel min ligis, kaj ke ĝi lasis min tute libera serĉi helpon propramaniere. Sed post nelonge mi komencis konscii, ke la kunaj kaj longaj silentoj havas efikon multe pli rektan kaj potencan. Ili baldaŭ influis sur mian animon en direkto strange rega kaj sereniga. Ordinare, post iom da tempo, dum ni kune sidis kaj atendis—kion?—venis al mi profunda sento de soleneco. Korfunde mi sciis, en Kies nomo ni kunvenis, kaj Kiu estas vere en mezo de ni. Neniam antaŭe mi tiom potence sentis lian influon, kiom en tiuj kvietaj kunsidoj.

Plie, la praktikon silente atendi la nevidatan Apudeston

* Oficiala anglikana preĝaro kaj ordo de diservo. *N.d.l.t.*

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

mi trovis animpretigilo aparte efika por akcepto de vortoj eble parolotaj "en la nomo de disĉiplo." La paroloj ja ofte estis senfortaj, kaj ĉiam maladekvataj—rilate iajn aferojn ja ne povas esti alie—iafoje eĉ tute ne tuŝantaj miajn proprajn bezonojn, kvankam alifoje tre impresaj kaj helpaj; sed, sekvinte la longajn silentojn kiuj falis kiel roso sur soifan teron, ili iris pli profunden, kaj riceviĝis en multe malpli dorna regiono ol iam antaŭe la vortoj venintaj el pastra katedro.

En Amikaj kunvenoj, plie, la fakto ke ĉiu liberas paroli, el paroloj tre diversaj aŭdigas harmoniojn kaj interrespondojn, kiajn oni apenaŭ povas renkonti aliloke. Ĝi estas iafoje kvazaŭ partkantado kompare kun unisono. La libera permeso de ministrado virina, kompreneble, tre riĉigas la harmonion. Mi ofte min demandis ĉu kelkaj el la patrinecaj admonoj kiujn mi aŭskultis en nia kunveno ne trafus iujn korojn eble fermitajn kontraŭ predikanto vira.

Sed la graveco de silento, laŭ kvakera opinio, kuŝas ne nur en ĝia momenta efiko kiel helpilo al publika diservo. La silento valora por ni ne estas la nura ekstera silento de la lipoj. Ĝi estas profunda kvieteco kora kaj mensa, flankenmeto de ĉia distreco pri pasaĵoj—jes, eĉ pri la propraj pensoj; insista fikso de la atento al la senŝanĝa kaj eterna. Ĉi tiu "silento de ĉiu karno" ŝajnas al ni necesa preparilo por adoro vera. Ĝi estas, ni kredas, la ĉiama kaj esenca kondiĉo por la interna lumiĝo. "Staru kviete en la lumo," George Fox diras kaj rediras; kaj poste venas forto—kaj paco kaj venko kaj liberiĝo, kaj ĉiu alia bono. "Kvietiĝu, kaj sciu, ke mi estas Dio." La sperto, mi kredas, de ĉiu plej profunde konscianta Diajn rivelojn de si mem, estas, ke ili fariĝas aparte al la

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:47 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

animo "atendanta"—al la spirito kiu plej profunde konscias sian senpovecon fari pli ol silente atendi antaŭ Li. Nur tre malprecize povas vortoj prezenti la eblaĵojn de interna silento. La klarecon de interna vidado kiun ĝi kelkafoje rezultigas oni plene komprenas nur sperte; la aferoj rivelitaj al tiu vido estas pli viveblaj ol paroleblaj. Sed ke persista penado flankenmeti ĉian distran influon, kaj lasi formorti ĉian vibron eksteran, estas grava, se ne esenca, sinpreparo por la akcepto de eterna vero, ŝajnas fakto nedisputebla. La kvieteco ja ĉiam profitas. Eĉ la malpleja "mistikulo" sendube konfesus, ke mastri la propran spiriton, kaj akiri la povon proklami almenaŭ tempan pacon interne, estas racia kaj sana ekzerco de sinregado.

Miapense, rimarkinda atesto al la profunda vero de la kvakera idealo estas la fakto, ke ĝi estas aplikebla al tiom diversaj gradoj de spiriteco. Tiu "interna silento," kiu por la mistikulo estas pordo al la nedireblo, la diafana sereno de spegulo reflektonta la ĉielogloron, aprobiĝas ankaŭ de la plej senceda racionalisto, kiel la komenco de animfirmeco. Kaj la sperto de kelkaj el ni (kiujn mi eble povas nomi raciaj mistikuloj) pruvas la grandan valoron de la kutimo serĉi al interna silento kiel reala vivdisciplino. Ne nur en la horoj speciale difinitaj por diservo—kvankam, ĉu oni estas sola aŭ kun aliaj, la voĉo de preĝo kaj laŭdo fontas plej profunde el la kvieto tiama—sed ankaŭ en la ĉiutaga batalado de la Kristana vivo, en ĝojo aŭ malĝojo, tento aŭ perplekso, la unua kondiĉo kaj la plejalta rekompenco de venko estas egalanimeco. "Ne multe maltrankviliĝu"; "ne incitiĝu, ke vi ne faru malbonon." Ne estas bezone multigi saĝulajn parolojn pri la temo. Ni ĉiuj—ĉu ne?—trairis tempojn

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:48 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

kiam "li ne malfermis la lipojn" esprimas la solan sintenon ebla por tiu, kiu celas finan venkon. Decideco kaj silento preskaŭ ŝajnas diversaj aspektoj de la sama afero. La silento ja estas arto akirenda, sed ĝi fariĝas la instinkta moro kaj nepra helpo de la animo nur post daŭra praktikado. La saĝaj Romkatolikaj instruistoj preskribas ĝian disciplinon por tiu, kiu deziras lerni "perfektecon." La Amikoj rekomendas ĝin pli ekzemple ol parole, kvankam en iliaj skriboj ekzistas abunda atesto al ĝia graveco. Kaj rilate la praktikajn rezultojn de nia diservmaniero, mi certe konstatas, ke por mi mem, la kutimo partopreni en adoro "bazita sur silento" multe faciligas la praktikadon de trankvila vivo.

La rilato inter nia praktiko de silento kaj nia kredo je inspiro estas, mi pensas, evidenta. Kiel aŭskulti, se oni ne ĉesas paroli? Kiel ricevi dum agado senhalta? Estas klare, ke por povo servi kiel iloj de Didonita parolo, necesas "saĝa pasiveco."

Pri la vortoj kutime cititaj rilate nian temon—"movataj de la Sankta Spirito"—ofte renkontiĝas plej strangaj miskomprenoj. Oni imagas, ke la Amikoj pretendas posedi kvazaŭan miraklan donon—ion tiom nekompreneblan por la ordinara prudento kiom la fremdlingva parolo de la Irvinganoj. Preta korektiĝi, kaj kun sento ke la temo tuŝas nesondeblajn profundojn, mi dirus, ke tio estas plena eraro. Kion Amikoj sendube kredas, estas, ke al la aŭskultanta koro Dio ja parolas kompreneble; kaj plie, ke al kelkaj el liaj adorantoj doniĝis aparta povo ricevi, kaj vorte transdoni, efektivajn mesaĝojn de li mem. Kio estas tio, krom la necesa sekvo de la kredo ne nur, ke reala komunikiĝo

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:47 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

kun Li estas eblaĵo, sed ankaŭ, ke ĉiu povas ĝin sperti ?

Ni ne supozas, ke la havantaj la donacon de " ministrado " estas neeraripovaj, aŭ necese pli proksimaj Dion ol multaj el la adorantoj silentaj kiuj formas la grandan plimulton en ĉiu kunveno. Ni sentas, ke la talento estas de supre, kaj ke sur ĉiu individuo kuŝas la respondeco esti malferma al ĝi ; preta ĝin akcepti se donita, kaj ĝin uzi fidele dum li posedas ĝin. Sed ni plene konsentas, ke por tion fari necesas ĉiama submetiĝo de volo, kaj senĉesa viglado. Ni scias, ke " sin teni al la talento " ne estas facile, kaj ke la okulsimpleco kiu sola ebligas distingi inter la supera gvido de la Dia Spirito kaj la nuraj instigoj de la propra koro, ne atingiĝas sen multa pacienco, kaj diligenta kaj persista uzo de ĉiu lernrimedo disponebla. Ni konfesas la valoron eĉ de korektoj venintaj per aliulaj lipoj. Kvankam la servanto estas responda nur al sia Mastro, kaj ni fervore deziras nin gardi ĉe tiaj aferoj kontraŭ dependo unu de alia, tamen (kiel mi jam diris) oni juĝis bone ke kelkaj Amikoj estu aparte difinitaj observi la ministrojn ĉe la uzo de ilia talento. La " pliaĝuloj," al kiuj ĉi tiu ofico komisiiĝas, efektive proponas ne nur kuraĝigon kaj konsilon, sed iafoje admonon kaj eĉ mallaŭdon, kiam ili kredas tion bezonata. Estas do klare, ke la Societo ĉiam kredis kun la Apostolo Paŭlo, ke " la spiritoj de la profetoj estas submetataj al la profetoj." La granda zorgo kaj singardemo montrata ĉe ĉiu Societa aranĝo rilate ministradon atestas ĝian komprenon de la profunda vero, ke ju pli valoras la trezoro, des pli gravaj la riskoj al kiuj ĝiaj argilaj ujoj elmetiĝas.

Oni ofte demandas, " Kiel distingi inter mesaĝoj de

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

supre kaj la sufloroj de la propra imago ? "* La sola respondo donebla al ĉi tiu demando estas, ke por fari tion en la praktiko oni ja bezonas ĉiom de la ĉiela saĝo kaj humila korsincero, kiun oni kapablas. Por tiu, kiu kredas, ke Dio ekzistas, kaj ke oni devas adori lin laŭ spirito kaj vero, adoro estas la plej alta funkcio de la homa spirito. Atingi tian diafanecon de koro kaj menso, ke oni povas servi kiel pero por la adoro de aliaj, kaj por la Dia respondo al tiu adoro—esti kvazaŭ ŝtupetaro sur kiu la anĝeloj de Dio povas supren- kaj malsupreniri en la diservejo—jen celo kiu superas ĉian kapablon nure homan. Por tio, necesas esti konstante renovigita de Tiu, kiu estas lumo—" la vojo kaj la vero kaj la vivo." Sed kiu, sin nomanta kredanto je li, povas dubi, ke tia renoviĝo estas ricevebla ?

Mi povas kompreni tiun, kiu kredas ĉian adoron senutila, aŭ eĉ malutila; mi ne povas kompreni tiun, kiu opinias, ke estas eble adori akcepteble sen la helpo de la Spirito Mem propetanta por ni kaj

* Ĉi rilate, mi pensas ke estas grave diferencigi inter la demando " Kiel vi distingas praktike inter mesaĝoj vera kaj falsa ? " kaj la tute aparta demando, " Kiel vi distingas teorie inter la homa imago-kapablo kaj la Dia ago kiun prezentas la vorto " inspiro ? " Sole la unuan demandon mi supre traktas, ĉar ĝi estas, mi kredas, la sola demando kontraŭ kiu la honesteco postulas lukton. Por povi plene respondi al la dua, oni bezonus psikologian lertecon kiun mi neniel pretendas; kaj mi dubas ĉu la terminoj mem de la demando ne kondukas ekster la regionon eĉ de la psikologio. Sed, parolante populare kaj fide, mi respondus, ke nia koncerno ne estas difini la precizajn limojn de Dia kaj homa, sed malfermi la plej profundajn homajn povojn al la plej puraj Diinfluoj; ke la rezulto kiun ni atendas estas la frukto de pia inteligento unue purigita, kaj poste regata, de la senpera agado de Dia povo. Kaj, demandante pri la preciza linio ĉe kiu distingo malaperas, ĉu efektive oni ne uzas terminojn inter si iom kontraŭdirajn ?

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

kun ni kaj en ni, aŭ ke Lia helpo mankos al iu ajn sincera adoranto. Tamen, se ni vere kredas ke tiu helpo doniĝos, ĉu ni ne atendas "esti movataj de la Spirito"? Ĉu la atendo estas propra al nur unu aro da Kristanoj? Ja ne. Kio *estas* propra al ni Amikoj estas la timo limigi aŭ malhelpi la senperan influon de la Dia Spirito per uzo de fiksitaj formuloj, kaj per eksteraj observoj aŭ ajna premo.

Kiel mi jam diris, mi ne sentas, ke la nia estas la sola prava maniero de diservo; mi eĉ ne insistas, ke por ĉiu homo, kaj je ĉiu tempo, ĝi estus la plej helpa. Sed mi ja kredas ĝin la plej pura konceptebla. Mi ĵaluzas pri ĝi, ke ĝi konserviĝu pura, sen almikso de eksteraj "helpiloj al adoro." Mi kredas, ke pro sia absoluta libereco kaj fleksebleco, sia senrivala simpleco kaj seriozeco, ĝi estas "ujo por honoro" aparte taŭga porti la puran akvon de vivo al la multaj, kiuj en la nuna tempo sin trovas per dubindaj aldonoj al la esenco de Diadoro malhelpataj kontentigi sian animsoifon.

Mi scias, ke en kvakeraj kunvenoj, kiel aliloke, oni povas renkonti multe da homa malforteco kaj neperfekteco; oni povas aŭdi multajn aferojn ĝenaj por la korpo —jes, kaj eble ankaŭ por la spirito. Sendube aŭdiĝas tie multo kritikebla de intelekta aŭ de literatura vidpunkto. Neniu vizitu kvakeran kunvenon kun atendo trovi ĉion lau sia plaĉo. Tamen, eĉ la nura sento pri gusto nepre konsentus la valoron de ia graveco kaj simpleco, kiu ofte karakterizas ilin, kaj kiu venas, sendube de la kutima praktikado de interna silento. Tio, tamen, estas punkto pri kiu volus insisti neniu konscianta la veran signifon de kunvenoj tiaj. La kritikemo forvelkas honte antaŭ tio, kion oni sentas provo vera, kiom ajn balbuta, al efektiva

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:48 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

komunikiĝo kun la Patro de Spiritoj, kaj unu kun la aliaj, kiel en lia apudesto, kaj lianome. La viva parolo de iu peteganta por si mem kaj siaj amatoj per vortoj rekte el la koro, ŝajnas al mi senlime pli potenca kaj patosa, ol la plej perfekta esprimo de adoro legata aŭ deklamata laŭ preskribita ordo.*

Grava apartaĵo de niaj kunvenoj estas, ke la respondecon pri ilia karaktero partoprenas ĉiu. Mi ja ne diras, ke ĉiu ano vive sentas sian respondecon. Ofte, sendube, la ministrado tro lasiĝas al unu aŭ pluraj volontaj parolantoj. Sed mi kredas, ke ĉe Amikoj ne povas ekzisti io kia la sento de dependo je unu individuo, kiu ŝajne nature rezultas el la ideo pri pastra rango. Ĉiuokaze, konstante prezentiĝas al ni la idealo de aro da homoj kunvenintaj sur komuna nivelo, ĉiu libera kaj kuraĝigita kontribui sian individuan eron de laŭdo kaj preĝo, silente aŭ parole. Ĉe Amikoj la penso estas ofta, ke en religia kunveno "neniu atendu manĝi panon en senlaboreco." Kaj la moro tiom kutima ĉe ni, ke ministrantaj Amikoj vojaĝu de kunveno al kunveno "uzante sian talenton," malhelpas la tendencon al rutineco, kaj vivigas la senton de ĉies libereco partopreni kiam kaj kie ajn doniĝas vorto.

La foresto de antaŭaranĝo ĉe niaj kunvenoj havas

* Oni ofte diris al mi, "Se vi deziras la silenton, kial ne silenti restante hejme?" Tio apenaŭ ŝajnas bezoni respondon, tamen mi aŭdis ĝin tiom ofte, ke mi ne povas ĝin ignori. Apenaŭ, mi pensas, estas bezone rimarkigi, ke ĝi egale trafus la kutimon kunveni por kune diri preĝojn, kiujn, tial ke ili estas laŭ la kalendaro jam elektitaj kaj presitaj, ĉiu povus legi hejme. Sed pli inde estus respondi, ke ĉu nia parolo estas antaŭaranĝita aŭ spontana, ni kunvenas por ardigi unu en alia la flamon de vera adoro, kaj por elmontri nian lojalecon al la Majstro, en kiu ni tiom unuiĝis, ke ni sentas bezonon de reciproka kunsento ĉe alproksimiĝo al li.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

alian sekvon, kiun mi ne volus tute preterlasi. Tio estas, ke nenia distro troviĝas, per kiu oni povas dubi, ĉu oni efektive adoras aŭ ne. Liturgio aŭ himno ofte povas esti esprimilo de malpreciza duonformita tendenco al adoro; kaj mi ne kuraĝas nei, ke ĝi povas iafoje "blovi la fajreron ĝisflame," aŭ malhelpi ke fumanta meĉo tute estingiĝu. Sed ja ŝajnas al mi, ke ĝi ankaŭ malhelpas konscion pri la propra seneco, kaj sufokas multe da individuaj krioj por helpo kiujn tiu konscio eble naskus. Ĉiaokaze, eĉ se kunveno silenta ne helpas, ĝi kredeble povas fari nenion pli malbonan, ol fari nenion. Apenaŭ ŝajnas eble, ke ĝi supozigu al iu false, ke li adoris Dion. Sed ĉi tie mi konscias, ke mi paŝas apud la danĝera tero de idiosinkrazio, kaj mi ne deziras insisti pri la punkto.

Ĝis nun mi parolis pri niaj kunvenoj por adoro publika. Sed, kiel Amikoj ŝatas diri, adoro ne komenciĝas kiam oni sidiĝas en niaj kunvenoj, nek finiĝas kiam oni lasas ilin. La adoro laŭ spirito kaj vero neniel limiĝas per tempo kaj spaco. Tiu sama ideo, ke oni atendas "en la silento de ĉiu karno" por aŭdi la voĉon de la Sinjoro paroli interne de ni, karakterizas ankaŭ niajn horojn de adoro privata, aŭ—laŭ la pli singarda esprimo—de "religia soleco." (La Amikoj tiom forte sentas, ke oni ne povas fari akcepteblan preĝon difinitahore kaj propravole, ke kie aliaj parolas pri familia preĝado, kaj horoj por preĝo aŭ adoro, ili preferas la esprimojn "familia legado," kaj "religia soleco" aŭ "religia sinretiro.")

Kaj ne nur nome, sed ankaŭ praktike, ĉi tiuj horoj havas la saman apartan karakteron kiel niaj kunvenoj publikaj. Ĉe Amikaj familioj de la malnova tipo (ankoraŭ, mi

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

kredas, pli oftaj ol kutime supozite), la familia kunveno konsistas simple el la legado de partaĵo el la Skribo, sekvata de silenta paŭzo, rompita aŭ ne per vortoj de preĝo aŭ de atesto. Multaj Amikoj en antaŭa tempo (kiel kelkaj, mi kredas, ankoraŭ nun) pro konsciencaj motivoj ne volis ke iliaj infanoj uzadu ajnan formulon de preĝo, eĉ la Patro-Nian. De la komenco la infanoj partoprenis la kunan silenton de la familio, kaj ne povis ne kompreni ĝian signifon. En kelkaj familioj la silento malofte aŭ neniam rompiĝis de preĝo voĉa. Silenta paŭzo antaŭ manĝo estas la kvakera ekvivalento por "benpeto"—kaj ŝajnas al mi, ke multo estas direbla por tiu moro. Kompreneble, ĉi tio ankaŭ estas okazo por vortoj, se vortoj propramove leviĝas al la lipoj de ajna ĉeestanto.

En la plejinternan kameron de adoro privata, la homa okulo ne povas enrigardi. Neniu povas esplori aŭ prijuĝi la praktikon de aliaj tiurilate; ja ŝajnas profane eĉ pense akompani ilin en tiun sanktan regionon. Tie ne gravas la diferencoj sektaj. Sed pro tiu kialo mem, mi povas kun pli plena konfido alvoki al la kunsento de ĉiu, kiu preĝas, ĉe la provo (de kiu mi ne povas min deteni) klarigi kiel okazas, ke kredo al nuna inspiro ŝajnas al mi neapartigebla de kredo al la ebleco kaj la praveco de preĝo.

Mi esperas, ke oni ne supozos, ke pro trosinfido mi tuŝas ĉi tiun temon. Multajn el la kvalifikoj por tio mi ne posedas. Sed rilate aferojn kun komuna kaj urĝa intereso, la foresto mem de distinga kapablo aŭ de scio povas doni ian valoron al la rezultoj de efektiva persona sperto, malpliigante la distancon trans kiu la helpa mano devas etendiĝi.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Mi kredas, ke la daŭra efiko por bono aŭ por malbono de la nuntempa skuiĝo kaj ondegado de penso plejparte determiniĝos laŭ sia rilato al preĝado. Nenia tuja rezulto de la elbolo de libera diskutado dum la lastaj kvindek jaroj pri ĉio ĉiela kaj tera estis tiom doloriga al piaj homoj, nek tiom grave minaca al anima sano, kiom la paralizo kiun ĝi multokaze venigis sur la preĝan spiriton. Ĉiutage oni renkontas rektan neadon pri la racieco de preĝo—pri la ebleco de efektiva komunikiĝo kun Dio. Kredeble ekzistas malmultaj, kiujn neniel influis paralize la diluvo da nesolvitaj, kaj ŝajne nesolveblaj moralaj problemoj, kaj samtempe da novaj kaj absorbe interesaj vidoj en materialajn aferojn, en kiun ĵetiĝis nia generacio. La nura postulo al la atento sufiĉas alidirektigi multon el la cerba povo antaŭe okupita per la serĉado al Dio.

> Ja ŝajnas lia nova vol', ke ni
> Ne tiom lin pripensu, kiom agu;
> Kaj el la mondo faru la plejbonon
> Laŭ nia pov',

skribis A. H. Clough, kaj la sento kiun li voĉas certe havas tre vastan akcepton. Eĉ la amo al la vero vokas, ke oni sekvu laŭ riveretoj ŝajne kondukantaj for de la Fonto de vero. Tamen, la serĉado al scienca vero sialoke efektive kontribuas al scio pri Dio, kvankam la serĉantoj nur tro facile povas perdi vidon al li pro absorbiĝo en rigardado al liaj faroj.

Sed la tendenco silentigi preĝon ne estas nur nerekta. Ŝajne la ideo kiu nuntempe plej forte impresis la vulgaran imagon, estas tiu de la universala kaj nedepetebla rego de leĝaro senŝanĝa. Kaj la konkludo facile sekvas: "Do, senutile estas preĝi." El tio rezultas terura silento

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

—spirita, se ne lipa. Homoj eksentas sin solaj laŭ nova kaj timiga senco—solaj kvazaŭ en la valo de sekaj ostoj, sen atendo ke Dia spiro starigos ilin, unuigita armeo de vivantaj servantoj al la vivanta Dio.

Mi esperas, ke oni ne suspektos ĉe mi intencon lukti kontraŭ la problemo de libera volo kaj neceso. Mi scias almenaŭ sufiĉe por konscii, ke fine de ĉiu aleo de homa penso staras mistero nepenetrebla. Sed mi scias ankaŭ, ke la regiono en kiu la filozofoj disputas pri la problemo de neceso kuŝas malproksime ekster la kampo de la praktikaj demandoj kiujn mi traktas. Mi scias, ke tiu polemiko ne atingis finon, kaj, kiom oni povas juĝi, ne eĉ proksimiĝas al fino; tamen mi scias ankaŭ, ke nenia interkonsento de filozofoj pri la plej ĝusta maniero priskribi faktojn povas aliigi la faktojn mem. Mi ne supozas, ke mi parolos laŭ filozofia ĝusteco; sed mi povas paroli, kaj parolos, simple kaj vere pri mia propra sperto rilate la preĝadon.

Tempo estis, kiam min mem silentigis la paralizaj influoj kiujn mi aludis—kiam la ĉielo aspektis kupre, kaj ŝajnis, ke ĉia peto estus barakto kontraŭ vasta jamdeciditaĵo, kvazaŭ papilieto sin frakasanta kontraŭ glacimonton. Sed mi komprenas nun, ke la vero kontraŭ kiu, por tiel diri, mi faletis en la mallumo, ne estis, ke la preĝado mem estas neracia, sed ke mia koncepto pri ĝi estis malinda.

Ke la volo de Dio ne ŝanĝiĝas (laŭ la senco ke ĝi estas absolute konforma al si), ja estas la fundamento mem de racia fido je li; kaj tion konsentas sanktuloj kaj filozofoj egale. La imago facile maldistingas inter senŝanĝeco kaj senmoveco; tamen, la leĝoj movaj estas fiksaj kiom la spacaj. Kio povas esti pli movplena ol flamoj?

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Tamen, laŭ naturo ili ne ŝanĝiĝas pli ol fera bloko. Fidante al la senŝanĝaj proprecoj de materio oni povas tute aliigi la aspekton de la tero. Kaj ĉu oni ne devus memori, ke la senŝanĝa ordo obeata de ĉio—videbla kaj nevidebla—enhavas ĉiun misteran movon de la menso, la nekonatajn fontojn de ĉiama "variado," kaj la plej nesondeblan el ĉiuj misteroj—la vivon mem?

Ŝajnas al mi, ke kiam la imago ĉion rigidigas, tio estas nur trompo. La kompetentaj klarigi la teorion pri neceso fervoras montri, ke neniel ĝi kontraŭas la efikecon de penado en kiu ajn direkto. Necesas ilia fervoro, ĉar nur tro prete la imago trovas pretekston levi la flagon de malespero, kaj la volo forlasi la barakton de la vivo, por fali en la dormon de apatio.

Se estas prave pensi pri Dio kiel la Fonto de vivo kaj penso, la Patro de spiritoj—kaj al neantoj tion estas senutile ke mi turnu min—ĉu ŝajnas neracie, ke la spiritoj kiujn li kreis provu komunikiĝi kun li? Sed neraciaj ofte ja estas la naturo de niaj petoj, kaj nia koncepto pri la ebleco de ilia plenumiĝo. Jen estas, kie mi devas konfesi la senindecon de multaj el miaj propraj pensoj kaj diroj pri preĝo, kaj kie mi ofte renkontas tion kio ŝajnas al mi netaŭga kaj neadekvata ĉe la vortoj de aliaj. Ne povas esti sengrave provi forkribri el siaj pensoj kaj vortoj pri la temo tion, kio estas neteninda kaj malkonvena.

Du aferoj, mi kredas, pli ol aliaj tendencas degradi la koncepton pri preĝo, ĝis, ĉe animoj kie ĝi estas nur teorio, ĝi frakasiĝas kontraŭ la malmolaj faktoj de scienco. Oni limigas ĝin je petado ricevi aferojn, kaj oni pensas pri ĝi plejparte kiel rimedo ilin akiri.

Sed tio certe estas malalta koncepto pri preĝo, eĉ

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

kvankam la petoj estas por benoj tiel-nomataj " spiritaj." La vorto " preĝo," mi konsentas, povas esti uzata en la limigita senco de petfaro; sed oni klare komprenu kaj memoru, ke tio estas nur parto—la parto malplej alta kaj esenca—de adoro, aŭ komunio kun Dio. Nur laŭ la pli larĝa senco—ne peto, sed komunio—oni povas prave kaj saĝe nomi preĝadon la efektiva spiro de spirita vivo, la povo kiu aliformigas la vivon, tio por kiu ĉio estas ebla. Sed tiu distingo inter peto kaj komunio ordinare *ne* estas daŭre memorata de tiuj, kiuj verkas kaj parolas pri preĝo, aŭ eĉ de ĉiu, kiu ĝin praktikas. Ŝajnas al mi, kvazaŭ multaj eĉ profunde spertaj Kristanoj uzas sian energion por kuraĝigi kaj stimuli ĝuste tiun parton de preĝo kiu havas en si plejmulte da nure homa kaj karna, anstataŭ por elmontri tiun pli noblan parton, al kiu la alia devus esti nur la natura antaŭaĵo. Se, kiel oni konstante devas, oni sin turnas al la principo de nia Sinjoro, kiu uzis la homan rilaton de patro kaj infano kiel la plej altan kaj instruan tipon de la rilato inter Dio kaj la homa animo, oni sendube sentos, ke infano, lernante paroli al sia patro kaj kompreni lian voĉon, havas aspirojn kaj celojn tre alispecajn kaj multe pli grandajn ol la nura akiro de donacoj. La homa patro ja povas utiligi la senkulpajn kaj naturajn dezirojn de la infano kiel rimedon altiri ĝian atenton, sed li multe ĉagreniĝus se la infano neniam rigardus preter la profitojn akireblajn per la povo paroli al li—neniam leviĝus ĝis la konscio, ke interkomunikiĝo kun li estas mem la plej granda el homaj ĝojoj—ne nur rimedo trafi celon.

Kaj simile mi sentas, ke insistante pri "la efikeco de preĝo," oni insistas pri ĝia malplej alta flanko, kaj ke la koncentrigo de atento al ĉi tiu malplej alta flanko

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

kreas gravan falpuŝilon, kiu dumaniere malhelpas la fidon.

1. Ĝi sugestas *provilon* kiu ne estas, kaj ne povas esti, ĉiam kontentiga. Kioma ajn la povo de preĝo—kaj vortoj, mi kredas, neniel povus ĝin plene esprimi—estas certe, ke apartaj petoj ne ĉiam plenumiĝas. Nia Sinjoro klare nin preparas por la rifuzo de blindaj petoj, kaj la ordinara prudento kaj la ĉiutaga sperto abunde evidentigas, ke multaj petoj estas, kaj necese ĉiam estos, neplenumitaj.

2. Kaj plie, mi kredas, ke en ĉiu koro kapabla je vera preĝo ekzistas sufiĉe da nobleco mallogi ĝin de la ideo preĝi nur kun la celo akiri profiton, ĝi estu kia ajn. Mi kredas, alivorte, ke la moderna perpleksiteco pri preĝo fontas ne nur el la malfacilo imagi Dion influebla de niaj deziroj, sed grandaparte ankaŭ el subkuŝanta sento, ke tio, eĉ se fakte vera, estas tre neadekvata koncepto pri Tiu, al kiu nia adoro devus direktiĝi, kaj kiu ja scias pli bone ol ni kion ni bezonas—mallonge, ĝi rezultas el resalto for de la malalta kaj neinda nivelo de multo dirata pri la temo.

Pro tio mi opinias, ke en la fino la fido gajnos nemezureble el la moderna nekaŝemo rilate la malfacilaĵojn de la temo. Rigardate kiel provo eldevigi donacojn el nia ĉiela Patro per nura trudpetado, la preĝado trafos multajn malsukcesojn, kaj tre bezonas ilian purigan disciplinon. Preĝo ne estas preĝo reala—tio estas, ĝi ne estas vera komunio kun Dio—ĝis ĝi leviĝas super la regionon de la propraj deziroj al la nivelo "ne kiel mi volas, sed kiel vi volas."

La multepetado, estas vere, povas veki atenton de nevolonta aŭ dormema orelo homa. Nia Sinjoro mem

Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

nin memorigas pri tio mallaŭde de la senfervoreco kiu senkuraĝiĝas per atendo. Sed la orelo de la Patro ĉiam estas malferma por niaj preĝoj. Ni ne povas kredi, ke multepetado estas necesa por veki lian atenton. La baro, kiam li rifuzas niajn petojn, aŭ prokrastas ilin plenumi, certe estas tre alispeca. Tiu, kiu konfesas, ke Dio ĉiam aŭdas, kaj ke en ĉiu okazo lia voĉo estas aŭdebla responde, devas konfesi ankaŭ, ke severa disciplino estas parto de lia respondo tiel vere, kiel dorlota indulgo. Ambaŭ estas bonvenaj por la infaneca koro; ĉiu estas parto de la lingvo kies interpreton oni devas pacience lerni.

Sed sekvas la demando, "Kio povas konvinki pri aŭskultiĝo, se la respondo estas ĉio egale? Se respondon oni devas serĉi en la tuta irado de aferoj, kaj se tiu irado egale ofte kontraŭas kiom konformas al la peto, kio pravigas la aserton, ke preĝado respondiĝas?"

Kaj laŭ mia penso, en la respondo al ĉi tiu demando, "Kio do naskas racian konvinkon pri aŭskultiĝo?" implikiĝas tiu kompreno pri inspiro, kiun la Amikoj, pli akcente ol aliaj Kristanoj, ĉiam konfesis kaj laŭagis. Sed se mi provas ĝin respondi, oni zorge memoru, ke mi donas nur la rezulton—kia ĝi estas—de mia persona medito, kaj ne entreprenas formuli oficialan kvakeran doktrinon.* Malfacilaĵoj, kvankam kredeble esence

* Efektive, en la sekvontaĵo troviĝas nenia "doktrino"; nenia provo, tio estas, prezenti formulitan aŭ rajtigitan instruon. Mi penas montri kiel, laŭ mia propra sperto, la intelektaj malfacilaĵoj de la temo, honeste kaj pacience frontite, montriĝas rimedo ne estingi, sed purigi, tiun veran preĝospiriton, kiu estas la spiro mem de la interna vivo. Mi esperas, ke neniu miskomprenos mian malkaŝecon esprimi ilin. Ili estas, kaj ja devas esti, senrezerve konfesitaj. Ni havas ateston farendan pri la Aŭtoro de spirita adoro, kaj se ni rifuzas ilin fronti, nia

Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

samaj de generacio al generacio, venas antaŭ ĉiun generacion en nova formo, kaj devas solviĝi per individua sperto.

Tio, kio donas racian konvinkon, ke preĝado respondiĝas, sendube estas la konscio pri Dia gvido, jam traktita en la lasta ĉapitro. La bazoj de ĝenerala kredo je Dio kiel la Patro de spiritoj estas tro profundaj kaj ampleksaj por esprimo per plumo mia. Kiel mi jam diris, mi hipotezas tian kredon kiel la fundamenton de ĉio, kion mi nun provas esprimi. Tio, kio ebligas ke la individua kredanto je li ekkonu lian voĉon, estas, kiel jam dirite, io kvazaŭ mantuŝo ĉe la brako—io rilatanta la vivon tiom persone kaj individue kaj signife, ke oni ne povas ne senti, ke "la fingro de Dio venis al ni."

Sed se, efektive, tiu estas la direkto en kiu serĉi respondojn al preĝo, la temo foriĝas el la regiono en kiu pozitiva pruvo estas ebla. La tuta polemiko, do, rilatas la interpreton de tiaj personaj spertoj, kaj tiu interpreto necese rezultas el la naturo de la antaŭa kredo rilate verojn pli ĝeneralajn. Ĉiam estas eble por nekredanto je Dio nomi liajn signojn "nuraj koincidoj." Kaj ĉu estas malpli racie, ke la kredantoj je li estu ĉiam pretaj ekkoni ĉiun eĉ plej etan montron de lia volo? Rilate tion, kiel ĉion alian, sen mensa kaj kora preteco oni estas nekomprenema pri ĉiu signo, kiom ajn elokventa. Fakte la plenumo de peto ne ĉiam sentigas, ke oni ricevis personan komunikon de supre. Ricevinte post peto, ne malpli ol nericevinte, ni foje inkliniĝas demandi: "Sed ĉu nia

atesto maltrafos tiujn, kiuj plej forte ĝin bezonas. Denove mi deviĝas min turni al "io pli ol sincereco" en miaj legantoj por ĝusta kompreno de mia provo malvolvi pensojn, kies esprimon mi trovas malfacila ĝis ekstrema grado, sed kiujn mi tamen ne sentas liberon reteni.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

peto efektive havis ajnan rezulton ? Ĉu aferoj ne okazus tute same se ni ne estus preĝintaj ? " Jen demando, al kiu, vere, mi kredas ke oni devas esti kontenta (almenaŭ rilate ĉiun apartan kazon) resti sen respondo. Oni neniam povas certe scii, kio okazus se oni ne preĝus.

Tion diri, kompreneble, neniel estas nei, ke la preĝo faris diferencon realan kvankam nesciatan. Kontraŭe, ĝi preskaŭ estas pozitive aserti la agadon de influoj nesonditaj ĉar nesondeblaj. La plenan sekvon de ago, kiom ajn malgrava, oni ne povas mezuri ; sed moderna penso nepre tendencas montri, ke ĉiuj aferoj estas tiel interdependaj, ke ago sen rezulto estas preskaŭ nekonceptebla. La agmaniero de preĝo, tamen, ne estas sekvebla por homaj okuloj, kaj la deziro scii precize kian diferencon nia preĝo faras al la irado de aferoj estas, mi kredas, deziro neniam kontentigebla en la nuna mondo.

Tamen, povo ne precize mezurebla povas konstante sentiĝi, kaj la povo de preĝo estas ĉe kelkaj vivoj afero de sperto ĉiam nova, kvankam nekomunikebla. La atestaĵo de tiuj, kiuj povas danke kaj respektege diri, ke iliaj preĝoj respondiĝas laŭ maniero mirinda por ili, estas tro ofta kaj tro sankta por priinsisto. Oni povas vere diri, ke ĝia forto estas nemezurebla. Sed al observanto supraĵa aŭ ekstera ĝi nature estas iom vualita, kaj tial facile ignorebla. Plena konsidero montras, ke ĝi konsistas plejparte el kuniĝoj de cirkonstancoj neniel nekredeblaj en si mem. Ordinare oni pridubas ne la ĝustecon de la faktoj cititaj de tiuj, al kiuj preĝo estas realaĵo, sed la klarigon pri ili. Se mi estas prava, supozante ke oni ne povas scii la precizan rilaton de kaŭzo kaj

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

efiko inter preĝo kaj respondo, la malfacilo plene klarigi signifajn kuniĝojn de cirkonstancoj ne estas mirinda —ĝi nature rezultas el tio, ke oni celas ekster sia kapablo.

Kaj krom tio, ke la oceano kiun ni ennaĝas parolante pri respondo al nia preĝo necese estas nesondebla eĉ por ni, estas memorinde, ke ĉiu provo komuniki al aliaj la spertojn kiuj nature kaj prave plej forte impresas nin mem, havas malfacilaĵojn apartajn, kiuj, ignorate, fariĝas falpuŝiloj.

Unu malfacilaĵo tia estas la fakto, ke la eksteraj aferoj plej libere aludeblaj, kiujn oni povas sen malkonveno citi al aliaj, havas naturon pli-malpli publikan—ekzemple, la konserviĝo de vivoj karaj por ni, okazaĵoj politikaj aŭ naciaj, veterŝanĝiĝoj, kaj similaj—aferoj pri kiuj per nenia teorio estus racie atendi, ke ili okazu konforme al la voloj aŭ la preĝoj de unu individuo. Eĉ se io tia okazus laŭ miaj personaj deziroj kaj preĝoj, mi klare ne rajtus pretendi, ke ili okazigis ĝin. Se mi preĝas ke morgaŭ la suno leviĝu, mi ne bezonas multe da fido por kredi ke tio okazos; sed estus plene maldece pretendi, ke ĝi okazis "responde al miaj preĝoj." Kiam Reĝo Eduardo (tiam Princo de Kimrujo) resaniĝis de febro, laŭ multaj personoj estus malpie dubi, ke la multaj preĝoj faritaj por li estis la efektiva *kaŭzo* de lia resaniĝo. Ĉe aliaj restis kaj restos la konvinko, ke li egale estus resaniĝinta ĉiuokaze. Inter la du opinioj kiu povas aŭtoritate juĝi? Efektive ŝajnas al mi, ke ambaŭ estas arogantaj. Infano ofte devas esti kontenta akcepti la decidon de la gepatroj, sen kompreno de ĉiu ilia motivo (supoze ke oni efektive maltimus atribui motivojn al Dio).

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Rilate multajn aferojn (kiaj bataloj, vetero, kaj simile) kiuj necese favoras unu partion, kaj malfavoras la alian, nepre okazas, ke unuj petoj plenumiĝas, kaj aliaj ne. Kiu povas mezuri la rilaton inter peto kaj rezulto? aŭ montri la influon de preĝo ĉe tiaj aferoj pruvebla jese aŭ nee?

Sed ĉe la cirkonstancoj de la vivo individua, la afero estas tre malsama. Eĉ tie restas mistero; eĉ pri la propra vivo, oni scias nur neperfekte kaj fragmente. Tamen, estus hipokrite ŝajnigi, ke oni ne scias pli multe pri ĝi ol pri la universo. Oni ja *povas* en la propra vivo konstati rilaton inter siaj deziroj kaj ilia plenumiĝo, kian estus nur impertinente provi konstati, ekzemple, inter siaj deziroj kaj la historio de nacio. Se mi diras, "Mi preĝis por forto, kaj la peto doniĝis, ĉar mi ricevis ĝin," estas eble nomi min superstiĉa, sed oni ne povas akuzi min pri kruda malkonvenaĵo, kiel se mi dirus, "Mi preĝis ke la suno leviĝu, kaj mia peto plenumiĝis." Por respondo rajte nomebla tia, oni devas rigardi al sia persona sperto.

Sed ju pli intime io rilatas la personan sperton de unu, des pli ĝi foriĝas de la sfero de aliaj. La eroj de persona kaj individua sperto, pri kiuj oni povas plej libere paroli, preskaŭ necese estas supraĵaj. Kaj kvankam mi ne dubas, ke eĉ bagateloj estas parto de la Dia parolo al individuoj, ili ne tre konvenas por konvinki aliajn. Aliflanke, la personaj spertoj samtempe sufiĉe profundaj kaj individuaj esti la plej indaj preĝtemoj (laŭ la senco de aparta peto), kaj ricevi respondon per "providencaĵoj" aparte impresaj, preskaŭ ĉiam estas tiaj, kiajn (pro malsama* kialo) oni ne povas tre libere priparoli. Mallonge,

* Sama (?). *Trad.*

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

la tuta forto de la pruvo prave konvinka por la individuo, ĝenerale dependas de faktoj de persona sento, kaj de etaj koincidoj inter okazaĵoj kaj implikitaj ĉenoj de antaŭa sperto, kiaj ne estas komunikeblaj per vortoj, eĉ se la humileco tion permesus. Por partopreno, do, en tiu ĉi universala sperto de la popolo de Dio, oni tre limiĝas per la individua kaj aparta instruo de la propra vivo—kaj al mi ŝajnas tre dece ke tiel estu. Mi kredas, ke (se ĝi estas vero) oni ne povas tro klare kaj senŝanceliĝe aserti, ke el la privata sperto oni konvinkiĝis pri la realeco de Dia respondo al preĝo; sed mi kredas ankaŭ, ke oni devus nur plej singarde priparoli la sperton mem. Simplanimuloj, kiuj vivas multe en la praktiko de preĝo, kaj kies kutima atendo al Dia respondo konstante (kaj ofte, por ili, mirinde) plenumiĝas, ofte tentiĝas publikigi tion, kio devus resti sankta por ili mem, aŭ esti partoprenita nur de tiu, kiu "havas orelojn por aŭdi." Mi timas, ke multe da malbono povas fariĝi per tro libera kaj volonta sciigo, aparte prese, pri "rimarkindaj respondoj al preĝo." Ofte okazaĵoj konvinke elokventaj por la koncernatoj, ŝajnas al. aliaj nura "babilado." Ilia rakontado nur tro facile liveras okazon al la amo al signoj kaj mirindaĵoj; kaj, plie, ĝi ofte vidigas la plej bedaŭrindajn efikojn de senkonscia memgraveco—la plej senkaŝan tendencon rilatigi ĉion al si mem kiel centro, kaj ignori la faktan partoprenon de aliaj en la okazaĵoj priparolataj. Oni preskaŭ inklinas diri pri tiaj historioj, ke kredeble ili estas des malpli edifaj, ju pli mirigaj.

Ĉar la vera povo kaj animonvenka influo de Dia komuniko plej konvinke sentiĝas ne ĉe tiaj aferoj eksteraj kaj dismontreblaj, ne ĉe spertoj monere pasigeblaj de

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

mano al mano. Trankvila kaj mallaŭta la voĉo kiu venkas; eble tre ordinaraj la cirkonstancoj, kiuj per kuniĝo akiras la signifon de aparta mesaĝo. Ĝuste kiel, vidante kunigitaj kaj metitaj antaŭ nin literojn kiuj kune formas vorton respondan al nia penso, ni konkludas ke ili estas tiel aranĝitaj de iu konanta la penson; tiel same, tiu, kiu kutime ne nur petas, sed ankaŭ atendas, la Dian instruon, vidante ke okazas fojon post fojo kombinoj de okazaĵoj, alĝustigoj de detaloj eĉ plej etaj, ricevas nerezisteblan senton, ke la fingro de Dio montras la lecionon, kiun Li difinas por lia lerno.

Senutile estas demandi al tiu, kiu neniam aŭskultas, ĉu kaj kiel Dio respondas al preĝo. Por povo aŭdi la respondon, estas bezona koro ricevema kaj volonta. La Alta kaj Sankta, loĝanta la eternon, restas ĉe tiu, kiu havas spiriton humilan kaj molan, kaj nur tia lernos koni lian voĉon.

Sed por tiu, kiu efektive ĝin konas eĉ iomete, iom post iom iĝas klare, ke preĝo kaj respondo estas nedisigeblaj. La respondo estas kiel la respondo de la atmosfero al la pulmoj, de lumo al la okuloj. La humila kaj mola koro malfermas sin al la Kreinto, kaj pleniĝas de lia enesto. Tiam la lumo ja brilas interne; tiam la spiro mem de la vivo enbloviĝas al homo de la Spirito de Dio. Inspiro—la enblovo de supre, per kiu sola ĉio ĉiela en ni fariĝas—jen la alia aspekto de adoro.

Por vera adoro, do, necesas inspiro. Inspirita estas la preĝo kiu glorigas la vivon, potenca per la potenco de la Fonto el kiu ĝi fluas. Nek adoro nek inspiro estas inde pripensebla, unu aparte de la alia.

Mi ja kredas, ke la deziro de la koro ofte doniĝas responde al peto. La precizan rilaton de kaŭzo kaj efiko

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

inter peto kaj plenumo mi ne kuraĝas konfide difini, kvankam ke tia rilato ekzistas mi ne dubas. Sed ofte, kiam la kunrilato estas tre rimarkebla, ŝajnas al mi pli racie kaj pli respekte supozi, ke la preĝo havis la naturon de profetaĵo, de Dia antaŭombro, ol ke la esprimita deziro permesiĝis esti la efika kaŭzo de la Dia ago. La respondo al peto per plenumo montras, mi kredas, ke la petinto estis tiugrade sub Dia influo; ke lia volo, rilate tion almenaŭ, harmoniis kun la Dia. Jen penso tre kuraĝiga por la koncernato; kiun ne ĉiam estas saĝe aŭ prave proklami sur la tegmentoj. "Leviĝoj ĝis preĝo" (mi denove citas el la profundaj vortoj de A. H. Clough) ja estas inter la sanktaĵoj, for de kiuj ne decas facilanime levi la vualon.

Kredeble neniu, vere kaj profunde spertinte komunion kun Dio, kiom ajn neplenan kaj intermitan, volonte provus senigi ĝin de ĝia mistero, kvankam li ja deziregus komprenigi al aliaj kion li lernis pri ĝia povo kaj beneco. Pro la multaj, kiuj sincere deziras scii la veron pri ĉi tiu plej profunda kaj urĝa el ĉiuj komunaj interesoj, mi kredas, ke ĉiu, kiu havas tian sperton, devas provi ĝin esprimi per vortoj taŭgaj kaj indaj.

Parolante, do, pri preĝo, adoro, aŭ komunio kun Dio, ni komprenu kaj instruu, ke ĝi estas io pli granda, pli profunda kaj ampleksa, ol nura peto kaj ricevo. Ni konfesu, ke la plej simpla kaj balbuta voko por helpo—la voĉo de la "infaneto nokte krianta, sen vorto krom krio"—tiom certe trafos la orelon de la Patro de spiritoj, kiom la plej profunda preĝo iam voĉita de sanktulo aŭ martiro. Ni memoru, ke laŭ la instruo de nia Sinjoro mem, la voĉo kiu pli nepre ol ĉiu alia (se povas esti gradoj de nepreco) aŭskultiĝos de la bona Paŝtisto, estas

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

la voĉo de tiu, kiu vagis plej foren de la ŝafejo, kaj plej profunde konscias la forecon—la voĉo de la perdito pro kies ekreveno hejmen estas en la ĉielo aparta ĝojo. Sed ni neniam forgesu, ke sur la hejmena vojo estas altoj super altoj; ke ju pli la animo suprentiriĝas de la Patra amo kaj zorgo, des pli ĝi pleniĝas kaj enpenetriĝas de la lumo de lia vizaĝo—tiu lumo, kiu plej hele brilas en la mallumejoj nepre trapasendaj de la suprencelanto. Ni ne forgesu, ke la rekompenco de fideleco ĉe tio, kio estas plej malgranda, estas la voko al io pli granda—pli profunda kaj alta, pli plena de Dia signifo; kaj ke tiuj "influoj de la Dia enesto," al kiuj "sin cedi" estas la esenco de vera adoro, devas penetri plej internen de nia esto, kaj submeti ĉiun penson al la leĝo de Kristo—tiu leĝo de la Spirito de vivo, per kiu ĉio karna iom post iom forpuriĝas kvazaŭ per fajro konsumanta. Ni memoru, ke vivi en la spirito de preĝo estas vivi pli kaj pli konstante kaj intime en la apudesto de Tiu, antaŭ kiu la anĝeloj vualas la vizaĝojn, Tiu, kun okuloj tro puraj por rigardi malbonon. Ja decas, do, ke ĉi tiu mirinda savo—la veno antaŭ lian vizaĝon—estas atingebla nur kun timo kaj tremo. La preĝoj kiujn li akceptas ne estas preĝoj farataj laŭ homa volo, aŭ uzataj kiel rimedo kontentigi la dezirojn de la karno aŭ de la racio; ili estas la sopiroj de la spirito baraktanta reiri al Tiu, kiu ĝin donis, aŭ ĝojanta en la lumo de lia vizaĝo. La spirito liberigata el la leĝo de peko kaj morto ne povas rigardi malantaŭen al teraĵoj. Ĝia vojo kondukas pluen kaj supren, ĉiam "en lumon," kaj ĝiaj sopiroj estas la vibroj komunikitaj al ĝi de la Fonto kaj Centro de lumo; ili obeas leĝon senŝanĝa kiel la leĝoj de lumo mem, kaj ilia funkcio estas detrui kaj forkonsumi la pereantan eluzitan vestaĵon de la spirito,

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

forigi de ĝi makulojn kaj malhelpojn, kaj en la pleneco de la tempo venigi ĝin "en la liberecon de la gloro de la idoj de Dio," la rajtan " heredaĵon de la sanktuloj en lumo." Ĉu oni ja ne povas respektege diri, ke laŭ vera kaj profunda senco, Dio mem estas la Respondo al preĝo ?

Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

CAPITRO IV

LIBERA MINISTRADO

NIA ministrado estas nomebla libera (angle, *free*: = libera, senpaga) laŭ diversaj apartaj sencoj.

1. Ĝi estas partoprenebla de ĉiu.

2. Ĝi funkcias sen antaŭaranĝo.

3. Ĝi ne estas pagata.

Ni kredas, ke la sola esenca kvalifiko por la ofico de ministro estas la sanktoleado de la Sankta Spirito; kaj ke sen privilegiado de personoj ĝi verŝiĝas sur virojn kaj virinojn, sur junajn kaj maljunajn, sur klerajn kaj neklerajn. La donaco, ni kredas, estas pure spirita; tiom ekster nia reguligo, kiom la pluvo el ĉielo, kaj egale nepra, egale abunda, egale necesa por fruktodono.

Inter ni kaj aliaj Kristanoj, la diferenco kuŝas ne ĉe la fakto, ke ni kredas tiun sanktoleadon libera donaco, aŭ eĉ ke ni neas, ke ĝi estas aĉetebla por mono, sed ĉe la fakto, ke nia kompreno de ministrado rilatas ekskluzive al ministrado spontana kaj spirita. Kredeble ĉiu konsentus, ke sen aparta donaco de supre estas neeble fari akcepteblan preĝon, aŭ semi en la koroj de aliaj la vivan

Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

semon de la regno. Estas klare, ke oni ne povas doni, kion oni ne ricevis. Nedisputeble estas, ke kion oni donace ricevis, oni devus donace doni; ke la donaco de Dio ne estas aĉetebla por mono, nek limigita funkcii nur pere de aranĝoj homaj. Neniu, kiu kredas je la realeco de la donaco de "profetado"—alivorte, je parolo laŭ la senperaj inspiroj de la Spirito de la vero—maltimus provi ĝin aĉeti aŭ bridi. "Kie estas la Spirito de la Sinjoro, tie estas la libereco." Nia doktrino pri libera ministrado, kompreneble, baziĝas sur viva kredo je la konstanta enblovo de tiu Dia Spirito, ke per siaj elektitaj iloj li donas lumon kaj parolon, por la helpo de ĉiu.

Sed ni iras ankoraŭ pluen, kredante tian spiritan ministradon ĉiosufiĉa. Jen la vera divergo inter ni kaj niaj kunkristanoj, kies granda plimulto kredas, ke por plena lojaleco al la komuna Sinjoro necesas io pli ol ĉi tiu ministrado pure spirita. Aliaj kristanoj de tre fruaj tempoj faris distingon inter kleriko kaj laiko, kredante, ke fondiĝis de Kristo mem almenaŭ du sakramentoj iusence "necesaj por savo"; kaj la plimulto, aŭ almenaŭ la plej grandaj, kutime uzadas liturgiajn formojn de publika diservo.

Funde de nia sindeteno de ĉiuj ĉi ĝenerale akceptitaj aferoj, kuŝas la konvinko pri la plensufiĉeco de individua kaj senpera komuniko kun la Patro de niaj spiritoj; kaj profunda kredo, ke per sia veno en la karno, la Sinjoro Jesuo Kristo malfermis novan kaj vivan alirejon al Dio, anstataŭa kaj nuliga je la antaŭa reĝimo de ritoj kaj ceremonioj; ke ĉiujn kredantojn li rajtigis ofici kiel "reĝoj kaj pastroj" (tio estas, li vokis ilin kaj regi kaj fari akcepteblajn oferojn lianome); kaj ke li ebligis al

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

ili elmontri la naturon kaj la rezultojn de tiu adoro laŭ spirito kaj vero, kiu neniel plu limiĝas en temploj mankonstruitaj, kaj de tiu regno, kiu estas "ne manĝo kaj trinko, sed justeco kaj paco kaj ĝojo en la Sankta Spirito."

Ja maltime agis la fruaj Amikoj, per unu fojo apartigante sin de la klerika sistemo, kun ĝia respektinda kaj longestablita pretendo esti la Didifinita perilo de spirita nutro. Tion farante, ili sendube alprenis sintenon neamikan al la "salajrulaj pastroj," kaj iliaj "turdomoj" kaj "tielnomitaj ordinancoj," kiu, kiom ajn relative komprenebla je la epoko, estis ne nur tre ofenda, sed ŝajne eĉ iom maljusta.

Tamen, post ses- aŭ sepdek jaroj da severa persekutado, elportita kun eksterordinara pacienco kaj konstanteco, ilia rajto adori Dion propramaniere plene allasiĝis, kaj kiel stranga rezulto de ŝanĝoj parte en la Societo mem, kaj parte en la ĉirkaŭa mensa medio, okazis, ke la Amikojn, kiujn oni antaŭe nomis aparte pestaj herezuloj, oni komencis opinii el ĉiuj nekonformistoj* la malplej danĝeraj kaj ofendaj.

Mi kredas, tamen, ke tiel povas esti nur dum ni kontentas esti en stato pure pasiva kaj malkreska. Ĉiu provo propagandi niajn apartajn doktrinojn estas nepre ofenda. Eble ni ne plu kredas, ke estas nia devo prediki kontraŭ la ekzisto de aparta pastraro, kaj la observo de "tielnomitaj ordinancoj," kiel pozitive kondamnindaj aŭ pekaj. Sed la diro, ke ni kredas ilin tute nenecesaj, estas preskaŭ egale maltima, kaj mi apenaŭ supozas, ke ĝi estas pli plaĉa. Tamen, oni ne povas kaŝi la fakton; kaj malgraŭ la doloro, kiun, en la nunaj tagoj de libera

* T.e., Kristanoj neanglikanaj. *N.d.l.t.*

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

kaj viva interŝanĝo de sento, oni nepre kaŭzas esprimante la kialon por aparteco, neniu vera Amiko dezirus eĉ iomete maski aŭ vuali nian malnovan ateston kontraŭ eksteraj observoj kaj ilia akompananta institucio pagata ministraro.

Kaj tiurilate estas granda faciligo povi citi la tre rimarkindan fakton, ke dum pli ol du jarcentoj ekzistis aro da personoj kiuj tute forlasis ĉi tiujn "ordinancojn," sed kies vivoj tamen abunde atestas la realecon de ilia kristaneco.

Miaparte, mi plivole lasus tiun fakton paroli por si mem, ol provus montri ĉiun konkludon, kiun mi opinias juste tirebla el ĝi. Tamen, la demando ĉu la klerika kaj sakramenta sistemo vere estas esenca parto de Kristanismo, aŭ nur homa alkreskaĵo, tiel profunde tuŝas la estontecon de la Kristanismo mem, ke ĝi postulas konsideron. Ĉu ne, aparte nun, multaj volonte aŭskultus la Kristanismon de Kristo Mem, se nur ili povus trovi ĝin malimplikita de la ege "disvolvita" Kristanismo de la hegemoniaj Eklezioj?

Mi certe ne pretendas, ke la Societo de Amikoj efektive prezentas perfektan vivantan ekzemplon de tielnomita "primitiva Kristanismo revivigita." Sed mi ja kredas, ke ĝia idealo estas vera, la sole vera; tiu de Eklezio, aŭ "kolektiĝo," vivanta kun la unu celo plej fidele obei la instruon de Kristo mem—lian propran instruon, ne tiun de la parolintoj lianome, ili estu eĉ apostoloj, krom laŭ kiom ĝi akordas kun lia. *Vivi* la Predikon sur la Monto, kaj la ceteron de la evangelia instruo, kaj en ĉio aŭskulti por la vivanta voĉo de la bona Paŝtisto—viglante konstante ke neniu homa tradicio fortiru de ĝi nian atenton—jen nia konfesata celo kaj unuigilo kiel Societo.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Nia konvinko pri ĝia sufiĉeco estas la bazo de nia ekzisto kiel aro aparta.

Ni kredas, ke nek la divido de Kristanoj en klerikojn kaj laikojn, nek la uzo de sakramentaj ceremonioj, estis ordonita de Kristo mem. Sen ia dubo, ambaŭ aferoj frue naskiĝis en la Eklezio; sed memorante, ke la fruaj Kristanoj, kiel ni mem, estis homoj eraripovaj, kaj ke nedisputeble ili estis necertaj, kiuj ritoj kaj ceremonioj estas observendaj, ni ne sentas, ke ilia praktiko estas por ni decidiga.

La institucio de aparta pastraro, kaj tiu de la sakramentoj, kompreneble formas esence unu sistemon. Forlasante entute tion, kion ili nomis "adoro monta kaj Jerusalema," kontraste al la adoro laŭ spirito kaj vero kiu limiĝas en neniu tempo aŭ loko, la fruaj Amikoj trafis la radikon de la tuta afero.

Mi tute ne intencas entrepreni montri, ke ili estis pravaj tion fari. Tre forte kaj kompetente Robert Barclay detalis kaj defendis la kialojn de ilia agado en sia fama "Apologio." La mia pli modesta provo estos priskribi la perpleksojn kiuj pretigis min danke akcepti tion, kio ŝajnis al mi mem plene kontentiga malimpliko de esenca Kristanismo for de ĉio, kion oni povas sincere supozi nekomprenebla, kaj neinda ĝian altan kaj spiritan karakteron.

Mi devas konfesi, komence, ke mi neniam sukcesis klare kompreni pro kio oni nomas la aluditajn "ordinancojn" esencaj partoj de la Kristanismo, nek trovi plene kontentigan klarigon de iliaj precizaj (supozataj) efikoj. Pri la ĝenerala naturo de iliaj kialoj kaj dirataj rezultoj mi kompreneble ne estas senscia. Sed ŝajnas, ke inter la okazaĵoj el kiuj la ordinancoj naskiĝis, kaj la plej

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

fruaj konataj priskriboj pri la institucioj mem, ekzistas vasta interspaco de malklaro. Plie, estas fame konate, ke teologoj tre malsame instruas pri la spiritaj rezultoj aŭ de ordinacio, aŭ de ĝusta partopreno en la sakramentoj, krom ankaŭ pri la kondiĉoj necesaj por ilia "valideco."

Jen kie sentiĝas la praktika malfacilo de la sistemo. Se la demando havus intereson pure spekulativan, kiom ĝoje mi kaj aliaj nekleruloj lasus ĝin en la manoj de la pli kompetentaj ĝin trakti! Sed ĝi estas demando praktike kaj urĝe grava, kiun, rilate almenaŭ unu el la sakramentoj, neniu piulo povas eviti. Ĉiu plenaĝa anglikano (ĉiu, tio estas, kiu estas tia laŭ religia senco) frontas solenan admonon fari, aŭ proprariske lasi nefarita, agon kies sekvoj havas vastan kaj misteran influon por bono aŭ por malbono sur lian animan farton. Nenia meza vojo estas ebla, kaj la anglikana *Prayer Book* promesas nenian certon ĉe aŭ la faro aŭ la nefaro. Estas prezentite, ke "partopreno neinda" implikas malprecizajn sed terurajn danĝerojn—danĝerojn eble, kvankam ne klare, pli grandajn ol tiuj rezultantaj el nefaro de ago "ĝenerale necesa por savo." Sed kiel certiĝi, ke la partopreno estas inda? "Vere penta koro, kaj viva fido . . . viva kaj konstanta fido al Kristo nia Savinto . . . kaj perfekta amo al ĉiu"—se tiuj estas la necesaj *kondiĉoj* por "inde partopreni en ĉi tiuj sanktaj misteroj," kaj se, kiam ili mankas, oni nur "manĝas kaj trinkas juĝon al si" ilin partoprenante, ĉu mirinde, ke la perpleksita koro restas en stato de konstanta nesereneco, kaj timas preskaŭ egale la faron kaj la nefaron?

Tia, almenaŭ, estis la mia sperto dolora kaj longedaŭra.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

La admono sin ekzameni por certiĝi pri indeco partopreni nur pligrandigis la embarason kaj aflikton. Ĉar ĉu la sinekzameno povas fari alie, ol kreskigi la senton pri neindeco? Kaj kiel estas eble, ke oni supozu sin kompetenta juĝi pri si mem?

Mi ne forgesas, ke la *Prayer Book* proponas (se ne diri preskribas) kiel rifuĝon for de tiaj dilemoj, ke oni sin turnu al "iu diskreta kaj klera ministro de la Dia Vorto" por "absolvo, kaj spirita helpo kaj konsilo." Mi plene konsentas la konsekvencecon de la proponata rimedo, kiu, ŝajnas al mi, konfirmas la evidentan kaj jam aluditan fakton, ke la pastra kaj sakramenta sistemoj estas interdependaj, kaj devas akceptiĝi aŭ ne kiel tuto. La Protestanta sendependemo malebligis, ke mi akceptu tiun logikan sekvon el la anglikana doktrino pri la Sankta Manĝo. Por mi, sin turni per konfeso al pastro por absolvo estis neeblaĵo, kiel ĝi estas ankoraŭ nun, mi kredas, por la granda plimulto de anglinoj, kaj kiel, kredeble, por anglaj viroj ĝi ĉiam restos. Sed mi dubas, ĉu logika starejo ekster tio estas ebla por tiu, kiu plene alprenas la anglikanan doktrinon pri sakramentoj.

Mi ne deziras supozigi, ke mia sperto en ĉi tiu rilato konsistis nur el la perpleksoj kaj skrupuloj jam priskribitaj; aŭ diri, ke mi tute ne povis kvietigi ilin laŭ maniero kiun mi trovis provizore kontentiga. Estas vere, ke el perpleksoj kaj skrupuloj naskiĝis duboj kaj demandoj (per kiuj, efektive, svarmis la aero mem kiun mi spiris), tiel ke dum la dudek jaroj en kiuj mi regule "komuniiĝis" kiel ano de la anglikana eklezio, mi neniam povis senti mian praktikon bazita sur plene klara kaj firma tero de konstatita vero. Tamen, dum tiuj jaroj,

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

malgraŭ (aŭ pliĝuste kune kun) ĉiuj demandoj kaj duboj pri la vera intenco de nia Sinjoro—se, efektive, intencon li havis—rilate al aparta primemorigo per la uzo de pano kaj vino pri lia morto, mi ja fervore provis laŭ mia kapablo solvi la problemon praktike—fari la agon de ekstera "komuniiĝo" vera okazo por denova sindediĉo, kaj interna kaj spirita nutriĝo per la pano de vivo. Tiuj tempoj efektive ofte estis okazoj de profunda spirita beno; sed mi neniam sentis ilin tiaj alisence, ol necese estas ĉiu ago de vera preĝo, pento, sindediĉo, aŭ danko. La beno ŝajnis al mi tute spirita, kaj el kaŭzoj spiritaj. La rilato inter tiuj fontoj de beno kaj la uzo de pano kaj vino neniam iĝis klara por mi. Ju pli profunda la ravo de komunio kun Kristo kaj kun liaj, des malpli konceptebla ŝajnis, ke ĝi dependu de la oficiala plenumo de ellaborita ceremonio.

Ŝajnis al mi, ke la Biblio, al kiu en nia Protestanta lando oni ĉiam turnas nin por solvo de la problemoj pri kiuj la Romkatoliko konsultas sian pastron, neniom helpas difini la kondiĉojn necesajn por ĝusta partopreno, aŭ direkti elekton inter la diversaj sakramentaj teorioj nun renkontataj. Al ĝi apelacias ĉiuj teologiaj skoloj egale, kaj estas evidente, ke libro ne povas decidi inter rivalaj interpretoj pri si. Tamen, ĝi ja helpis min, direktante min al la konkludo, ke eble neniu elekto inter la diversaj teorioj estas bezona. Al mia nehelpata racio ŝajnis, ke komparo inter kiu ajn moderna eŭkaristia teorio, eĉ la plej milda, kaj la Novtestamentaj rakontoj pri la adiaŭa vespermanĝo de nia Sinjoro kun liaj disĉiploj, klare montris, ke de kiam la rakontoj skribiĝis, okazis vasta kaj neklarigita kresko, aŭ almenaŭ disvolviĝo, de la originala ideo. La tuta formularo uzata en la

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Komunia Diservo ŝajnis porti sencojn preskaŭ nemezureble malsamajn je ĉio, kion mi povus mem eltiri el la unu mallonga esprimo, " Tion ĉi faru por memorigo pri mi." Al mi, sola kun la Skribo, la evangeliaj rakontoj prezentus nenian ideon de intenco fondi ceremonion; tre malpli ligi al ĝia observo tiom timigajn eblaĵojn por bono aŭ por malbono, en okazo ne nur de neplenumo, sed eĉ de neadekvata plenumo. La rakontoj de Mateo kaj Marko pri la lasta vespermanĝo, kiuj enhavas nenian aludon al ebla ripeto de la festo, ŝajnas al mi egale kompletaj, egale signifaj, kun tiu de Luko, kie troviĝas la aldono, " Tion ĉi faru por memorigo pri mi." La aludoj en la Epistolo al la Korintanoj pri malordaĵoj en la tiea eklezio certe montras, ke la Korintanoj kutimis renkontiĝi por " anonci la morton de la Sinjoro, ĝis li venos," per manĝo de pano kaj trinko de vino; kaj la vortoj de la apostolo pri Dia komuniko al li mem pri la cirkonstancoj de la lasta vespermanĝo efektive ŝajnas montri lian kredon, ke ili havas sufiĉan bazon por tiu moro. Sed, aliflanke, la vortoj kiujn li tie atribuas al Kristo, " Tion ĉi faru, *tiel ofte, kiel vi trinkos*, pro mia rememoro," ĉiam ŝajnis al mi klare malakordaj kun la ideo de ordono manĝi panon kaj trinki vinon *kun la celo* memorigi lian morton; kaj prezentantaj la ideon de pli respektega rememoro pri li en ĉiu socia kunveno, kaj eble speciale ĉe la Paska aŭ aliaj religiaj festoj. Do mi estis plene preta konsenti la kredon de la Amikoj, tiel forte prezentitan de Barclay en sia " Apologio " (Prop. xiii).

Mi skribas miajn pensojn laŭ formo iom aŭtobiografia, ĉar mi opinias, ke la ŝajno de memcentreco estas preferinda, ol la reala aroganto preterpasi sian scion; kaj ankaŭ, ĉar mi deziras montri kiel

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:49 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

neeviteble (kaj samtempe, mi kredas, senkulpe) ĉe la sincera peno obei samtempe la instruon de Jesuo Kristo, kaj tiun de la Eklezio, oni povas implikiĝi en problemojn tro profundaj kaj perpleksaj por ordinaraj mensoj.

En tempo kiam mi tiamaniere deviĝis elekti inter obeo al la konscienco, kaj ekstera adoro kun aliaj kristanoj—kaj kiam kun granda doloro mi jam du jarojn ekskomunikis min laŭe—estis por mi plej granda senŝarĝiĝo de la animo trovi aron da Kristanoj kun la simpla, kaj, mi kredas, la sola inda kompreno pri la Kristanismo, ke ĝi estas reĝimo tute spirita; stato de lumiteco kaj vera adoro en kiu formoj kaj ombroj forpasis, kaj oni celas nur la substancon. Estis en la kvietaj kunvenoj jam priskribitaj, ke mi mem unue lernis la plenan signifon de la vortoj, "baptante ilin en la nomon . . . kaj la partoprenon de la korpo de Kristo." La eksteraj observoj, per kiuj ĉi tiuj "sanktaj misteroj" figuriĝas en la diservoj de aliaj eklezioj, estis por mi malhelpaj pli ol helpaj, kaj mi ne povas eviti la suspekton, ke ili estas tiaj por multaj.

Ĉar se ili ne helpas, ili necese malhelpas. Povas esti, ke por homoj ĉe iuj stadioj de edukiĝo, aŭ en iuj landoj, la faro de ceremoniaj agoj estas natura kaj reala maniero ricevi aŭ esprimi veron. Mi ne povas supozi, ke ĝi estas la spontana lingvo de inteligenta adoro en ĉi tiu lando, kaj nuntempe. Por mi persone, la granda kaj ĉefa leciono instruita de nia dia Majstro, en la sanktaj adiaŭaj horoj de sia lasta vespero kun la disĉiploj, banaliĝas kaj kaŝiĝas rigardate kiel la fondo de ceremonio; sed, rigardate kiel personigata aŭ vivata parabolo, elbrilas denove kun plena majesto kaj patoso. Kiam oni

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

sentas sin premata de tio, kio (pardonu al mi la nereteneblan veron) al kelkaj el ni ŝajnas la neinteligenta kutimo konstante ripeti formon, unufoje por ĉiam uzitan de Kristo por elmontri la centran veron de lia vivdona surtera vivo; enorele sonas liaj ripetitaj avertoj al la disĉiploj kontraŭ ilia ĉiama emo kompreni liajn vortojn laŭlitere—interpreti ilin rilate al la manĝo kiu pereas, anstataŭ kompreni, ke ili estas spirito kaj vero.

Kio instigas min paroli tiel forte, estas la timo, ke per volviĝo en vesto de superstiĉa uzado, la "vortoj de eterna vivo" neeviteble kaŝiĝas for de la atingo de la plej bezonantaj ilin. Kio ajn degradas la religion ĝis afero de ekstera observo, kio ajn ŝajne metas la senrezonan partoprenon en eksteraj agoj samŝtupa kun tiu interna restado en la vorto de Kristo kiu faras liajn disĉiplojn liberaj, nepre estas homa kaj granda baro sur la hejmena vojo, por kies malfermo al ĉiuj li venis.

Tiuj, kiuj sentas kun ni pri la intenco de nia Sinjoro okaze de lia lasta vespermanĝo kun la disĉiploj, nature inklinas simile kompreni la malmultajn aludojn kiujn li faris al bapto. Estas klare, ke en la Nova Testamento, la vorto havas sencojn diversajn. Se oni kredas (kion almenaŭ sugestas la vortoj de la apostolo Paŭlo), ke estas nur "unu bapto," oni nepre devas supozi, ke ĝi estas tiu bapto "per la Sankta Spirito kaj per fajro" kiun Johano profetis la ofico de Tiu, por kiu li mem, kun sia "bapto per akvo" estis preparanta la vojon—Tiu, kiu devis pligrandiĝi, dum Johano malpligrandiĝis, kaj kiu diris pri si, post kiam li "plenumis ĉian justecon" per submetiĝo al la bapto de Johano, ke ankoraŭ restas

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

por li "bapto por esti baptita"—bapto certe ne ekstera.

Kune kun la observo de ritoj kaj ceremonioj, forpasas ankaŭ la bezono por aparta pastraro. Nedisputate estas, mi kredas, ke la sola kristana pastreco priparolita en la Nova Testamento, estas tiu "reĝa pastreco" al kiu vokiĝas ĉiu kredanto; ke li prezentu sin kiel vivantan oferon, sanktan, plaĉantan al Dio.

Ŝajnas al mi, ke delegante al aparta kaj oficiala kasto la funkcion gvidi la adoron de kunveno, oni povas forgesigi la fakton, ke la pastra ofico apartenas al ĉiu kredanto, kaj malfortigi la senton pri persona respondeco. La ekskluziva difino de unu viro kiel parolisto por la tuta adorantaro necese sufokas en aliaj la impulson fari voĉan ministradon (almenaŭ dum tempo de publika diservo); kaj rilate al la ĉiutaga vivo, la ideo pri "animoprizorgisto" ŝajnas egale nekonforma al la kvakera kredo, ke la devo "gardi unu alian por bono" restas pli-malpli sur ĉiu ĉeestanto.

Kompreneble, krom la esence pastra ofico oferdoni laŭdon kaj dankon, ekzistas multaj pluaj ekleziaj oficoj, kiujn plenumas, kaj ofte noble plenumas, la pastraro anglikana. Tiuj aliaj oficoj—kiaj instruado, vizitado al malsanuloj, helpo al malriĉuloj, kaj similaj—estas tute apartaj de tiu pastra pretendo kontraŭ kiu la Amikoj ĉiam protestis (kvankam vulgare konfuzataj kun ĝi). Estas vere, ke oni povas dubi, ĉu ĉiu civiliza, mildiga, filantropia, kaj bonfara influo de aparta pastraro sur la loĝantaro, speciale en regionoj kamparaj, povus egale efektiviĝi se la ideo pri esenca distingo inter kleriko kaj laiko subite nuliĝus. Ĉiuokaze, la demando pri la praktika rezulto de tia nuliĝo, aŭ alivorte, de akcepto al la kvakera

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

principo pri libera ministrado, apenaŭ kuŝas en la videbla horizonto. Certe estas, ke en la nuna tempo, neniu veremulo povas paroli sen estimo kaj admiro pri la pastraro ĝenerale, kaj pri multaj el ili sen plej profunda respekto. De longe forpasis la tempo, kiam oni povus sendistinge uzi frazojn kiaj "salajrula ministraro" pri aro de homoj, kies vivoj en sennombraj kazoj estas tiom videble kaj noble altruistaj. La konfuzo inter la kondiĉo de servo kaj la motivo instiganta ĝin estas eraro evidenta, kvankam ofta.

Tamen, ankoraŭ restas la grava demando, kian efikon sur la spiritan karakteron de la ministra ofico verŝajne havos la fakto, ke ordinacio malfermas antaŭ kiu ajn junulo sufiĉe kapabla kaj respektinda la pordojn de honorinda profesio, per kiu li rajtas laborenspezi vivrimedon kaj subteni familion.

Ĉu la kvakera principo, ke spirita ministrado neniam estu porpaga, ne estas almenaŭ la plej alta idealo? Tamen, tre nature oni povas demandi, ĉu en la praktiko ĝi ebligas sufiĉan provizon por la instruo kaj edifo de la eklezio.

Kaj ĉi tie, kompreneble, funde de la diferenco de praktiko inter Amikoj kaj aliaj Kristanoj, kuŝas radika diferenco de sento kaj penso. Ni Amikoj kredas, ke ne estas necese, ke difinitaj aroj de kredantoj estu ĉiu sub la spirita prizorgo de pastro. Ni kredas, ke ĉiu individua Kristano havas la rajton kaj la devon alproksimiĝi Dion propramaniere—sidi sub la senpera instruo de Kristo Mem, kaj esti preta preni sian parton, se iam lin vokas la unu Kapo de la Eklezio, en voĉa preĝo, laŭdo, danko, aŭ admono, por la helpo, konsolo, kaj edifo de ĉiuj.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Se, do, en kunveno, aŭdiĝas nenia voĉa ministrado, ni ne sentas pro tio, ke ĝi ne estas okazo por kunadoro. Kelkaj malgrandaj kunvenoj ofte, aŭ eĉ kutime, okazas en silento senrompa, kaj en ĉiu kunveno oni lasas spacon por tiu adoro kiu estas ekster vortoj. Oni sentas, ke la respondeco por la viva kaj sana stato de ĉiu kunveno restas, aŭ devus resti, kolektive kaj individue, sur ĉiu ĝia ano.

Estas evidente, ke ministrado tiel zorge ŝirmita kiel la nia kontraŭ ĉia premo ekstera, povas esti viva kaj daŭra nur rezulte de profunda kaj ĝenerala religia sperto. La praktika apliko de ĉi tiu nia fundamenta principo sendube prezentas malfacilaĵojn, gravajn kvankam venkeblajn. Nia fideleco al ĝi estas severe provata de modernaj kondiĉoj; sed de tiu fideleco dependas, mi kredas, eĉ nia vivo kiel Societo. Ĉe nia pli propagandema sinteno dum la lastaj jaroj, kiel ĉe la granda postulo al tempo kaj forto farata de la moderna agemo ĉiuspeca, troviĝas konstanta tento uzi metodojn malpli purajn, malpli severe neprofitemajn, ol tiuj, al kiuj nin ligas ĉiu nia tradicio. Mi kredas, ke se ni ne havas sufiĉe da fido kaj pacienco konservi la liberecon de nia ministrado, eĉ ofere de ŝatateco, nia lumo neeviteble estingiĝos ĝuste kiam ĝi estas plej urĝe bezonata.

La permeso de ministrado virina ŝajnas nature rezulti el la neuzo de ĉiu ministrado krom spontana kaj spirita. La sperto montras, ke por tia ministrado virinoj ofte estas altgrade taŭgaj.

La tuta kvakera vidpunkto rilate ministradon konsistas en tio, ke oni kredas grava ne la eksteran kaj videblan simbolon, sed sole la gracon internan kaj spiritan. La diro, ke ambaŭ estas esencaj, aŭ ke ĉiu

Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

estas esenca al la alia, ŝajnas nepre konduki al nesolveblaj malfaciloj, se ne esti rezonado en rondo. Se el la du nur unu estas esenca, oni kompreneble ne povas dubi kiu. Al la demando, ĉu interna kaj spirita graco, alivorte, sankteco, povas flori sen uzo de rito aŭ ceremonio, nur la sperto kaj observo povas doni finan respondon. "Per iliaj fruktoj vi konos ilin." Tre povas esti, ke iu naskita kaj edukita en la Societo sentus malfacilon proponi tiun provilon. Sed tial ke nur en matura vivo mi eniris ĝin, eble por mi ne estas maldece diri, ke la Amikoj havas ja nenian kaŭzon timi la demandon ĉu la praktika normo de sankteco ĉe iliaj anoj atingas la nivelon de tiu ĉe aliaj Kristanoj. Se tiel estas—se amo, ĝojo, paco, pacienco, komplezo, bonkoreco, fido, mildeco, kaj modereco ne mankas inter ni—ni ja rajtas demandi, "Pri kio estas nia ministrado manka aŭ maltrafa?"

"Al ĝiaj rezultoj," kelkaj sendube respondus, "mankas ne kvalito, sed kvanto. Kiom ajn bonegaj la rezultoj en la vivo kaj konduto de individuoj, kiel tuto la Societo ne kreskas, kaj tial ne estas sana membro de la unu Eklezio." Pri nia longa malplimultiĝado en antaŭa tempo, kaj nia nuna malrapida kresko, mi traktos aliloke. Ĉi tie mi kontentiĝos per la simpla respondo, ke la nombra kresko aŭ malkresko de sekto ne estas kontentiga mezurilo pri la spiritaj rezultoj de ĝia ministrado; ĉar nurajn nombrojn influas aliaj faktoroj, el kiuj kelkaj tre malmulte rilatas al spirita sano. El tia statistiko oni ricevas nur malprecizan ideon eĉ pri la nombro de personoj eble influataj de la predikado. Sendube oni konsentos, ke la persona kaj la laŭnombra proviloj tre povas liveri malsamajn rezultojn; ke la plej pura formo de religio malofte estas la plej populara,

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

kvankam ĝi kredeble havos la plej daŭran influon, kaj en la fino la plej vastan. Sed, se pureco kaj popularecco iasence malakordas, ĉu oni povas dubi kiun preferi? *

Mi jam diris, ke nia fundamenta ŝtono estas la kredo, ke Dio ja efektive komunikas, per senpera kaj viva enblovo de iom el la spiro de sia propra vivo, kun ĉiu spirito kiun li kreis. La kredo pri senpera Dia komunikiĝo kun ĉiu ne estas aparta al ni. Kio estas aparta al ni, estas nia atesto pri ĝia libereco kaj sufiĉeco. La bazo de nia ekzisto kiel aparta kredantaro estas nia atesto, ke la vera evangelia ministrado estas sendependa de formoj kaj ceremonioj, kaj de ĉiu homdevena limigo aŭ kondiĉo. Ni deziras ŝirmi ĉi tiun superegan funkcion de la homa

* Kiel mi jam diris, mi kredas, ke ekster la Societo malmultaj scias, kiagrade ankoraŭ daŭras la moro, ke Amikoj sentantaj vokon al ministrado vojaĝu, kiel ni diras, "por servo al la vero," aŭ "sub sento pri religia koncerno," ne nur de loko al loko en Anglujo, sed ankaŭ tra la tuta mondo. Efektive, ili propramove entreprenas, kaj plenumas, rimarkindan nombron da diversaj "servoj," jen tutsole, jen kun helpo de unu aŭ pli da Amikoj "liberigitaj" por akompani la ministron. La malgrandaj kunvenoj, ĉe kiuj estas nur malmulte da voĉa ministrado, ricevas apartan prizorgon kaj atenton de la pli grandaj, kies ili estas parto; kaj aliaj Amikoj kutime vizitas ilin de tempo al tempo.

Ekzistas ankaŭ speciala servo, al kiu ministrantaj Amikoj iam sentis oftan vokon, kaj kiu ankoraŭ ne formortis, kvankam en la lasta tempo ĝi estas multe pli malofta. Mi aludas al la moro okazigi kunvenojn por adoro kaj reciproka edifo de domo al domo—ordinare, sed ne ekskluzive, inter anoj. Tiajn vizitojn oni sentas okazoj aparte oportunaj kaj konvenaj por la uzo de tiu talento "paroli laŭ la stato de" la individuo, kiun iuj Amikoj, speciale en antaŭaj tempoj, ŝajne posedis ĝis rimarkinda grado. Mi kredas, ke kiam takte faritaj de la malmultaj posedantaj veran kvalifikon por delikata kaj iafoje animesplora servo tia, ili estas profunde valoraj, sed eble ankaŭ aparte emaj degeneri al io nek edifa nek dezirinda.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

spirito kontraŭ ĉiu influo maltrankviliga, tiel zorge, kiel maristo ŝirmas sian kompason kontraŭ ĉio, kio povus tiri ĝian montrilon for de la poluso; kaj pro simila kialo —ke ni kredas, ke la senpera influo de la Dia menso sur la homan estas la unusola senerara gvidilo en la vojaĝo de la vivo, kaj ke la povo per kiu ĝi koniĝas estas nur tro facile flankentirebla de homaj influoj. La Protestanta instinkto de sendependeco en ĉi tiu profundega regiono havas, mi kredas, signifon kaj valoron tre gravajn. Ŝajnas al mi, ke la kvakera tradicio de "nerezisto" altiris proporcie multe pli da ĝenerala atento, ol la profunda kaj malceda sendependemo de la Kvakerismo—ĝia firma proklamo, ke ĉiu havas personan respondecon al sia Kreinto, kaj nur al li. La superega graveco kiun la Amikoj atribuas al konformeco inter konduto kaj konfeso—al severa honesteco kaj verdiro, kaj aliaj klaraj moralaj devoj—havas, mi kredas, intiman rilaton al ilia forlaso de ĉia dependo de observcj eksteraj aŭ oficiala subteno kaj absolvo. Kiam ĉiu fremda purigorimedo formetiĝis, elstaras "la demando de bona konscienco." Kaj kie ordinacio ekstera videble ne sufiĉas ebligi efikan ministradon al la profundaj bezonoj de afliktita spirito, tie la ministrado, kiu rezultas el la fajraj "baptoj" de Didifinita disciplino, montriĝas en sia plena digno la sola vera kvalifiko por atingi la atestanton en aliaj koroj.

Mi dubas, ĉu ajna Protestanta sekto konscias kiom la Amikoj la altan valoron de la disciplino de sufero. Ke nur per profunda sperto de interna provado kaj ekstera aflikto, oni plene kvalifikiĝas ministri la vorton de la vivo al aliaj, montras la ofta kvakera esprimo, "ministro profunde baptita." Kelkaj Amikoj sentas ĝian neceson

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

tiel forte, ke ili emas malkonfidi, se ne kondamni, ĉion en ministrado, kio al ili ŝajnas " supraĵa " aŭ facile produktita. Sankta respekto, kiu ofte profundiĝas, mi kredas, ĝis sindeteno eĉ tro zorgema, ĉiam akompanis la faron de nia plene libera ministrado—ministrado libera de influoj homaj aŭ eksteraj, ĝuste por ke ĝi estu templo sankte rezervita por la muldado—la detena aŭ deviga potenco—Dia kaj interna.

La danĝero de nia profunde " interna " idealo estas, kompreneble, ĝia tendenco naski skrupulojn kaj iom da malsaneca sinesploremo, kaj speciale ĉe ministrado. Plene konsciante la profundan veron, ke tiu, al kiu la netaksebla talento de ministrado konfidiĝas, devas trapasi multajn " baptojn," kaj ke apartaj afliktoj ofte antaŭiras specialan repleniĝon de la sankta ujo, Amikoj ofte eĉ sentas, ke estas preskaŭ profane paroli en religiaj kunvenoj, krom sekve de dolora sperto tia. Facile estas, vidi la danĝeron tiel limigi la manieron laŭ kiu la Dia volo komunikiĝas al individuoj. Ŝajnas kaj probable, kaj konforme al la sperto, ke ministrado vere spirita variu rilate formon kaj profundon ĉe mensoj diversaj. Klare, la voĉo de preĝo kaj laŭdo, kaj ankaŭ (ĉu ne ?) de " atesto " kaj de " profetado," povas esti aŭ infaneca, aŭ profunda. Sed konfesi tiun diverson neniel estas eĉ iomete cedi kredon, ke por parolo estas nepre necesa la Dia rajtigo. La skrupula trozorgo, kiu limigus ĉian ministradon en unu tipo, tre diferencas de la spirito de sankta timo, kiu en ĉi tiu afero estas antaŭ ĉio la komenco de sciado. Mi kredas, ke la plej pretaj akcepti respektege ĉion proponitan en simpla obeo—la plej deziremaj mem lerni, por povi obei—estos ankaŭ la unuaj senti, ke krom sub la influo (laŭ la antikva

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

kvakera diro) de "freŝa sanktoleado de supre," neniu devus maltimi rompi la silenton en kiu interna preĝo eble estas leviĝanta el aliaj koroj. Eble la plej trafa esprimo de tio, kion ni kredas vera ministrado, estas—vortoj parolitaj dum kaj pro efektiva komunio kun Dio.

Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

ĈAPITRO V

APARTAJ ATESTOJ

Ekzistas iuj flankoj de Kristana praktiko, al kiuj ni kutimis atribui apartan gravon, kvankam nia "atesto" koncerne ilin ne implikas kontraŭecon al la kredoj de aliaj Kristanaj eklezioj (kiel tiu, kiun ni ĵus konsideris, rilate al la libereco de ministrado kaj la neuzo de ordinancoj). La ideo pri "atestado"—la praktikado de pli severa obeo al la instruo de Kristo ol opinias necesa la plimulto de la nomitaj per lia nomo—tre forte impresiĝis al Amikoj tuj de la komenco, kaj la persekutoj kiujn ĝi venigis sur ilin nur tiom pli neforigeble brulstampis ĝin en la Kvakeran menson.

La predikado de la fruaj Amikoj estis, super ĉio, predikado de justeco. Mi kredas, ke mi ne multe eraras, dirante, ke de la komenco la Amikoj atribuis pli grandan valoron al la praktiko, kompare kun la teorio, ol okazas ĉe la plimulto de aliaj Kristanaj eklezioj. Obeo al la lumo, kiu konvinkas pri peko, estis la centro kaj ĉefaĵo de la predikado de George Fox; kaj en liaj epistoloj kaj aliaj skribaĵoj troviĝas forte praktika tono, kiu ŝajne trovis egale viglan respondon ĉe tiuj, kiujn li alparolis.

Sendube, la fruaj Amikoj ordinare ja praktikis ĝis

Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

mirinda grado kion ili predikis; kaj ili tre rapide ĝajnis, kaj ĉiam konservis, reputacion pri fidindeco. Al mi ŝajnas neeviteble, ke alvoko al la atestanto en ĉiu koro trafu pli profunden, kaj portu sekve pli bonan frukton de obeo, se ĝi estas malimplikita de ĉia konfido je eksteraj pasportoj al la Dia favoro. Ne nur la ideon pri ebla "efikeco de sakramentoj" aparte de vivsankteco, sed ankaŭ la ideon pri "anstataŭigo" aparte de efektiva sperto pri la aliformiga povo de la justeco de Kristo, energie malkonsentis la fruaj Amikoj, kaj mi kredas, ke en tiu insisto pri la identeco de justeco kaj savo kuŝas la ĉefa sekreto de ilia forto. Ĉiaokaze, ekzistis rimarkinde konstanta penado subteni altan kaj definitivan normon de Kristana moralo, parte per la regularo de la Societo, parte per familia tradicio, disciplino, kaj ekzemplo. Kelkaj "atestoj," t.e., moroj konscience alprenitaj, instruitaj, kaj vartitaj, transdoniĝis de generacio al generacio kun severa zorgemo, kiu, kvankam ĝi foje preterpafis sian celon kaj tendencis al reakcio, tamen formis la internajn risortojn mem de agado, kaj produktis kaj subtenis apartan kaj iom kuriozan tipon de Kristana karaktero.

La esenco de la kvakera "atesto" estas konforma vivado; praktika starigo de la kiel eble plej alta normo de senkompromisa obeo al la instruo de Jesuo Kristo, kiel ĝi troviĝas en la Evangelioj, kaj interne spertiĝas kiel la Lumo—la Spirito de la vero. Efektive, la Amikoj sentis, ke estas kontraŭ ĉi tiu instruo iuj aferoj, pri kiuj la granda amaso de konfesantaj Kristanoj ne sentas tion. Ili atakis tiujn aferojn ne tiom per vortoj, kiom rekomendante kaj observante severan sindetenon de ili ĉiakoste, en spirito ne tre malsimila je tiu de la

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Reĥabidoj en antaŭa tempo. La origina kvakera ideo estis antaŭ ĉio havi "purajn manojn"—stari aparte de malbono proprapersone, sed sen speciala voko al parolo sin deteni en silento.*

Kompreneble, la sindeteno pro konscienca motivo de tio, kion aliaj libere faras, ĉiam povas malplaĉi. Apartaĵo tia neeviteble interpretiĝas kiel esprimo de ero da neaprobo, se ne da efektiva mallaŭdo, pri la moro ordinara. Mi ne scias kiel eviti tion, se oni ne estas kontenta malleviĝi ĝis la nivelo de malpleja lumiteco. Ni devas, mi kredas, kuraĝe elporti la miskomprenon, memorante, ke la disĉiplo ne estas super sia instruanto, kaj ke iam nia Majstro mem "ne havis honoron en sia propra lando." Se ili jam aŭdis lian vorton, ili aŭdos nian ankaŭ. Intertempe, ni povas konsoliĝi per la scio, ke konduto havonta grandan influon ofte kaj necese malplaĉas por la momento.

Ŝajnas, ke la fruaj Amikoj (aŭ "infanoj de la lumo," kiel ili kelkafoje sin nomis) trovis sin en kvazaŭ spontana unuanimeco pro la ĉefaj punktoj rilate kiujn ilia kredo pri Kristana devo superis tiun de iliaj ĉirkaŭuloj. La Jara Kunveno, kiu ne fondiĝis ĝis 1672 (dudek jarojn post la dato kiam George Fox komencis prediki), trovante, ke la "atestoj" kontraŭ militado, ĵuroj, kaj superfluaĵoj, jam estas plene praktikataj, kategorie nomis ilin kiel apartenantajn al "nia Kristana konfeso," kaj ordonis, ke enketado pri la fideleco de Amikoj al ili estu farata per difinitaj demandoj

* En la angla originalo, la aŭtoro aldonas (kiel ekzemplon pri la funkciado de niaj principoj, kaj de nia organizo) "Rakonton pri la maniero laŭ kiu, antaŭ la fino de la dek-oka jarcento, la Societo en Ameriko sin liberigis de ĉia partopreno en la sklavkomerco."

Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

direktitaj de tempo al tempo al ĉiu suba kunveno. [Vidu Aldonon D.]

La moro direkti tiajn demandojn al la subaj kunvenoj daŭris ĝis nun, kvankam de tempo al tempo la demandoj mem aliiĝis, kaj pri la plimulto el ili, oni en la lastaj jaroj instrukciis, ke ili devas esti serioze konsideritaj, sed ne responditaj. Tiu ŝanĝo en nia praktiko kredeble ne estas sen iom da utilo kaj malutilo. La sistemo postuli respondojn al la demandoj estis, fakte, disciplinilo tre potenca, ĉar ili konsideriĝis kaj respondiĝis kun skrupula zorgo kaj precizeco, kaj en la okazo de raporto malfavora, la individuo, kiu laŭ ĝenerala opinio ne plu subtenis la atestojn de la Societo, povis esti "metita sub traktadon," kaj, se obstina, fine eksanigita. En antaŭa tempo ĉi tiu fina puno de malfideleco okazis pro kaŭzoj multe malpli gravaj, ol la juĝataj sufiĉaj nuntempe.*

Ŝajnas al mi, ke en la naturo mem de atesto kolektiva, speciale se ĝi implikas la starigon de normo escepte severa kaj pura, enestas serioza danĝero, ke tio, kio ĉe kelkaj, eble eĉ ĉe la plimulto, estas sincera kaj spontana, de aliaj alpreniĝos imite, kaj sen persona konvinkiteco, iĝanta tiel nur senenhava kredkonfeso. Tial mi ĝojas, ke rilate aferojn pri kiuj povas ekzisti konscienca diferenco de opinio, oni nun permesas al anoj multe pli da libero ol antaŭe. Ŝajnas al mi, ke nia forto dependas grandaparte de nia turniĝo pli al la evangelio ol al la leĝo, de nia fido pli al la puriga povo de enloĝanta, instruanta

* La esprimo "metita sub traktadon" nomas la preskribitan antaŭaĵon al eksiĝo. Kiam kontrolanto, trovinte privatan admonon senefika, deviĝas venigi kazon de malbonagado antaŭ la Monatan Kunvenon, la kunveno komisias al unu aŭ du Amikoj viziti kaj per admono kaj konsilo, "trakti" la kulpulon, kun celo instigi lin ke li konfesu kaj forlasu la kulpon, kaj tiel ne puniĝu per eksiĝo.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Spirito, ol al ekstera kadro de reguloj. Ĉio povanta stimuli pretendon al lumiteco pli multa aŭ pli alta ol la efektive posedata, ja grave kaj bedaŭrinde kontraŭas niajn konfesatajn principojn; kaj mi kredas, ke oni ne povas pli certe venigi la Societon en malkrediton kaj kadukon, ol postulante antaŭ-aranĝitan samkredecon pri tiuj apartaj atestoj, kiuj venas el lumiteco aparta.

Ju pli alta kaj delikata la idealo, des pli granda la risko ĝin formuli, kaj trudi al aliaj. Ŝajnas al mi saĝe, pli kaj pli firme insisti pri obeo al la larĝaj klaraj leĝoj de la devo, kiujn ĉiu Kristano konfesas starigitaj per nia unu superega normo, la skribitaj vortoj de la Majstro mem; sed samtempe lasi pli kaj pli da libero por la detala ellaboro de ĉiuj belaj kaj harmoniaj tamen variaj rezultoj de persona fideleco al la inspiroj de la Sankto Spirito en la koro. Ĉiu klara peko kontraŭ la moralo, ĉiu falo sub tiun normon de "paca senkulpa vivado," kiun ĉiu konfesas la provilo pri la realeco de interna lumo, povas kaj ja devas esti afero de eklezia disciplino—afero, tio estas, pri kiu oni devas "gardi unu super alia por bono," kaj obeo devas esti kondiĉo por sana membreco. Sed kiam la disciplino provas reguligi detalojn, kies tuta signifo kaj valoro dependas de tio, ke ili estas instigitaj de konscienco sub la viva kaj ĉiama gvido de la lumo, tiam nepre la homa sin trudas en la regionon de la dia, kaj oni bremsas kaj malhelpas kaj malfortigas ĝuste tiun muldadon de interne, kiun atendi, kaj al kiu sin cedi pri ĉio, estas nia ĉefa celo kiel Societo.

Sed kvankam en ĉiu celo al kolektiva sindisciplino estas danĝero de senkonvinkiteco, kiu signifas malforton, se ne efektivan malsincerecon, oni memoru aliflanke, ke ĉe unuiĝo estas ne nur konata fonto de forto, sed ankaŭ

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

tre valora ŝirmo; protekto por decaj instinktoj de modesteco. Por tiuj, kiuj subtenas normon de konduto escepte altan, kaj speciale pri detaloj, troviĝas reala sendanĝereco, kiel ankaŭ komforto, en agado kuna. Dum oni paŝas en la piedsignoj de honorataj antaŭuloj, kiom ajn libere oni elektis la vojon, oni ne havas la tenton pretendi ĝian eltrovon; nek estas bezone ĝin zorgege pravigi, kvazaŭ instigis ĝin nur skrupulo aŭ prefero individua. En la praktika rezulto de la kolektiva sperto de nombro da kundisĉiploj, troviĝas, mi kredas, kiel oni racie povas atendi, aparta pureco kaj konveneco. Ne estas malfacile pravigi la saĝon per kiu niaj apartaj atestoj ellaboriĝis, kvankam estas facile vidi ankaŭ la malbonon de tro rigida insisto pri ili.

Nia Societo ĝuas la elastecon kiu rezultas el la foresto de skribita konstitucio; kaj la preciza funkciado de ĝia disciplino tute ne estas facile sekvebla. Ĝiaj "atestoj," kvankam klare komprenataj kaj tre konataj, nenie estas formulitaj aŭ difinitaj per aŭtoritata dokumento. La "Libro de Disciplino" konsistas, kiel mi diris, el ĉerpaĵoj el "Epistoloj" kaj "Konsiloj" de tempo al tempo eldonitaj de la Jara Kunveno. Ĉi tiuj estas en la formo de frataj admonoj, kiuj antaŭsupozas akcepton al niaj principoj; kaj kvankam zorge vortitaj, ili ne traktas difinojn kaj argumentojn. Efektive, ĝis grado kiu, mi kredas, apenaŭ kompreniĝas ekster la Societo, niaj atestoj rezultas malpli el konformeco al reguloj observigitaj aŭ eĉ precize starigitaj de homa aŭtoritato, ol el individua kaj spontana obeo al la diktoj de la individua konscienco—sekvo al la gvido de la dia lumo brilanta en la koro. Ili estas kolektivaj, sed ne formulitaj; aferoj de disciplino, tamen ne preskribitaj

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

aŭ reguligitaj; apartaĵoj konataj kaj eĉ konegataj, tamen pri la forto de ilia subteno variantaj senlime laŭ la individuo.

La tradicia respektego por la individua konscienco ankoraŭ estas tiel forta, ke la preciza naturo de la baro kiun Amikoj sentas rilate ian agon tre povas vualiĝi de ioma mistero. La frazeologio de la Societo, kiu preskaŭ estas aparta idiomo, vive portas ĉi tiun senton pri devigo superega sed (al flankaj personoj) mistera. "La vero postulas," ke io fariĝu aŭ ne. Amiko "sentas baron en la menso," aŭ "ne sentas facilon procedi" kun entrepreno. Pri iu afero "ŝajnas" (al John Woolman, ekzemple) "ke oni povas ĝin distingi de la pura saĝo."

Kiel oni bone scias, troviĝis individuaj Amikoj, kiuj abunde argumentis, el ĝeneralaj konsideroj, la moralajn demandojn implikitajn en niaj "atestoj." Malgraŭ iliaj skrupuloj pri la uzo de "karnaj bataliloj," aŭ de troforta lingvaĵo, neniam mankis al Amikoj la batalemo. Tamen, ilia praktiko plejparte estas pli elpalpita ol elpensita; iliaj atestoj estas ekzemploj de problemoj solvitaj per antaŭenirado pli ol de teorioj konstruitaj spekulative; kaj pri ili ĉiu vera Amiko sentas, ke antaŭ sia propra Majstro li staras aŭ falas, ke estas nur Unu kies ekzemplon li devas rigardi, kaj nur unu Gvidanto kiun li deziras obei. Kiel ĉe nia publika ministrado, tiel ankaŭ ĉe la malpli gravaj aferoj de ĉiutaga vivo kaj praktiko, ni vigle gardas nian individuan liberecon kontraŭ homa sinintermeto, por ke ĝi estu tiom pli senrezerve sub la povo de ĉiu Diinfluo.

Kaj krom tio, ke ni gardas la propran liberecon, ni ne provas limigi la liberecon de aliaj. Kvankam nia

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

konscienca sindeteno de kelkaj agoj neeviteble kompreniĝas kiel iusence iometo da riproĉo aŭ malaprobo pri ili, ni tamen zorgas ne kondamni iun, kiu agas obee al sia propra ricevo da lumo. Mi kredas, ke ni devas sentime kvankam humile konfesi, ke la praktika atestado, al kiu ni sentas vokon, implikas, ke ni estas kiel "urbo starigita sur monto." Sed ni ne provas starigi regulojn aplikeblajn tuj kaj samgrade al ĉiu. La vojo hejmen ne povas esti tute sama por loĝantoj sur la monto kiel por loĝantoj en la valo; nur la celo estas sama.*

La plej grava kaj la plej konata el la apartaj atestoj pri kiuj mi devas nun paroli, estas tiu, kiun niaj anoj konstante faris kontraŭ ĉia militado. La Amikoj ĉiam kredis, kaj agis konforme al la kredo, ke militado kaj batalado ĉiuspecaj estas kontraŭ la spirito kaj la instruo de Kristo, kaj sentis, ke kiel liaj disĉiploj, ili ne povas partopreni ilin. Kia ajn la danĝero, ili firme rifuzadis batali laŭ la ordono de ajna homa aŭtoritato. Kompreneble, tiu agmaniero ofte venigis ilin en konflikton kun la civilaj aŭtoritatoj, kaj bezonas por sia pravigo (kaj neniu konscias tion pli ol la Amikoj mem) la rajtigon de aŭtoritato pli alta ol la nacia.

Ja gravega estas la situacio kiun ni tiel kuraĝis teni—la sinteno de tiuj, kiuj sentas sin vokitaj agi kiel la salo de la tero, kiel kondukantoj kiuj rifuzas kondukiĝi. Mi ne hezitas konfesi, ke tiu sinteno de ebla rezisto al la postuloj de nia lando antaŭ komuna danĝero estis la parto de la

* Mi esperas, ke oni memoros, ke tra la tuta libro mi celas klarigi la signifon de nia idealo, tute ne kontroli ĝis kioma grado ni efektive vivas konforme al ĝi. Pri la efektiva stato de la Societo, mi ne povas formi opinion aŭskultindan, kaj se mi havus tian opinion, mi ne dezirus ĝin publikigi. Mi deziras klarigi la sekreton, ne de nia malforto, sed de nia forto.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

kvakera idealo, kiun dum iom da tempo mi serioze hezitis akcepti. Tiel longe, kiel mi supozis ĝin akompanata de aŭ bazita sur kondamno al tiuj, kiuj konscience kredas, ke ilia devo al Dio vokas ilin senrezerve obei la postulojn de sia lando por milita servo, mi ne povis akcepti ĝin. Sed kiam mi komprenis, ke la kvakera atesto kontraŭ ĉia militado estis ne ia etika regulo tuj kaj universale aplikebla, sed simple la proprapersona kaj proprariska obeo al tio, kion oni lernis konfesi Dia aŭtoritato, eĉ kiam ĝiaj ordonoj superas kaj kontraŭas la naciajn, tiam mi tuj sentis, ne nur ke ĝi estas plene tenebla, sed plie, ke ĝi estas la sola konvena por fidela disĉiplo.

Tiel longe, kiel nia lando estas nur tre neperfekte Kristana, estas evidente, ke ĉiam povas okazi nesuperebla kontraŭeco inter la postuloj al lojaleco kaj obeo faritaj ĝianome, kaj tiuj de la spirito de Kristo. Trakti malobeon al la leĝo kiel malgravaĵon ja ne estas agi laŭ lia spirito; tamen, neniu Kristano, vokite elekti kiun Mastron li obeos, povas eĉ momenton heziti. Ŝajnas al mi, ke se iu estas preta en vera martiro-spirito leviĝi super la moralan normon de la nacio, kaj servi sian landon laŭ plej alta senco per malobeo kaj kontraŭstaro al tiuj ĝiaj postuloj, kiujn en la koro li kredas malbonaj kaj malpiaj, estas neeble rifuzi al li la respekton kaj admiron, kiun oni sentas por la martiroj de antaŭa tempo. Mi ja ne scias kiamaniere la nacia normo de devo estas plialtigebla —alivorte, kiel la nacio iam povas plene Kristaniĝi— krom per la fideleco de individuoj, ĉiakoste kaj ĉiariske, al koncepto pri devo pli alta ol tiu de la nacio ĝenerale.

Ĉi tie, kompreneble, nin frontas la demando: Ĉu nia koncepto pri devo ja vere *estas* pli alta, ol tiu de la nacio?

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Ĉu efektive la instruo de Jesuo Kristo vokas nin rifuzi partoprenon en kia militado ajn?

Al mi ŝajnas, ke pri tiu temo ne nur la atesto de la Amikoj, sed ankaŭ la instruo de la Majstro mem multe, kaj iasence neeviteble, miskompreniĝis. La temo estas profunde malsimpla, kaj multo dirita kaj skribita pri ĝi sonas tute sensubstanca kaj nepraktika, pro tio, ke sufiĉe kompreniĝis nek la profundo kaj komplikeco de la malbono, nek la amplekso kaj plena signifo de la principoj kiujn ĝi kontraŭbatalas. "Mi diras al vi: Ne kontraŭstaru al malbono; sed al tiu, kiu frapas vian maldekstran vangon, turnu ankaŭ la alian." Ĉi tiuj vortoj celas ja ne sklavan submetiĝon, aŭ mildan indiferenton, sed obstinan persiston en benado—sentiman venkon de malbono per bono. Ili estas pli ĝustadire alvoko al senŝanĝa kaj fundamenta principo, ol nura kondutregulo. La tuta teksto odoras spiriton de arda konfido al la supereco de bono—al la povo de la Perfektulo, kiu levigas sian sunon sur la malbonulojn kaj la bonulojn, kaj sendas pluvon sur la sendankajn kaj la maljustajn; ĝi vokas nin esti perfektaj, kiel ankaŭ nia Patro estas perfekta. Ĝi estas ne konsilo ke ni forlasu eĉ iomete la konflikton kontraŭ malbono, sed certigo ke Tiu, kiu estas kun ni, estas pli forta ol ĉiu, kiu povas esti kontraŭ ni, kaj ke liaforte, per bono kontraŭbatalante malbonon, ni povas kaj devas ĝin venki.

Kiu volas sekvi Tiun, kiu tiel parolis, devas leviĝi super ĉiun personan konsideraĵon, kaj super la tenton al revenĝo—ne cedi al ili. Jen, sendube, la spirito en kiu William Penn gajnis siajn venkojn en la fruaj tagoj de Pensilvanio—tiujn venkojn sensangajn, pro kiuj ĉe la Indianoj, kun kiuj li faris traktaton de paco neniam

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

rompitan, lia nomo ĝis hodiaŭ restas vorto amata kaj honorata. Kiam li, kaj liaj sekvantoj, ŝanĝis ilian malkonfidon kaj malamon en firman amikecon, ili tion faris ne kuŝigante sin kiel ŝafoj buĉotaj, sed antaŭenirante al ili renkonte, kun manoj malfermitaj kaj koro fidema, respekte kaj malavare konsentante iliajn rajtojn, kaj pagante al ili justan prezon por iliaj landoj.

Ni estas vokitaj ne malaltiĝi ĝis la nivelo de batalantaj pajenoj,* sed leviĝi super ĝi. Ekzistas malalto pli profunda ol tiu de la milita spirito—la malalto de sinplaĉa mamonadoro, kiu (mi hontas ĝin konfesi) povas sin maski sub la nomo "ne-rezisto." Kiam la salo tiumaniere sengustiĝas, ĝi ja taŭgas por nenio, krom por esti elĵetita kaj piedpremita. Tamen, mia nuna temo estas ne la karikatura prezento, sed la esenco kaj vera signifo, de tiu "atestado kontraŭ ĉia militado," kiu dum ducent jaroj estis samtempe la fiero kaj la riproĉo de la Kvakerismo. Ili troviĝas en la fakto, ke unuope la Amikoj, kiel individuoj kaj kiel societo, gvidiĝis per obeo al la spirito de Kristo sin deteni de batalado, kaj, kiom tio estas ebla, sin liberigi de ĉia partopreno en malpaco kia ajn. La konstato de tiu fakto, kiel firma kaj komprenebla starejo, tute ne estas provo (aŭ montro ke estas necese) starigi ĝeneralajn kaj ĉionampleksajn kondutregulojn aplikeblajn al ĉiu okazo, ĉiu persono, kaj ĉiu socio. Efektive, la formulado de tiaj ĝeneralaj reguloj estas fremda al la spirito de la Kvakerismo. Sin cedi senrezerve al la Dia gvido; firme, kaj ĉiakoste, rifuzi partoprenon en tio, kion la propra konscienco instruiĝis kondamni—jen la antikva kaj netaksebla kvakera idealo. Ĉu ĝi ne estas la plej bona, la plej efika, kaj la

* Pajeno:—*A.*, pagan; *F.*, païen; *I.* pagano; *Ekl. Lat.*, paganus.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

plej Kristana maniero atesti kontraŭ malbono, kaj veki la konsciencojn de aliaj ?

Ke malpaco kaj malkonkordo, aŭ internacia aŭ interindividua, estas grandega malbono—tion, mi kredas, neniu Kristano, eĉ neniu raciulo, povas dubi. La demando, pri kiu ni Amikoj malsame kredas ol aliaj Kristanoj, estas ne la demando ĉu la paco estas dezirinda—ĉu efektive ĝi ne devus esti la celo de ĉiu politika klopodo—sed la demando pri la rimedoj ĝin akiri aŭ konservi. Aliaj Kristanoj ne neas, ke kverelado kontraŭas la spiriton de Kristo. Niaflanke, ni ne neas, ke oni devas konstante fari sanktan militadon kontraŭ malbono ĉiuforma. Sed la uzon de perforto por batali la perforton ni opinias procedo sinmortiga kaj senutila ; ni sentas, kiel Kristanoj, ke la iloj de nia militado ne estas laŭkarnaj. Ni ne povas, per konsento fari militan servon, nin meti absolute je la dispono de potenco, kiu iam ajn povas uzi siajn soldatojn por celoj tiel dubindaj kaj ofte tiel nesanktaj.

La tiala rifuzo partopreni militadon iamaniere ajn ja estas tute malsama afero ol la starigo de ĝenerala teorio pri ĝia "malpermeseco." Mi konfesas, ke al mi ŝajnas nek prave nek saĝe, mallaŭdi tiun, kiu agas obee al sia kredo pri devo, kiom ajn ĝi diferencas de la nia. Mi opinias, ke neniom utilas ignori la forton de la konsideroj, kiuj al multaj ŝajnas pravigi militon. Persone, mi estas preta konfesi eĉ plie, ke, pro la komplikaj cirkonstancoj de la mondo (inter kiuj troviĝas historiaj faktoj kaj traktataj devoj), ekzistas kazoj en kiuj oni povas havi efektivan devon batali por tio, kion oni kredas justa afero ; kvankam mi ne konkludas el tio, ke partopreno en tia milito estus pravigebla por ĉiu individuo.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Kiu dirus, ke en la tempo de la Hinda Ribelo, la General-gubernatoro de Hindujo malprave agis, permesante la uzon de armiloj por protekti la virinojn kaj infanojn? Mi dubas, ĉu iu Amiko tion asertus. Sed estas egale memorinde, ke al neniu vera Amiko konvenus la ofico Gubernatora. Mi supozas, ke neniu nacio, kiu de la komenco de sia historio estis plene Kristana, povus sin trovi en la situacio, kiun ni okupis en Hindujo en 1857. Se la tuta mondo estus Kristana, laŭ la vera kaj plena senco de la vorto, estas evidente, ke tiaĵo ne okazus. Se, de la komenco, ni estus estintaj nacio efektive kristana, nia tuta historio nepre estus diferenca, kaj (ni Amikoj kredas) senlime pli nobla.

Ni ne pretendas starigi ĝeneralan regulon, kies obeiĝo tuj kaj senofere forigus de la nacioj en ilia senregeneracia stato la militon. Nacion plene kristanan la mondo ankoraŭ ne vidis. Tre povas esti, ke tia nacio, se ĝi nun subite estiĝus, suferus nacian martiriĝon. Intertempe, tre malfaciligas la aplikon al nacia agado de puraj kondut-principoj la neperfekteco de nia Kristaneco, kaj la miksita kaj komplika naturo de naciaj aferoj. Sed tion diri ne estas nei, ke tiaj principoj ekzistas. Konfesi la malfacilecon, eĉ la neeblecon, de ilia subita kaj universala praktikigo, ne estas malkonfesi ilian fermentan povon. Kiam ni Amikoj diras, ke io estas "justa," ni ne aludas ian eksteran kaj rigidan kondutregulon, sed tion, kio en ĉiu individua kazo vere estas la plej bona kaj la plej alta agmaniero ebla por la koncernato. Dirante tion, mi ne asertas, ke la justo mem varias. Mi nur diras, kion kredeble malmultaj neus, ke la homa idealo pri la justo estas ne senmova, sed progresema.

Ni tamen diras plie, kion neas ja multaj, ke la idealo

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

rivelita al ni en la vivo kaj la vortoj de Jesuo Kristo nia Sinjoro, kaj grade ellaborita en lia popolo per lia ĉiam enestanta interna influo, estas la plej alta kaj la plej pura konceptebla ; kaj sekve, ke ĉia vera progreso nepre estas proksimiĝo al li. Tiu Kristana idealo, ekokupante la homan animon, nepre estingos la spiriton kiu kondukas al malpaco kaj batalo.

Estas ĝenerale supozite, ke la Amikoj ĉiaokaze havas skrupulon pri la uzo de fizika forto. Tiu ideo, mi kredas, neniel estas vera pri la Societo, kvankam ĝi povas havi faktan bazon rilate kelkajn individuojn. Kiel Societo, la Amikoj ĉiam konfesis la "justan aŭtoritaton de la civila magistrato," kaj, mi kredas, neniam disputis, ke estas permeseble uzi "la glavon" (kion ajn la esprimo signifas) por subteni tiun aŭtoritaton.* George Fox mem diversfoje admonis al magistratanoj, ke "ne vane ili portu la glavon," sed ke ili uzu ĝin por la puno ne de bonfarantoj, sed de malbonfarantoj.

Efektive, mi kredas, ke tio, kio igas la militadon malaminda por Kristanaj okuloj estas ne la uzo de forto, aŭ eĉ la suferado kiun ĝi kaŭzas, sed la pekaj pasioj aŭ "voluptoj" de kiuj ĝi naskiĝas, kaj kiujn, ho ve! ĝi tiel abomeninde servas. La senpasia puno administrita de senpartia kaj leĝe starigita aŭtoritato estas afero ja tre diferenca de tiu "reciproka mordado kaj formanĝado," kies forigo, ĉu inter nacioj aŭ inter individuoj,

* Mi kredas, ke apenaŭ estas trovebla Amiko kiu nomus la oficon de policano nepermesebla, aŭ skrupulus uzi forton por subteni ordon. Oni diras al mi, ke Amikoj ofte kaj sen mallaŭdo servis kiel specialaj policanoj. Rilate la mortpunon, la Jara Kunveno dum la lastaj kvindek jaroj efektive esprimis tre gravajn dubojn pri ĝia pravigebleco ; tamen, la temo estas traktata kiel afero "bezonanta la preĝeman konsideron de koncernatoj, ne kiel afero klara ĝis nedisputebleco.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

estas ĝuste tio kion la juro celas. Mi opinias, ke tiu, kiu postulas la pacon, ne povas kondamni suferadon kaŭzatan por ĝia subteno, krom pro ĝia senefikeco.

Mi konfesas, ke mi persone ne povas nei, ke laŭ ĉi tiu vidpunkto iuj militoj, aŭ, almenaŭ, iuj militaj agoj, tial ke ili havas la naturon de nacia policado, ŝajnas ne nur neeviteblaj, sed eĉ pravigeblaj. Do, kvankam mi apenaŭ povas koncepti militon kies origino kaj rezultoj ne estas malbono, mi ne povas kredi, ke ĉia milito estas kondamninda tute kaj senrezerve. Plie, ekzistas traktataj promesoj, ne subite malkonfeseblaj sen nacia mallojaleco, kiuj en difinitaj okazoj devigas batalon por protekti naciojn malpli fortajn. Ja ne decas, ke fervorante por la paco, oni ignoru aŭ malgravigu konsideraĵojn tiajn.

Mi opinias, unue, ke ili devus deteni nin de tro ampleksa ĝeneraligo. Dum ni mem senŝanceliĝe obeas tiun superan aŭtoritaton, kiu, ni kredas, instruis al ni manieron dediĉi niajn vivojn al la komuna bono pli altan, kaj nekonforman al la ekstera batalado; ni tamen devus ne mallaŭdi tiujn, kiuj estas pretaj oferi la vivon obee al la voko de sia lando, por defendi nin, aŭ prematojn en aliaj landoj. Ni tre zorge nin gardu, ke ni ne nomu peka agon, kiu povas esti sincere farita de bonulo en obeo al sia kompreno pri devo, kaj ni eĉ pli atente zorgu, ke dum ni pretendas stari pli alte, ni en la realeco ne hontinde malatingu la nivelon de tiaj homoj en nia propra vivo. Tamen, fideleco al la lumo kiun ni posedas estas malgraŭ ĉio ĉi nia nepra devo.

Kaj, due, ŝajnas al mi, ke la vera konkludo el konsidero pri la komplikeco de internaciaj aferoj estas, ke ankoraŭ ne venis la tempo kiam ĉiu publika ofico estas

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

tenebla por vera Kristano. Ankoraŭ, mi kredas, nia rolo pli estas fermenti la mondon, ol ĝin regi.

Antaŭ ol milito kaj batalado ĉesos okazi, la mondo devas fariĝi regno de nia Sinjoro kaj de lia Kristo. Kaj ĝis nun la mondo estas tre malproksima de konfeso tiun regadon alimaniere ol per vortoj. Tamen, ni ja "pretendas kaj nomas nin Kristanoj"; ni ja vivas en la plena lumo de la eterna evangelio; kaj kiom ajn ĝi estas malakceptita aŭ forĵetita, kiom ajn malmulte komprenas ĝian spiriton eĉ ĝiaj konfesantoj, ĝi tamen, malgraŭ ni, nin levis super la eblecon de plena pajeneco. Ni ne povas reveni al la malnova stato de aferoj, ĉe kiu la nacioj ne hontis barakti ĉiu por la propraj bagatelaj celoj, senkonsidere pri la interesoj de la aliaj. Nun estas kontentiga neniu restejo sur nivelo malpli alta ol tiu, kiun Kristo montris. Sub la nomo "altruismo," tion konfesas eĉ tiuj, kiuj traktas la Kristanan religion kiel eluzitan superstiĉon. Kaj ĉu ni, kiuj kredas ĝin la Povo de Dio por savado, povas fari alie, ol nin cedi kore kaj anime al ĝia emancipa influo—al ĝia nedetruebla, nerezistebla voko por vivado en frateco? Kiel, en la komenco, por kelkaj estis taglume klare, ke "Kristanoj ne povas batali," tiel nun, ne nur inter la Amikoj, sed en multaj aliaj Kristanaroj, energias la sama spirito, kaj konsciencoj vekiĝas kompreni, ke malpaco kaj venĝo kaj "egoisma singrandigo" estas tute malakordaj je la spirito de frateco kiu kuŝas ĉe la fundamento mem de Kristaneco. Ja necesas, ke ili vekiĝu. Nun, en la dekunua horo, kiam tuta Eŭropo sin preparas por milito [1889], ankoraŭ povas esti, ke la malmultaj en kiuj bruladas la pura fajro de Kristana fervoro vidos ekvenka kontraŭ premega pliforto la aferon de si mem kaj de sia

Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

Majstro. Sed, ĉu la nacioj aŭdos aŭ ne, kie ajn renkontiĝos du-tri Kristanoj, tie ankoraŭ estos protesto kontraŭ malpaco kaj egoismo.

Protesto kontraŭ malpaco kaj egoismo; ne nur kontraŭ malpaco, sed ankaŭ "kontraŭ la avidemo kiu naskas malpacon." Ĉar tiu, kiu esploras la radikon de la afero—kiu vere deziras fari sian eblon forigi de la mondo ne sole militojn kaj batalojn, sed premon kaj kruelecon ĉiuspecajn—nepre ekkonscias, ke unuapaŝe li devas mem liberiĝi de avideco.

Efektive, kiu povas dubi, ke precipe pro aferoj eksteraj kaj materialaj la nacioj kaj homoj treniĝas en konflikton? Kiu kuraĝus aserti, ke se neniu dezirus aŭ ricevi aŭ konservi pli ol sia ĝusta porcio de la riĉaĵoj de la mondo, estus tiom da batalado, aŭ da preparo por ĝi, kiom nun ruinigas la teron? Pri la ebleco de *ĝenerala* akcepto al arbitracio aŭ al malarmo oni povas esti skeptika. Sed skeptikeco pri la ebleco de malegoismo persona montrus blindecon tre alispecan. Ŝajnas al mi, ke por multaj la plej bona espero al povo fari veran kunlaboron ĉe la starigo de paco sur la tero, kuŝas en penegado sin kaj aliajn levi pli kaj pli alten super la avidan spiriton kiu naskas militon.

La Amikoj instruis antaŭ longe, ke (mi citas John Woolman) "en ĉiu grado de lukso estas la semoj de milito kaj premo." Ke lukso kaj krueleco parencas, efektive estas vero preskaŭ memevidenta; sed ĝi estas vero kiun oni facile povas forgesi; kaj mi timas, ke eĉ Amikoj tre povas teni la familiarajn atestojn kontraŭ ĉia militado kaj kontraŭ superfluaĵoj, sen viva sento pri ilia esenca interrilato.

Tamen, oni apenaŭ povas nei, ke la egoisma deziro al

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

nura plezuro, permesate regi, sin satigos koste de la sufero kaj seneco de aliaj—ke ĝi ja estas kaŭzo de tiu interpuŝiĝo por gajno, ĉe kiu la malforta estas piedpremita, kaj ĉiu furioza pasio stimulita.* La malfacilo de praktika atestado kontraŭ superfluaĵoj ne estas tiu, kiun kelkaj el ni sentas rilate militadon—nome, ke ni ne scias kie ĝin ekkapti, ke ŝajne nia persona kaj ĉiutaga konduto malmulte rilatas al aferoj de internacia politiko, kaj ke la tuta problemo forglitas el nia preno per sia vasteco mem. Ĉi tie la malfacilo pli ĝuste estas, ke penadi simpligi la vivon por ni mem kaj por aliaj *ne plaĉas* al ni; ke ni ne vidas la belon de la severeco; ke ni amas la molecon, aŭ cedas al ĝi pro manko de la puriga fajro de espero.

Tamen, en ĉiu epoko Kristanoj instigiĝis de neelradikebla instinkto iamaniere, kvankam ofte supermezure, malsaĝe, eĉ sindifekte, sin liberigi de luksa kaj sinindulga vivmaniero; ili sentis devon iradi kiel disĉiploj de Tiu, kiu "ne havis, kie kuŝigi sian kapon"; formeti ne nur ĉion pekan, sed eĉ ĉion pezan, por ke ili kuru la kuradon antaŭ ili metitan, ke ili boksu ne batante la aeron, sed kiel konkurantoj por la premio.

Efektive, estas tute nefacile difini precize kia aŭ kioma sindorloto estas malkonforma je Kristana simpleco, ĉar tio necese varias. Sed la principon mi kredas klara. En la vivo, kiel en la arto, ĉio nehelpa malhelpas. Por plena trafo de la vivcelo, oni forigu ĉion fremdan. Ĉe ĉiu speco de penado, morala, intelekta, aŭ korpa, la

* Mi kredas, ke estas ĝenerale sciate, ke multaj el la panikoj kiuj ofte mem naskas militon, kaj kiuj tendencas subteni la grandegajn kaj senmoraligajn ŝarĝojn de "armita paco," estas grandaparte okazigitaj de tiuj, kiuj havas financan intereson en ili por celoj aĝiotaj aŭ ĵurnalvendaj.

828225

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:51 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

esenca kondiĉo de vigleco estas severa fortondo de superfluaĵo. Ĉu estas verŝajne, ke la plej alta vivo, la vivo de la Kristano, estas ebla laŭ kondiĉoj pli facilaj ?

Kaj ju pli alta la vividealo, nepre des pli grandaj la oferoj, kiujn ĝi postulas. Dum oni leviĝas de la malpli ĝis la pli altaj celoj de la vivo, multaj aferoj necese iĝas superfluaj—alivorte, oni iĝas sendependa de ili, aŭ ilin preterkreskas. Ĉi tiu ideo tre diferencas de tiu pri asketa sindisciplino aŭ abnegacio; kaj certe ĝi estas pli sana kaj pli inda.

La kvakera idealo, laŭ mia kompreno, postulas konstantan pesadon de unu afero kontraŭ alia—konstanta pliŝato al la daŭra kaj profunda, ol al la pasema kaj supraĵa. "Pezeco" estas ĉe la Amikoj aprobesprimo karakteriza kaj forta. La ofero de radika kaj solida bono al ekstera parado estas abomeninda por la kvakera instinkto. "Sin etendi al la neatingebla," ekkapti ombrojn, kaj sin embarasi per pli ol estas bezona por simpla sana vivo, estas kontraŭ ĉiuj niaj plej bonaj tradicioj.

Por tiu, kiu memoras la esence relativan signifon de la vorto "superflua," estas evidente, ke tia atesto kontraŭ "superfluaĵoj" ne estas rigida regulo aŭ troŝparemo rilate eksterajn aferojn. Efektive, ŝajnas al mi, ĝi postulas almenaŭ tiom klare la malavaran uzon de ĉio vere helpa al "nia plej bona vivo," kiom la forlason de malhelpaj superfluaĵoj. Sendube atesto kontraŭ superfluaĵoj tre povas degeneri en formalecon, kaj per misapliko fortranĉi multon vere sanan, bonan, kaj belan. La Arto grandaparte ekziliĝis for de multaj kvakeraj hejmoj; kaj tia severa rigoreco, kaj eble ankoraŭ pli la tre natura reakcio kontraŭ ĝi, sendube estis kaŭzo de iom

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

multa malbono. Tamen, mi kredas, ke estus tute erare supozi, ke la ekstrema simpleco de vestaĵo kaj de aliaj ĉirkaŭaĵoj kiun elektis la pli rigoraj Amikoj, kaj kiun la Societo iam faris afero de disciplino, origine alpreniĝis kun celo sinhumiliga aŭ asketisma.*

Mi kredas, ke laŭ senco tre profunda, la asketismo kontraŭas al la vera kvakera spirito, kiu deziras en ĉio ne sin intermeti en la Dian disciplinon kaj gvidon, kaj kiu, mi kredas, rigardus la ideon de memelektitaj ekzercoj por subigi la karnon same malfavore, kiel antaŭaranĝitajn formojn de diservo. Ofte okazis, sendube, ke Amiko kredis necese submetiĝi porti la "simplan vestaĵon" "kruce al" natura inklino, kaj sentis tion valora ekzerco. Sed la simpleco ne estis elpensita tiucele; ĝi estis elektita (aŭ pli ĝuste, kiel Amikoj dirus, gvidis al ĝi la Vero) pro sia esenca konveneco kaj dececo. Ĝi rezultas el la instinkte sentita neceso, ke ĉio subiĝu al principo. Ĝia ĉefa signifo kuŝas en tio, ke ĝi estas protesto kontraŭ sklaveco al pasantaj modoj—jen kial ĝi estas kostumo konstanta. Oni sentas ankaŭ, ke la vestaĵo mem devus elmontri tiun internan spiritan trankvilon, kiu nature ne tendencas al ekstera ornamo; la konata Amika kostumo do estas ekstreme sobra kolore kaj simpla fasone.

Signife estas, tamen, ke precize difinita kvakera kostumo ne ekzistas. Certe la vestaĵo mem aspektas sufiĉe neta, kaj, al la nesperta okulo de ekstera observanto, povas ŝajni, ke ĝi prezentas senvarian samecon—tamen, vere ĝi ne estas uniformo samsence kiel la kostumo de monaĥino aŭ de soldato. Ĉiurilate, ĝi estas kreskaĵo,

* Per "asketismo" mi celas la praktikon de ajna homelpensita religia aŭ spirita disciplinado; aŭ memelektita, aŭ preskribita.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

tradicio, lingvaĵo; kaj ĝi povas ricevi konstantan se malrapidan modifiĝon. Fakte, ĉiu tute simpla vestaĵo de mallaŭta koloro, sen ornamo aŭ garno, se kutime portita, efektive estas kvakera kostumo; kvankam unu du detaloj kvazaŭ akcidente akiris tradician signifon kiel distingiloj, kiujn, laŭ sia sento pri insignoj, oni povas alpreni aŭ ne. En la nuna tempo, kelkaj Amikoj kontraŭas tion pro principo. Aliaj ankoraŭ vidas en ili "barilon" aŭ ŝirmilon. Kelkaj, plie, kredas, ke inter Amikoj ili faras utilan kaj bonan servon kiel koniloj, kaj ke ne estas malbone, ke eĉ por eksteruloj la Amikoj estu facile rekoneblaj. Sed la grava principo, kiun la Societo kiel tuto ĉiam konfesis, estas, ke sin klinante ĝis konstanta aliigo de la fasono de sia vesto obee al la kaprico aŭ la ŝanĝemo de la amaso, oni malŝparas tempon kaj monon por kiuj Kristana virino apenaŭ povas ne trovi pli bonan uzon. "Simpla Amiko" estas tiu, kiu sin vestas laŭ la firmaj principoj, kiujn li mem trovas aprobindaj, ne sklaviĝante al la pasantaj modoj.

Facile estas diri, ke li nur interŝanĝas unu servutecon por alia. Ja povas esti, ke tio foje okazis, kaj ĉe kelkaj familioj aŭ kunvenoj okazas eĉ nun. Sed la kristaliĝo en rigidan formalecon, kvankam ebla tendenco, neniel estas parto de la vera kvakera idealo.

Rilate la alprenon de definitiva kostumo pro konvinko, almenaŭ en matura vivo, mi persone forte sentas, ne nur ke pro moralaj kialoj tia vestmaniero estas la ĝusta kaj la plej digna, sed ankaŭ, ke la efektiva sperto montris, ke ĝi liveras pluan pruvon pri la vero, ke la vivceloj malpli altaj povas prosperi nur kiom ili restas submetitaj al la pli altaj. La liberiĝo de neceso por

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

ĉiama ŝanĝo, krom tio, ke ĝi ŝajnas al Amikoj rekomendinda kiel konvena al la digno de "virinoj konfesantaj la piecon," havas ankaŭ la malpli altan utilon, ke ĝi permesas gradan perfektigon de la definitiva kostumo mem. Ĉiu scias, kiel admirinda, en sia severe limigita kampo, la rezulto povas esti. En la vestaĵo de kelkaj ankoraŭ restantaj reprezentantoj de la malnova skolo de Kvakerismo, la senmakula delikateco, la precizeco kaj perfekteco de simpla bonkvalita kudraĵo, la ripozeco de la molaj nuancoj, kune produktas rezulton, kies kvieta belo havas por la menso kiel por la okulo apartan ĉarmon. Mi ne povas opinii, ke tiu muta elokvento estas malŝatinda; aŭ ke la zorgo, ke eĉ la vestaĵo mem parolu lingvon de trankvilo, mildeco, kaj pureco—ke ĝi portu sur si kvazaŭ tuŝon de la eterno—estas afero ne inda la atenton de Kristana virino.

La principo de Kristana simpleco, laŭ nia kredo, devus aplikiĝi en ĉio—vestoj, mebloj, moroj, kaj parolmaniero—ĉio devus forpuriĝi de superfluaĵoj, kaj de nura imito kaj formaleco. Ekzemplo de ĉi tiu provado kribri for de nia parolo ĉian troaĵon kaj ĉian makulon de flato kaj superstiĉo, estis la "simpla lingvaĵo"; plej bone konata pro la uzo de *ci* anstataŭ *vi* ĉe parolo al nur unu persono; kaj de la vortoj *unua*, *dua*, k.c., por la tagoj de la semajno kaj por la monatoj, anstataŭ la ordinaraj nomoj "derivitaj de pajenaj diaĵoj." Kiel oni scias, multaj el la nuna generacio de Amikoj plene forlasis tiajn apartaĵojn. La lingvaj kaj moraj ŝanĝiĝoj de ducent jaroj forigis de tiaj esprimoj multe da ilia originala signifo, kaj sendube la nuna tendenco estas al la forviŝo de ĉiu apartaĵo. Tamen, laŭ la pli larĝa senco, ankoraŭ troviĝas ĉe ni speciala atento al simpleco kaj garditeco de parolo, kaj

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

certe ĝi estas afero tre inda prizorgon, ne nur pro motivoj malaltaj, sed pro la plej altaj ankaŭ.

La principo de skrupula gardo super la lipoj, tiel forte karakteriza de ĉiuj Amikoj indaj la nomon, kulminas ĉe ilia unuvoĉa atesto kontraŭ ĵurado. Tion, efektive, la Amikoj ĉiam opiniis afero de simpla obeo al klara ordono de Jesuo Kristo; kaj mi kredas, ke nenio krom longa kutimiĝo povus konsentigi sinceran disĉiplon al la ordinara interpreto de liaj vortoj; t.e., ke li malpermesis nur la blasfemadon, aŭ "profanan ĵuradon."* Ĉi tiun skrupulon sentis ankaŭ multaj, kiuj ne estas Amikoj. Tamen, nedisputeble al nia Societo apartenas la kredito de tio, ke per longa kaj severa suferado pro sia "atesto," ĝiaj anoj havigis klaran leĝan konsenton, ke sufiĉas ilia simpla deklaro. Tion farante, ili starigis principon, kiu nun komencas esti konfesata ĝenerale—la principon ke por ĉiu kazo oni havu la saman regulon, la verdiron; ke oni sentu sin ligita egale per sia vorto kiom per skribita kontrakto. Apenaŭ estas dubeble, ke per tiu simpla kaj sendekliniĝa obeo al la klara ordono de Jesuo Kristo, la Amikoj faris multon por plialtigi la normon de verparolo en nia lando.†

La rifuzo pagi dekonaĵojn estas parto de la atesto kontraŭ pagita ministrado, pri kiu mi sufiĉe parolis en la antaŭa ĉapitro. Ĉi tie nur estas bezone diri, ke en ĉiuj ĉi kazoj de rezisto al la postuloj de aŭtoritato—por

* "Mi diras al vi: Tute ne ĵuru, nek per la ĉielo . . . nek per la tero, . . . nek per via kapo . . . Sed estu via parolo, jes, jes; ne, ne; ĉio ekster tio ĉi estas el malbono." (*Mateo* v, 34-7.)

† La venko, kiun la Amikoj tiel gajnis, preparis la vojon al pli granda libero por ĉiuj; kaj nuntempe ĉiu ("konfesanta kun ni" aŭ ne), kiu pro religia skrupulo ne konsentas ĵuri, estas egale libera fari deklaron.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

milita servo, por ĵuro, aŭ por dekonaĵoj—la celo estas je la propra kosto atesti kontraŭ postulo nejusta aŭ malpia. Mi opinias, ke oni rajtas pretendi, ke proprakoste oni rifuzas postulon eĉ pormonan, kiam la postulanto havas povon preni la monon aŭ ĝian ekvivalenton perforte, kaj kiam oni neniam rezistas tiun perforton. Fojon post fojo Amikoj pacience submetiĝis al la forpreno de sumoj multe pli grandaj ol la originale postulataj, ankaŭ al severa kaj eĉ dumviva malliberecco, kaj aliaj punoj, prefere ol per propra ago konsenti al devigoj kies originon aŭ celon ili kredis maljusta. Antaŭ tiaj pruvoj pri neprofitemo, oni apenaŭ povus miskompreni la motivon por la rifuzo pagi. Rilate dekonaĵojn, tamen, pro la *Tithes Commutation Act* [pridekonaĵa leĝo], la cirkonstancoj fariĝis tiel komplikaj, ke nur malmultaj Amikoj nun sentas rifuzon pagi ilin konvena metodo atesti kontraŭ pagita ministrado. En 1875, la Jara Kunveno jene protokolis sian senton pri la aliiĝo en la stato de la afero : " La kunveno kredas, ke la tempo nun venis, kiam la metodo fari ĉi tiun ateston devas lasiĝi al la konsciencoj de Amikoj individue."

Inter malpli gravaj aferoj pri kiuj pro principo Amikoj kontraŭstaris la ordinarajn morojn, oni povas citi " la superstiĉan observon de tagoj," precipe la observon de fastoj aŭ dankfestoj preskribitaj de la civila registaro (kiun ni ne opinias kompetenta preskribi devojn religiajn); la porton de funebra vestaĵo, kaj la meton de " laŭdaj surskriboj " sur tombŝtonojn. En Amika enterigejo oni permesas nenion krom la nomo, kaj la datoj de naskiĝo kaj morto. La portado de funebro estas evidente nekonsilinda, pro tio, ke ĝi okazigas nenecesan elspezon kaj zorgon, en tempo kiam la menso devus esti

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

lasita kiom eble sen ĝeno; kaj ankaŭ ĉar ĝi estas esprimo (kaj esprimo tiel formala, ke ĝia sincereco estas dubebla) de malĝojo kaj melankolio rilate Diajn disponojn, kiujn, kiom ajn dolorajn, oni devus deziri akcepti kun kontenta submetiĝo. Klare, multo estas direbla subtene de ĉi tiu apliko de la principo ke oni simpligu siajn morojn, kaj konformigu siajn vestojn kaj aliajn ĉirkaŭaĵojn pli al la daŭraj ol al la pasemaj cirkonstancoj de sia vivo.

La kiom ebla simpligo de la vivo—ĉu tio mem ne estas inda celo; eĉ plie, nepra necesaĵo por atingi la bonegecon?

Ni ĵus traktis aferojn kompare negravajn—pajlerojn, kiuj montras, kiel afero pli solida ne povus, la direkton de la vento. Ili estas gravaj, ne en si mem, sed rilate al la principoj per kies obeo ili ellaboriĝis. Simpleco—"la simpleco kiu estas en Kristo"—la simpleco, ne de elbaro, sed de Dia ĉionsubiga superegeco—jen la reganta noto de nia idealo, kaj ĝi estas noto al kiu la homa koro iagrade ĉiam respondas. Funde de ĉia arto, de ĉia belo, kaj (ĉu mi ne povas aldoni?) de ĉia bono, kuŝas la principo de submeto—la neceso por ĉiama elekto inter la daŭra kaj pasema, la esenca kaj la supraĵa. La Kvakerismo estas sincera penado obei ĉi tiun principon en la Kristana vivo; pesi "en la pesilo de la sanktejo" la nutron kiu daŭras, kontraŭ la nutro pereema; alkroĉiĝi al la eterna, ofere, se necese, de ĉio tempa.

Kompreneble, mi ne estas tiel absurda, kiel pretendi, ke ĉi tiu penado estas aparta al la Kvakerismo. Mia celo en ĉi tiu libro estas montri la eternajn kaj firmajn principojn de vero, al kiuj la Kvakerismo alvokas—ĝiajn fortikaĵojn. Kaj mi kredas, ke en la nunaj tagoj

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

de rapida kresko en ĉiu materiala kaj intelekta riĉo, la severa forkribro de aferoj flankaj kaj nenecesaj, kiu kuŝas funde de nia ribelo kontraŭ akceptitaj ekleziaj ritoj, kaj kiu detale branĉiĝis en ĉi tiujn malpli gravajn atestojn (ofte rigide kaj foje eĉ ridinde ellaboritajn de individuoj), estas procedo ĉiam pli urĝe bezonata.

La ĉiama danĝero, ke oni fordonu sian laboron kaj vivon "por tio, kio ne kontentigas," neniam estis pli granda ol en la nuna tempo de rapidado kaj pleneco, kiam nur por stari senmove estas necese fari decidan volpenon. Ĉe kiom multaj la vivo portiĝas antaŭen, de fluo kiun ili ne scias rezisti, al celoj kiujn ili nur malprecize konscias, kaj enkore sentas senvaloraj! Ĉu la servuto al eksteraĵoj estis iam pli prema, ol ĝi nun estas por multaj, kiuj ŝajne estas, kaj devus vere esti, plene sendependaj de ili? Kiomaj atingis la nedireblan ripozon havi la pezcentron en la ĝusta loko, sin apogi sur nenio povanta cedi?

Ekzistas nenia "reĝa vojo" sin liberigi de superfluaĵoj. Ĝi estas dumviva procedo de severa puriĝo, kiu ĉiupaŝe postulas la oferon de la malpli alta al la pli. Sed ĝuste kiel ĉi tiu severeco estas la necesa prezo de atingo al la plej alta, tiel ankaŭ ĝi estas la sorĉo per kiu vivo kaj signifo kaj valoro doniĝas al la malpli alta. Ĝi bruligas, sed ĝi ankaŭ briligas; dum ĝi detruas ĝi radiigas. Mi kredas, ke nenio montriĝas plenvalore, krom kiam ĝi estas ĝuste submetita al tio, kio estas pli grava. Oferante la pli altan al la malpli, ne nur oni marĉandas malprofite, sed ĝuste la aferon mem kiun oni tiel aĉetas, oni samtempe difektas. Tio, kion oni idoligas, polviĝas en la procedo. Kontraŭe, la idolo kiun oni kuraĝas detronigi povas per tiu ago mem ricevi

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

la vivon. De homa amo la plej intima, ĝis la plej bagatela ekstera ornamo, ĉio bela ŝuldas la perfektecon al deca submetiĝo je tio, kio estas ankoraŭ pli alta. "Kiu perdos sian vivon . . . tiu savos ĝin." Malfacila parolo, efektive, sed neŝancelebla kiel la nepereema roko.

Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from
NEW YORK PUBLIC LIBRARY

ĈAPITRO VI

NIA MISIO

Mi nun provis klarigi la principojn kaj morojn al kiuj, kiel Societo, ni kondukiĝis per (laŭ nia kredo) obeo al la Spirito de la vero. Mi scias, ke al niaj kunkristanoj ŝajnas, ke kelkrilate ni eraris pri la voĉo de nia Gvidanto, kaj ke, eble pro manko de scio, sed tamen plorinde, ni forbaras nin de plej valoraj privilegioj, eĉ konscie ignoras plej sanktajn ordonojn. Tre grava, do, estas la demando pri kiu ni tiel diferencas de preskaŭ ĉiu cetera Kristanaro:—Kio, efektive, estas esenca Kristaneco?

"Per iliaj fruktoj vi ekkonos ilin." Ja maldece estus, ke mi provu taksi la relativan fruktoportecon de tiu branĉo de la Kristana Eklezio kiun mi aniĝis, kaj de tiu branĉo, en kiu mi edukiĝis. Mi estas okupinta min sole pri nia idealo, ne pri la grado de nia sukceso aŭ ne ĝin realigi. Mi tamen sentas devon diri, ke mi ne povas akordigi la fakton de la signoj de vivo kaj spirita energio, kiujn mi trovas interne kiom ekstere de la Societo, kun la ideo, ke aŭ unu aŭ la alia estas vere disigita for de la radiko de la vivanta Vinberujo. Ĉu de tio sekvas, ke niaj apartaj principoj kaj praktikoj estas sen graveco?

Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

Mi mem ne povas kredi, ke tio estas rajta konkludo el la konsentita fakto, ke interne de niaj limoj kiel ekstere, troviĝas vivoj sendube sanktaj kaj Kristanaj. Efektive, ĉi tiu fakto ŝajnas montri, almenaŭ, ke ne ĉio dependas de aŭ observo aŭ neobservo de eksteraj ordinancoj—ke bonfide oni povas ilin aŭ uzi aŭ forlasi sen detruo de la Kristana vivo. Tamen, tiu konstato ne konfliktas kun kredo, ke en demando pri ordinancoj kaj ordinacia ministrado implikiĝas rezultoj profunde gravaj por la karaktero de nia Kristaneco, kaj ke pro tio estas dece provi ĝin kompreni kiel eble plej klare.

En ĉi tiu demando kuŝas la ŝlosilo mem de la situacio, kiun okupas la Societo de Amikoj kiel kredantaro aparta. Ni kredas, ke en la nuna tempo ni vokiĝis subteni nian lokon en la universala eklezio speciale kiel atestantoj, ke la spirita vivo ne dependas de eksteraj ordinancoj.

La gravecon de nia aparta pozicio iom kaŝis al kelkaj inter ni la fakto, ke ne plu ni povas havi kontraŭ Kristanoj alikredaj la intense bataleman sintenon de la fruaj Amikoj. Ili kredis, ke ili havas devon ataki la "salajrulajn pastrojn" de tiu epoko kiel "renegatojn," kaj subtenantojn de la misteraj povoj de mallumo. Sed en la nuna tempo tia juĝo montrus aŭ plej densan senscion, aŭ efektivan frenezon. Ni ne povas ne scii, ke granda plimulto el la pastraro estas inter la plej sindonaj kaj malprofitemaj el la filoj de lumo, uzantaj sian oficon, kun ĉiu cetera forto korpa aŭ mensa, por antaŭenigi la Dian regnon kaj disprediki la evangelion. Nenion ni pli deziras, ol batali kun ili, flankon ĉe flanko, kontraŭ la komuna malamiko; kaj efektive ni ofte troviĝas asociintaj kun ili ĉe tia laboro.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Simile, estus neeble por ni nuntempe paroli samtone kiel la fondintoj de la Societo, kvazaŭ ni posedas tioman lumon, ke per komparo ĉiu cetera Kristano estas opiniebla palpanto en densa mallumo. Foje la fruaj Amikoj parolis pri la "ekapero de la evangelia tago" per la rivelo farita al ili, kvazaŭ tio estis preskaŭ tiel grava kiel ĝia unua proklamiĝo dekses jarcentojn antaŭe. En la nuna tempo ni ne povas honeste aŭ juste pretendi starejon tiel ege superan je tiu de niaj najbaroj. Ĉiuflanke ni vidas montrojn de fideleco kaj fruktodono, kaj brilon de ekzemploj kiujn ni ĝojas admiri, kaj deziras imiti.

Kaj pro tio, mi kredas, sentiĝas pri nia relativa situacio en la Kristana Eklezio ia malcerteco kiu estas kaŭzo de ioma malforto inter Amikoj. Kelkrilate, estas pli facile konservi sintenon de batalemo, ol de nura kvieta aparteco; kaj en la nunaj tagoj de libera interŝanĝo de sento, ne estus mirinde, se kelkaj el niaj anoj, precipe el la pli junaj, komencus iomete pridubi la gravecon de nia pozicio aparta. Ĝi efektive estas pozicio ne daŭre okupebla krom rezulte de spirita disciplino profunda kaj penetra. La atesto kontraŭ dependo de eksteraĵoj estas trafa nur se ĝi rezultas el la propra sperto. Por kompreni la valoron de atesto al la sufiĉeco de la pure spirita, oni devas mem dekutimiĝi de ĉia sopiro al la ekstera kaj palpebla; kaj tiu dekutimiĝo ne estas procedo facila, aŭ heredigebla de generacio al generacio. Se la pli junaj Amikoj ne instruiĝos en la sama severa lernejo kiel iliaj prapatroj, ili nepre ne konservos la teron kiun gajnis la fideleco de antaŭa generacio.

Aliaj aferoj ankaŭ, mi kredas, tendencis malklarigi nian rilaton kun la ekstera mondo, kaj akcenti kiom

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

grave estas, ke Amikoj pririgardu sian vojon, kaj konsideru kien ĝi kondukas—ĉu ni vere gardas la pozicion kies defendo estas nia speciala devo, aŭ ĉu ni lasas nin forlogiĝi celi al aferoj malpli gravaj. En la ĉeffluo de la Societo estas multaj sub- kaj kontraŭfluoj, kaj ĝia lastatempa historio estas unu de ŝanĝo kaj reakcio; do por novalveninto estus malfacile kaj tromemfide provi antaŭdiri ĝian estontecon. Tamen, mi permesos al mi priskribi kelkajn tendencojn kiuj energiis kaj ankoraŭ energias ĉe ni, preparantaj la kondiĉojn de nia laboro estonta.

Estas bone sciate, ke la Societo, kiu tre rapide estiĝis meze de la dek-sepa jarcento, en la dek-oka komencis malplinombriĝi, kaj multajn jarojn daŭre malkreskis. En multaj partoj de la lando, kie iam estis malfacile trovi lokon por ĉiu ĉeestanto, nun staras kunvenejoj fermitaj kaj benkoj malplenaj. Sed en la lastaj kvar- aŭ kvindek jaroj, nia nombro komencis malrapide kreski; kvankam la kresko tiagrade malatingis proporcie tiun de la ĝenerala loĝantaro, ke iasence oni povas diri, ke kompare kun aliaj sektoj ni ankoraŭ perdas teron. La efektiva kresko, tamen, kvankam malgranda, estas fakto signifa.*

La grandan malkreskon dum la dek-oka jarcento, kaj parto de la dek-naŭa, kredeble kaŭzis, almenaŭ parte, la fakto, ke post la fruaj jaroj de kresko kaj persekuto sekvis tempo de ekstera trankvilo, en kiu la valoro asignita al kion oni povas nomi kvakera tradicio iĝis

* La nombre da anoj, laŭ la etato de 1862, tiam estis 13,844; en 1889 ĝi estis 15,574. Antaŭ 1862 oni ne raportis pri la nombroj. (En 1914, la nombro da anoj laŭ la oficiala etato estis 19,962. La ciferoj rilatas nur al la "Londona Jara Kunveno." En la mondo estas ĉirkaŭ 150,000 "Amikoj." *N.d.l.t.*)

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

troa, kaj pro tio la disciplino de la Societo tro rigidiĝis. Ĝi ankaŭ aplikiĝis kun severeco klare ne tute saĝa aŭ sana; kaj kredeble eĉ pli prema per sia rigideco kaj detaleco de kontrolo estis la malpli difinita detena influo de publika opinio en la limoj de sekto malgranda kaj tre ekskluziva. Ĝis antaŭ ĉirkaŭ kvindek jaroj, oni preskaŭ senescepte eksigis ĉiun anon, kiu edziĝis "ekster la Societo," t.e., kun neano. Estas facile kompreni, ke tiu kutimo faris multon ne nur malpligrandigi la nombron da anoj, sed ankaŭ, kredeble, fremdigi la koron de postaj generacioj. Tiom da junaj anoj perdis aŭ rezignis anecon pro tiu aŭ simila kaŭzo, ke se nenia ŝanĝo fariĝus, la tempo estis antaŭvidebla kiam la Societo ĉesus ekzisti.

Sed en la frua parto de la dek-naŭa jarcento—rezulte, grandaparte, de la influo de Joseph John Gurney kaj lia fratino Elizabeth Fry—leviĝis nova ondo de religia kaj bonfara agemo; kaj ĉirkaŭ samtempe, kvankam kun kioma rilato al tiu impulso mi ne scias, okazis sufiĉe granda malrigoriĝo de disciplino. Ne nur malpliseveriĝis la praktiko rilate edziĝon ekstersocieten, sed multajn aferojn malpli gravajn, pri kiuj ekzistis ĝena kaj kredeble eĉ malutila rigideco, oni komencis lasi al persona juĝo. En 1861 okazis revizio de la "Libro de Disciplino," kaj la revizio reflektis kaj sankciis la malseveriĝon de disciplino rilate tiujn aferojn. En tiu jaro ellasiĝis la lasta parto de la kvara demando, pri "simpleco de parolo, konduto, kaj vestaĵo," kaj oni faris aliajn ŝanĝojn en la demandoj tiamaj. Kiel jam dirite, la Jara Kunveno ne plu postulas respondon al la demandoj, krom al tiuj rilatantaj regulecon en la okazigo kaj ĉeesto de kunvenoj. En la praktiko, ĉi tiuj ŝanĝoj signifas, ke la subteno de

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

ĉiuj niaj apartaj "atestoj" (kiel de tiu kontraŭ dekonaĵoj) estas nun "lasita al la konscienco de la individuo," kaj ne prienketita de la kunvenoj per disciplino. La tuja rezulto, kiel oni povas atendi, estis granda ekstera kaj videbla aliiĝo—rapida malapero de karakterizaj apartaĵoj, kaj sendube granda senŝarĝiĝo por la pli junaj anoj.

Alia, kaj pli rekta, rezulto de la "evangelia" influo de la Gurneyoj, kaj de aliaj Amikoj samideaj, estis la ekleviĝo de tajdo de agemo en ĉiuspecaj direktoj bonfaraj, filantropiaj, kaj misiaj. La antaŭa timo pri "agemo kreitaĵa"—alivorte, pri entrepreno de ajna religia laboro sen rekta instigo kaj eĉ deviga influo de supre—ŝajne iagrade anstataŭiĝis de timo enterigi sian talenton. La Kristanan devon eliri por serĉi kaj savi, diskonigi la vorton de vivo, kaj lasi sian lumon lumi antaŭ la homoj, jam bele ekzempligis kelkaj eminentaj geanoj. Multaj el la pli junaj Amikoj kaptis la flamon de ilia fervoro, kaj nuntempe de ĉiu direkto kuniĝas influoj, kiuj ŝajne preskaŭ neebligis tiun "kvietan sidadon," tiun atendadon, ĉe kiu pli frua generacio de Amikoj trovis sian forton.

Kun la nova tajdo de arda fervoro kaj bonfaro venis granda ŝanĝiĝo en la reganta tono de religia sento. La Biblio, kiun, pro timo ke la litero uzurpos la lokon de la spirito, Amikoj estis preskaŭ metintaj sub buŝelon, ekokupis situacion pli honoran, kaj oni komencis akcepti pli "evangeliajn" kredojn pri la unika aŭ escepta naturo de ĝia inspiriteco. Iom post iom, la gravecon antaŭe rezervitan por la ideo de "alrigardo por ĝusta gvido" oni atribuis al tiu pri la neceso instrui "sanan doktrinon"; kaj en kelkaj direktoj oni nun povas

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

rimarki videblan tendencon al pli da doktrina difino, kaj popularigo de metodoj, ol antaŭ kvindek jaroj estus toleritaj.*

Kvankam ĉi tiuj modernaj tendencoj sendube akompaniĝis de kresko de nia anaro, kaj kredeble iagrade kontribuis al ĝi, tiuj, kiuj sentas, ke la Kvakerismo havas sian radikon kaj forton en profunda sperto interna kaj spirita, kiu liberigas de ĉia dependo de eksteraj aferoj, de tempo al tempo forte protestis kontraŭ ili. En Ameriko la protesto kontraŭ (aŭ, kiel tiuj, kiuj protestas kredeble preferus diri—la enkonduko de) ĉi tiu moderna kaj kompare supraĵa fazo de religia agemo kaŭzis gravajn skismojn kaj bedaŭrindaĵojn. Je ĉirkaŭ la jaro 1826, gvidate de Elias Hicks, granda partio de Amikoj en tiu lando tute apartiĝis de la ĉefa aro; kaj la "ortodoksuloj" suspektas, ke konfesante obeon al la interna lumo, ĝi iĝis sekto pli-malpli unitariana aŭ racionalista. En Anglujo, tamen, la du ĉefaj fluoj antaŭeniris flankon ĉe flanko, kaj okazis nenia konsiderinda dividiĝo de la rivero.

Ambaŭ partioj pretendas sin apogi sur la principoj de la fruaj Amikoj. Tiuj, kiuj subtenas super ĉio la doktrinon de la interna lumo, kaj ke senpera inspiro kaj gvido estas nepre necesaj por la nasko de bona vorto aŭ faro, kaj aparte de vera adoro, povas abunde pruvi el la skriboj de Fox, Barclay, Penn, Penington, kaj aliaj patroj de la Societo, ke tio estis la fundamento kaj la konstanta temo de ilia instruo. Tiuj, aliflanke, kiuj sin

* Multaj aliaj kaŭzoj, kompreneble, kunhelpis okazigi la ŝanĝiĝojn aluditajn. Mi ne estas kompetenta provi priskribon iomete adekvatan, kiom ajn malgrandskale, pri la lastatempa historio de la Societo; kaj por la supraj vortoj mi celas nur ĝenerale montri la ĉefan dividon de penso ĉe ni.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

okupas el tuta koro kaj animo pri laboroj misiaj kaj "evangeliaj," diras ja vere, ke la fruaj Amikoj ne tiel "atendis gvidon" kiel esti kontentaj sidadi trankvile sen provo dispeli la mallumon ĉirkaŭan, kaj ke tio, kio altigis la individuan konscion ĝis la loko de superega aŭtoritato—kaj tiamaniere disvolvis pretendon al io parenca je persona senerareco—estis ne la "primitiva," sed la "mezepoka" instruo de la Societo.

Troviĝas danĝeroj, kompreneble, en ĉiu ekstremo—en la troŝato al videbla kaj palpebla agemo, kaj en la nedeca intenso de sinesplorema kvietismo. Troa "interneco" iafoje ŝajnas tendenci al spirito eksterordinare maldolĉa kaj juĝema, sub kies ombro nenia freŝa kresko estus ebla. Ĝi evidente endanĝerigas la cerban sanon. Troa "ekstereco" malfortigas kaj detruas la esencon mem de nia atesto, kuraĝigas senvaloran kreskon de dependo je homoj, kaj apenaŭ povas esti sen danĝero por sincereco. Sed tamen la kaŭzo de la divergo, mi kredas, kuŝas pli ĉe diverso de talento ol ĉe kontraŭo de principo. Ambaŭ funkcioj ja estas bezonataj. Kie fonto de vivo vere elŝprucas interne, ĝi nepre emas superflui. La folioj kaj floroj estas tiel necesaj por la sano kaj fruktodono de arbo, kiel la radiko. Kaj ŝajnas al mi, ke la sekreta forto de nia Societo, kaj ĝia aparta kvalifiko por servo en la nunaj tagoj, kuŝas en ĝia konscio pri la unueco de la interna kaj la ekstera, kaj en la profunda kaj pura spiriteco de ĝia celo rilate ambaŭ.

Ekzistas nuntempe, mi kredas kaj certas, speciala kaj urĝa bezono por tiu atesto al la lumo—lumo kaj interna kaj ekstera—kiu estis la aparta ofico de la frua Kvakerismo. Ke tiu Kvakerismo, kiel ĝi nun staras, estas la ilo plej taŭga komuniki tiun ateston al la nuna generacio,

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

mi ne estas egale certa. Sed se ne, kulpa grandaparte estas nia degenereco kiel Societo—nia falo en rigidan formalecon dum la dek-oka jarcento, kaj en vantan serĉadon por ŝatateco en la dek-naŭa. Sed malgraŭ ĉiu tia defalo dekstre kaj maldekstre, ŝajnas al mi, ke ankoraŭ restas en la maljuna arbo sufiĉe da vivo por freŝa elkresko de fruktodonaj branĉoj—ke la kadro de la Societo ankoraŭ estas tiel fortika kaj elasta, ke se nur la pli junaj anoj kontente kaj decide sin submetos al la necesa Dia disciplino, ĝi povos esti valorega ilo por nova generacio de Amikoj plenkonvinkaj. Nenia nova ondo de "agemo kreitaĵa," nenia prudenta adapto de Kvakerismo al modernaj gustoj, revivigos ĝian povon meze de la nuna generacio. Nur freŝa elŝpruco de la malnova povo —la senŝanĝa kaj neŝanĝebla povo de la lumo kaj vero mem—renkontita kaj invitita per freŝa submetiĝo de ĉiu koro, povas energiigi tion, kio malfortiĝas ĉe ni, kaj fari nin pli ol iam beno al la nacio.

Se ĉi tiu povo estus plene malaperinta el inter ni, malmulte utilus ameme priparoli ĝian forlasitan loĝejon. Sed ĝuste pro tio, ke inter nia tre disigita restaĵo, ankoraŭ restas iom de la antikva spirito, mi sentas deziron ĝin veki, ĉe niaj propraj anoj speciale, kaj se eble ankaŭ ĉe aliaj, per la sperto kiun nia Societo efektive akiris pri la povo de religio ekskluzive spirita.

Apenaŭ estas necese ripeti, mi esperas, ke tio, kion mi deziras servi kaj antaŭenigi, estas ne la Kvakerismo, sed la vero. Povas esti, ke la sekto ne plu estas bezonata, kaj ke ĝi destiniĝis al formorto—pri tio mi ne scias. Sed tiu vido al la vero, kiu trovis en la Kvakerismo sian plej emfazan esprimon—tiu adoro pure spirita, kaj tiu superegeco de la interna lumo, tiel forte prezentitaj de

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Fox kaj Barclay kaj Penington—ili havas ĉiaman valoron kaj efikon, kaj la bezono por ilia freŝa konfesiĝo ŝajnas en la nuna tago aparte urĝa.

Inter lumo interna kaj lumo ekstera, ja ne povas esti rivaleco. Lumo, ni scias, estas unu; kaj inter ĝiaj diversaj montriĝoj ne povas esti kontraŭeco, kvankam kompreneble povas esti multe da kontraŭeco inter la respektivaj vidoj de diversaj homoj. Efektive, ŝajnas egale vane serĉi perilon absolute senkoloran interne kiel ekstere, en la propra koro kiel en la Biblio aŭ la Eklezio; kaj oni devas esti preta akcepti korekton el ĉiu direkto. Tamen, por ĉiu devas ekzisti aŭtoritato plejalta, kaj mi ne scias kie ĝi estas trovebla alie, ol ĉe la Apudesto loĝanta en la plej interna kamero de la propra koro, ĉar nur per tiu aŭtoritato oni povas sin pravigi eĉ ĉe la elekto de gvidilo ekstera. Ja estas neeble, konante la brilon de lumo interna, pridubi ĝian superegan aŭtoritaton.

Parolo pri lumo brilanta en la propra koro kiel ne konkludiga por la individuo, estus preskaŭ kontraŭdiro inter terminoj. Sed ĝuste pro tio, ke ĝi troviĝas interne de la individua koro, ĝia kampo estas tre limigita. Tiu kialo mem, kiu devigas min akcepti la gvidon de mia interna lumo, malebligas ke ĝi estu regulo (kvankam iasence ĝi povas servi kiel lampo) por alia. Ĉiu nepre ŝuldas ekskluzivan lojalecon al tiu radio de Dia lumo, kiu brilas rekte en lian plejinternan sanktejon.

Neniel do estas mallojale al la lumo interna konfesi, ke ekstera normo estas bezona por celoj de kuna agado aŭ juĝo, aŭ akcepti pri la realeco de posedo de interna lumo provilon eksteran. Tiu, kiu lernis koni en la lumo interna la radiadon de la Dia Vorto, konfesos neniun

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

voĉon malpli altan la superega aŭtoritato ekstera; kaj akceptos neniun provon pri ĝia realeco krom tiu difinita de Kristo Mem—justeco de vivado.

La Amikoj ĉiam senhezite akceptis la Biblion kiel la komunan juĝilon pri iliaj agoj kaj instruo,* kaj de la komenco konfesis, ke nenia pretendo al Dia inspiro estus pravigebla krom per efektiva posedo de la justeco instruita vorte kaj fare de Kristo mem—justeco superanta tiun "de la skribistoj kaj Fariseoj."

Kaj ĉi tie frontas nin la fakto, ne ĉiam sufiĉe memorata, ke la vortoj "interna" kaj "ekstera," kvankam nepre necesaj, devas esti uzataj zorge. Estas tre grave, ke en la konsidero de mia temo, oni memoru la diversajn sencojn doneblajn al ili. Mi jam montris (pp. 20-22), ke la mistika signifo de "interna" aŭ "ena" ne estas por ni la sola.

* Robert Barclay, kiun generacio post generacio opiniis la ĉefkolono de teoria Kvakerismo, klare diras, ke la Skriboj estas "neĉefa regulo"—suba, tio estas, al la instruo de la Spirito, kiu inspiris ilin. Li antaŭvidas multajn el la nuntempaj konsideroj pri la nepra necerteco en interpreto kaj apliko, kiu forigas la eblon trovi ĉe ajnaj skribitaj vortoj sufiĉan gvidon por la senfina diverso de individuaj cirkonstancoj; kaj li ankaŭ plene konfesas la multajn fontojn de eraro ĉe skribaĵoj tiel antikvaj, alvenintaj al ni pere de tiom da malsamaj tekstoj kaj tradukoj. Li tamen deklaras, ke "ĉar, kiel ĉiuj komune konfesas, ili skribiĝis laŭ dikto de la Sankta Spirito, kaj ĉar, malgraŭ eraroj eble englitintaj kun la forpaso de Tempoj, ankoraŭ restas sufiĉa kaj klara Atesto al ĉiu esenca doktrino de la Kristana religio, ni kredas ilin la sola taŭga ekstera decidilo ĉe polemiko inter Kristanoj," aldonante, "ni tre volonte konsentas, ke ĉiu nia doktrino kaj moro estu juĝata per ili," kaj "ni ankaŭ volonte jesas, kiel pozitivan certan maksimon, *Ke ĉion, kion faras iu ajn pretendante al la Spirito, kontraŭan al la Skriboj, oni juĝu kaj nomu Trompo de la Diablo.* Ĉar ni neniam pretendas la gvidon de la Spirito por ŝirmo ĉe faro malbona, kaj ni same scias, ke ĝuste kiel ĉiu malbono kontraŭas la Skribojn, tiel ĝi nepre kontraŭas ankaŭ la Spiriton de kiu la Skriboj venis." (Barclay: *Apologio*, p. 86; Londono, 1736.)

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Ĉi tiu konata kvakera vorto devas ĉiam kompreniĝi kiel aserto, ne nur ke lumo estas trovebla per retiriĝo en la plej internan kameron de la propra koro, sed ankaŭ ke ĝi estas enestanta, esenca, originala; ke ĉar interne ĝi malkaŝiĝas, ĝi devas, se vera, lumi al la tuta estaĵo. Justeco, la frukto kaj rezulto de obeo al la lumo, estas tiusence kaj interna kaj ekstera. Ĝi estas ekstera, sed ne fremda. Ĝi estas ekstera en la senco ke ĝi estas videbla, palpebla, malferma al la taglumo; afero kiu kiel ajn difinita aŭ klarigita estas universale rekonebla, kaj kiu laŭ ĉies konfeso pravigas la instruon kiu ĝin produktas. Ĝi ne estas ekstera en la senco ke ĝi venas de ekstere, aŭ ke ĝi estas iagrade arbitra, aŭ okaza, aŭ dependa de la juĝo de niaj kunhomoj—ĝi estas natura, ne arta, provilo kaj rezulto de la stato interna. Nek estas ĝi ekstera en la senco ke ĝi rilatas nur al la videbla. Efektive, ĝi ja presas sian stampon eĉ sur la korpon mem, kaj kompreneble konsistas grandaparte en videbla kaj reala regado de la menso super la korpo; tamen, origine kaj esence, ĝi estas el la spirito, ne el la karno.

La konstanta kaj energia serĉado por, kaj apliko de justeco, estis tio, kio distingis la fruajn Amikojn de nuraj mistikuloj. La "Amikoj de la Lumo" ne estis kontentaj primediti lumon enfermitan en la propra koro. Ili lasis ĝin libere lumi antaŭ homoj. Ili maltime proklamis ĝian universalecon, kaj vokis al ĉiu iradi en ĝi. Ili firme pretendis, ke ĝi estas la lumo de Jesuo Kristo de Nazaret, la vera Suno de Justeco, kaj ke la lumo, spirito, kaj graco de Kristo en iliaj koroj estas unu kun la spirito en kiu la Skriboj doniĝis. Super ĉio, ili insistis, ke la lumo estas la Spirito de la vero, kaj nepre gvidos en ĉian veron; ne en ĉionsciecon aŭ senerarecon, sed en veron

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

en la koro—veron de vorto, de penso, kaj de faro. Tiel ili komprenis la grandan veron, ke la lumo interna kaj la lumo ekstera estas egale aspektoj de la Eterna Vorto de Dio—tiu Vorto kiu, restanta en ni, estas nia Eterna Vivo.

De lumo interna—ne sole la vizio de la mistikulo, sed puro, justo, sincero, simplo de koro—de tiu lumo, ili asertis, ĉiu animo havas ĝermon, kiu, laŭ sia obeiĝo, gvidos el la malbono, kiun ĝi kondamnas. Kaj la gloro de ilia instruo estas, ke al ĉiu ĝi vokis ellabori sian propran savon—kun timo kaj tremo, vere, kaj per la forto de Dio energianta en kaj kun li, sed sendepende de iu homo, aŭ de io ajn pereema, aŭ disputebla, aŭ akcidenta—penti, kaj fari fruktojn indajn je pento; esti sobrema, kiel filo de la tago.

Jen kion mi volas esprimi, parolante pri la pura spiriteco de la *celo* de la Amikoj rilate kaj la internan kaj la eksteran. La interna lumo en kiu ili deziras iradi estas lumo ne intelekta, sed puriga; ĝi konsistas ne en ravo, ekstazo, sento, sed en klara vido en la profundan veron; ĝi gvidas ne al scio, sed al sankteco—kiu efektive estas scio de la vero. Ĝi brilas en trankvilo; kaj por ĝin nutri estas bone flankenmeti la propran priokupiĝon pri la frapantaj kaj atentonvokaj kaj pasemaj aferoj eksteraj, meditante en kvieto pri tio, kio estas eterna, ke ĉio vidiĝu ĝustaproporcie. Eksteran provon ĝi invitas kaj konfesas; sed tiu provo konsistas en la kvalito de ĝiaj eksteraj rezultoj kiel sinrekomendaj al ĉies konscienco; ĝi sin montras ne per konformo al la instruo de aliaj, sed per povo aliformiga. La ekstera stampo valora por ni estas ne stampo aŭ signo aplikita aŭ administrita de ekstere, kaj per rimedoj materialaj, sed la ekstera kaj videbla radiado de flamo brulanta interne.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Ni konfesas la superecon de la lumo interna kiel la superecon de la fonto super la rivero, kaj la pureco kaj la puriga povo de la rivero estas la pruvo pri la pureco de la fonto. Kaj ŝajnas al mi, ke direktante atenton al moralaj kaj spiritaj rezultoj pli ol al precizeco de doktrino aŭ ĝusteco de ceremonia observo, la Amikoj tieldire "frapis la ĝustan najlon sur la kapo." Kiel en la tempo de George Fox, tiel ankaŭ nun, tiu alvoko rekte al la konscienco ja estas la unu nepra rimedo per kiu la homoj povas "direktiĝi al la lumo," lerni rekoni Tiun, kiu estas la Lumo, kaj instruiĝi trovi en Li sian eternan ripozon—la ripozon kiu estas la komenco de potenco kaj de venko.

Se ni prave kredas, ke la savo de Jesuo Kristo estas influo pure spirita, flamo kiu trovas en ĉiu homa koro pretan brulaĵon, kaj kiu etendiĝas de koro al koro kiel fajro de torĉo al torĉo—influo daŭrigata ne per ritoj kaj ceremonioj, kaj per "la apostola sinsekvo" de ekstera ordinacio, sed per tiu sinturno for de malvivaj faroj por servi al la vivanta Dio, kiu estas ebla por ĉiu vivanto, kaj kiun neniu povas fari por alia—se tiu kredo estas vera, tiam restas antaŭ la Amikoj granda tasko ĝin proklami, kun granda respondeco per tio, ke ili ĝin ricevis kiel heredaĵon.

Ĉar tiu kredo ankoraŭ ne ĝenerale akceptiĝis. La Kristanismo disvastiĝinta kaj florinta estas ankoraŭ saturita de fido al ritoj kaj ordinancoj eksteraj, kaj profunde implikita en rigidaj formularoj. Ĝi konsistas grandaparte el kredkonfesoj kaj doktrinoj, kiuj, ĉu teorie veraj aŭ falsaj, estas teneblaj "en maljusteco," kaj do ne povas vere savi la animojn fidantajn al ili.

La plimulto de Kristanoj diras aŭ supozas, ke ĉi tiuj

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

aferoj estas esence helpaj al ili. Mi ne arogas al mi diri, ke ili eraras, kvankam mi konfesas, ke mi kredas la diron tro laŭkutima esti konkludiga. Sed pri unu afero mi estas certa. Troviĝas granda kaj kreskanta nombro da personoj, kiuj ne povas akcepti eksterajn ritojn aŭ klerikan instruon. La Kristanismo de Jesuo Kristo mem, jen la Kristanismo, kiun la Amikoj solaj, aŭ preskaŭ solaj, firme proklamas plensufiĉa. Predikante tiun esencan Kristanismon, oni povas alvoki sentime al la atestanto en ĉiu koro; kaj mi kuraĝas diri, ke tio estas religio ne nur por virinoj kaj infanoj, sed religio kiu alvokas al la plej bonaj instinktoj de vira sendependo, kaj ilin fortikigas.

Oni ne supozu, ke mi atribuas la tuton de la moderna ribelo kontraŭ religio al la greftiĝo de ekleziaj "disvolvaĵoj" sur la simplecon kiu estas en Kristo. Mi scias, kompreneble, ke multaj aliaj fortoj tendencas fremdigi la homojn de Dio, kaj ke multo en la progreso de scienca eltrovo ne estas facile akordigebla rapide kun eĉ la esenco mem de la religio. Kaj ĝuste pro tio, ke la ŝipo de fido estas en danĝero, mi sopiras vidi ĝin libera de ŝarĝoj nenecesaj. Ĝuste tial, ke la homoj estas tiom pretaj forĵeti de si ĉian penson pri la aferoj apartenantaj al ilia paco, kaj malespere forlasi la solan esperon kiu povas purigi iliajn vivojn, mi deziregas vidi tiun esperon malimplikita for de ĉio eluzita kaj malhelpa kaj neracia.

La Kvakerismo en sia origino estis decida kaj sukcesa provo atingi tion. La gloro de la frua Kvakerismo estis ĝia rekteco, ĝia senkompromisa, senceda postulo, ke la vivo atestu al la vero, kaj ĝia firma staro kontraŭ ĉiu postulo plua. La "lumo interna" estis ne nur vorto

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

kun la plej profunda signifo poezia kaj mistika; ĝi estis doktrino de plej severa justeco, kaj samtempe aserto de firma sendependo. Tiuj, kiuj konsciis la brilon de Dia lumo en la proprajn korojn, bezonis nenian pastran absolvon aŭ intermetiĝon. Ili estis kontentaj stari aŭ fali laŭ sia senkulpeco antaŭ ĉiu. Eĉ iliaj karceristoj ofte fidis al ilia promeso iri mem al malproksima malliberejo. Estis bone konate en tiuj fruaj tagoj, ke la vorto de Amiko estas fidinda kiel leĝa kontrakto. Eĉ ĝis la nuna tempo, kaj, mi kredas, ne senbaze, kroĉiĝas al la Amikoj reputacio por aparta verdiremo kaj sobranimeco.

Mi atentigas tiel insiste pri la firma decido subteni altan moralan normon en la Societo, ne nur pro la superega esenca graveco de justeco; ne nur ĉar mi kredas, ke kiom la religio liberiĝas de la ekstera kaj ceremonia kaj pereema, ĉi tiu nedetruebla kresko de sankteco havas tiom pli da spaco por etendiĝi; sed ankaŭ ĉar oni ne povas nei, kaj devas ja neniam forgesi, ke ekzistas reala kaŭzo por la suspekto, aŭ almenaŭ la esploro, ordinare direktita al ĉiu spirita aspiro aparte alta.

Inter emocio religia, kaj emocioj el fontoj malpli puraj, estas rilato bone konata kaj terura. Ĉiam ekzistas danĝero en tio, ke provante stimuli la unu, oni riskas eksciti la alian, kaj danĝero eĉ pli granda, ke la malpli alta povas porti la veston kaj aspekton de la pli. La historio de religiaj *revivals** liveras abundan averton pri la danĝeroj, kiuj nepre akompanas ĉiun subitan ekbolon de sento, eĉ kiam multo el ĝi estas profunda kaj vera kaj daŭra.

* Movadoj de religia reviviĝo, de subita kaj vastetenda spirita vekiĝo. *Trad.*

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Sendube la fondintoj de la Societo de Amikoj havis sian porcion de tia instrua kaj iafoje humiliga sperto.* Ili estis kuraĝuloj, kiuj sciis la realecon de sia profunda sperto, kaj ne senkuraĝiĝis facile pro kelkaj ekstravagancoj (ŝajne, efektive, tre malmultaj) ĉe siaj disĉiploj. Sed oni havas kaŭzon kredi, ke ili forte sentis la gravecon speciale gardi la sobremon decan al la filoj de la tago, en tempo kiam ilia propra predikado fermentis en homaj mensoj kiel nova vino. Krom la granda kaj senŝanĝa antaŭgardo, ke ili konstante predikis justecon, apelaciante al la lumo ekstera kiel provilo pri la realeco de la lumo interna, ili, konscie aŭ ne, per du apartaj manieroj sin ŝirmis kontraŭ la danĝero de spirita, aŭ kvazaŭspirita, ekscitiĝo.

Unu ŝirmilo estis la plena konfeso, ke la agado de la Spirito de Dio sur la koro estas ne nur instiga, sed ankaŭ brida, kaj ke por ĝia ĝusta interpreto oni devas esti kvieta. "Atendu en la lumo" estis unu ĉefnoto de la konsilo de George Fox. Kiel ankaŭ nun, la Amikoj estis zorge instruitaj tiom submetiĝi al la detenoj, kiom sin cedi al la devigoj, de "plej bona saĝo." "Vivi profunde," "paŭzi ĉe la afero," procedi nur se "vojo malfermiĝas," nenial malatenti "baron en la menso," ĉi tiuj kaj multaj tiaj konataj admonoj de la Kvakeroj montras per kiom da "sankta timo" ilia fervoro kutime moderiĝis.

La "kvietismo" estas, efektive, la natura akompanaĵo de la "mistikismo" (mistikismo, tio estas, en la senco de kredo je la interna lumo). Viva sento pri apudesto de la Kreinto nepre naskas kvietecon de la kreito. Kaj nur sub la brida kaj rega povo de la respektego tiel inspirita povas la homa spirito sendanĝere konscii la

* La historio de James Naylor estas la plej konata kazo ekzempla.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

senperan apudeston de sia Dia Fonto. Ja profunde vera estas la antikva hebrea sento: "Ĉu homo vidos Dion, kaj vivos?" Religia emocio, eĉ reala, povas esti malsaneca. Ju pli profunda la kordo vibrigita, des pli terura la danĝero de ĉiu knaro, aŭ devio for de streĉo konvena kaj konstanta.

La dua ŝirmilo kontraŭ la danĝero sin cedi al ekscito, aŭ al impulso nematura aŭ nekontrolita, proviziĝis en nia tuta sistemo de "eklezia organizo" kaj kontrolo, kaj aparte en la graveco atribuita al konstato pri la "unueco de Amikoj" pri proponita religia servo antaŭ ol ĝin entrepreni. Ĉi tio estas kurioza kaj bele adaptita gardilo por la burĝonoj de libera ministrado—libera en la senco ke ĝi estas tute spontana, kaj instigita nur de impulso kiun oni kredas de supre. Tute ne estas afero nekonata, eble eĉ ne malofta (mi parolas laŭ nur malmultaj observokazoj), ke Amikoj en siaj aferaj kunvenoj malkonsilu "koncernojn" kiuj ŝajnas al ili ne pravigitaj de kialoj sufiĉe pezaj, aŭ pri kiuj ial ili nefavore juĝas.

Ne nur rekte, sed, per la alta valoro tiel kolektive kaj tradicie konsentita al singardemo ĉe trakto pri spiritaj aferoj, nerekte ankaŭ, ĉi tiuj ŝirmiloj tendencas naski sobrecon kaj paciencon. La Kvakero instinkte kaj profunde sentas, ke ĉiu vazo uzota por sankta celo devas antaŭ ĉio esti pura. Precipe ĉiu, kiu sin nomas ministro de la evangelio, devas aprobigi sin en la plena taglumo kiel ne nur predikanto, sed ankaŭ vivanto, laŭ la Spirito de la vero.

Kaj la "ministroj," oni memoru, ne estas personoj ŝirmitaj kaj apartaj; sed viroj kaj virinoj okupataj pri la ordinaraj aferoj de la vivo, laborantaj ĉe diversaj

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

metioj kaj profesioj, kaj partoprenantaj la ĉiutagajn spertojn de tiuj, al kiuj ili ministras. Ĉu ne ŝajnas aparte adaptita al la bezonoj de nia tempo ĉi tiu kombino de simpla, sana, sobra sendependo kun la plena kaj senrezerva spiriteco kaj pureco de nia konfesita celo—nome, vivo laŭ la senpera gvido de la Spirito de la vero?

Jen kie mi vidas en la idealo de la Kvakerismo la solan ĉiampravan kaj fruktan idealon de la Kristana vivo: nome, obeo al la vero laŭ la senco plej alta kaj plena, la vero vivanta—vero, tio estas, ne en la senco de ĝusta aŭ ortodoksa kredo pri Kristo, sed de efektiva partopreno en lia Spirito, la spirito de Tiu, kiu mem *estas* la vojo, la vero, kaj la vivo; lernado per tiu obeo koni lian voĉon; kaj konstanta atesto al aliaj pri la realeco kaj la povo de lia viva apudesto kaj instruo. Kaj nur unumaniere estas tiu atesto farebla; la vivo devas esti penetrita de la lumo—la lumo kiu lumas al ĉiu homo venanta en la mondon—penetrita kaj ardigita kaj purigita, ĝis ĝi brilas kaj interne kaj ekstere. La vivo estas la lumo de la homoj.

En niaj tagoj oni atakas la fidon ĉe ĉiu punkto, kaj de ĉiu direkto, kun libereco kaj furiozo nekonataj antaŭ sesdek jaroj. Ĉion skueblan oni skuas ĝis la fundamentoj mem. Persone, mi firme kredas, ke ĉi tio, kvankam danĝera, estas entute natura, necesa, kaj plejparte bonefika. Ioman tempon povas ŝajni, ke ĵetinte brulaĵon sur klaran fajron, oni ĝin estingis; sed se la flamo estas sufiĉe fortika, ĝi denove leviĝos tra la fumo kaj polvo, kaj brilos eĉ pli forte pro la venkitaĵo. Kaj tiel same, la fido al la eterne vera nepre leviĝos super ĉiu nuna konfuzo kaj mallumiĝo de saĝo, por brili kun freŝa povo en la koro kiu firme sin tenis al la vero, ĝiaj postuloj estu kiaj ajn.

K

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

La Societo de Amikoj ĉiam (kaj ja saĝe) rifuzis postuli subskribon al formularo kiel necesan aŭ eĉ subkomprenitan kondiĉon por aneco.* Ĝi senkaŝe kaj firme akceptis la Biblion kiel la solan komunan normon kaj tenejon de skribita doktrino, sed por individua gvidiĝo "en ĉian veron," kaj por la interpreto de la Skriboj, ĝi ĉiam kuraĝis fidi senrezerve al la senpera instruo de "la Spirito kiu inspiris" ilin. Ĝis nun ĝi restis fidela al sia kredo je la vivanta Gvidanto. Kaj ĉi tiu kredo, mi estas certa, estas la sola kiu satigos la bezonojn de la libera penso niatempa.

Por ke penso estu vere libera, en la senco sentima kaj senantaŭjuĝa, ĝi devas ne nur esti malfermita al la tuta amplekso de sperto, sed ankaŭ akcepti korekton laŭ centraj kaj senŝanĝaj principoj: la konstanteco estas necesa kiom la malfermeco. Mi kredas, ke tiu, kiu lernis submetiĝi al korekto kaj de ekstere kaj de interne, kiu kuraĝas fronti egale ĉiun realan fakton kaj ĉiun necesan procedon de mensa disciplino kiuj povas lin trafi, havas tre gravan rolon meze de la malserenaj vivoj kaj pensoj de la nuna tempo. Ĉar dum la homa naturo estas kia ĝi estas, ĝi nepre konscias, kiom ajn malklare, ke ĝi bezonas ne nur nutriĝi per scio, sed ankaŭ esti "potence fortigita en la interna homo."

Du aferojn, laŭ mia kredo, la homoj nuntempe

* Kiam iu petas aniĝon, la Monata Kunveno nomas Amikon aŭ Amikojn, kiuj devas viziti lin, kaj raporti al la Kunveno la rezulton de la vizito, antaŭ ol oni donas respondon. La kondiĉoj plenumendaj estas nenie precize formulitaj, sed la celo de la vizito estas eltrovi, laŭ ĝenerala maniero, ĉu la kandidato plene "konvinkiĝis pri Amikaj principoj." La esploro do estas pure persona kaj individua; kun la elasteco kiu karakterizas ĉiujn niajn aranĝojn, kaj kiun ni sentas favora al plej plena dependo je Dia gvido.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

bezonas, kaj por ricevi spiritan helpon, devas havi. Ili bezonas formon de kredo kaj adoro pli altan, pli puran, pli indan, ol la kutime provizita; kaj pruvon pri la realeco de la objektoj de kredo pli fortan, ol ordinare prezentiĝas.

Per formo de kredo pli alta, pura, inda, mi celas ne plibonigitajn formularojn aŭ liturgiojn; sed, pli ĝuste, tiun malfermecon por pliboniĝo kiun fiksita formo elbaras, kaj kiun eĉ la belo kaj digno mem de la Anglikana Liturgio tendencas malhelpi. La homoj bezonas, mi kredas, manieron de adoro, kiu estos pli simpla, pli viva kaj reala—pli vere alta kaj pura ĉar malpli intelekte ambicia, kaj ĉar pli freŝe inspirita de homa bezono kaj Dia helpo—kaj manieron de parolo pri Diaj aferoj malpli laŭkutiman, malpli teknikan kaj artan, pli videble fontantan el efektiva sperto, kaj pli fortike bazitan sur tero komuna. Ili bezonas ne rajtigitajn instruistojn, sed kompetentajn atestantojn; ne aŭskulti al predikoj kaj "Diservoj," kiom ajn admirindaj, faritaj plenume de profesia devo, en preskribitaj limoj de ortodokso, je aranĝitaj horoj kaj laŭ reguligita kvanto; sed persone kontakti kun tiuj, kiuj vidis, sentis, renkontis, kion ili parolas, kaj kiuj parolas ne ĉar ili estas oficiale difinitaj por paroli, sed ĉar la pleneco de la koro tion devigas—kiuj kuraĝas silenti kiam ili havas nenion direndan, kaj ne timas konfesi siajn dubojn, perpleksojn, aŭ nescion. La homoj iĝas kritikemaj kaj senpaciencaj pri laŭkutimaĵoj; ne nur, mi kredas, pro la disvastiĝo de edukado, sed ankaŭ ĉar ili malsatas por la realo, kaj (per la mirinda cirkulado de ĉio) trovas sin frontataj de ĉiuspecaj problemoj sufiĉe timigaj por ĉiu, kaj duoble por tiu kies fundamento estas nefirma eĉ iomete. Kiu

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

povas miri, se, vidante ĉiun specon de mizero homa kaj besta, de malvirto, krimo, perforto, kaj hereditaj degradeco kaj malsano, de ŝanĝiĝo kaj danĝero, kaj dispeciĝo de ĉiu rifuĝejo (kaj nuntempe al la mensa vido prezentiĝas ĉiu angulo de la lando, eĉ de la mondo)—ili rifuzas kontentiĝi per supraĵa aŭ laŭkutima klarigo pri la teruraj problemoj frontantaj ilin, kvazaŭ spite al ilia fido? La glatflueco, la incitega kompleteco, la nekonscia blasfemeco, de multaj "ortodoksaj" pravigoj de Providenco, sufiĉas naŭzi pri nura ortodokseco.

Ni Kristanoj estas maldelikate vekitaj de la ŝtormo, kaj komencas konscii, ke ni bezonis tian korekton kaj kribron de penso kaj lingvaĵo kian abunde liveras modernaj atakoj. Je tia momento, por ajna religia sekto estas neesprimebla privilegio esti nekatenite de kredkonfesoj kaj formularoj; havi nenion en siaj tradicioj aŭ moroj kiu malhelpas ke ĝi profitu el la korekto, aŭ ke ĝi voĉu sian ĉiaman kaj senŝanĝan ateston per lingvaĵo la plej freŝa kaj fleksebla kaj moderna disponebla. Kaj eble ankoraŭ pli granda estas la privilegio, meze de la Babelo, esti lerninte la trioble benan povon de silento; private kaj publike ĝui la okazon kaj la praktikon de silenta medito pri tio, kio estas neparolebla kaj senŝanĝa, kaj de atesto al la lumo en tiu kvieto, kiu plej klare reflektas la Dian gloron, en kiu la akuzoj de la malamiko plej efike estingiĝas.

Kaj, due, la homoj bezonas ne nur pli puran esprimon de kredo, sed ankaŭ pli fortajn pruvojn pri la realeco de ĝiaj objektoj. Kompreneble, mi ne volas diri pruvojn novajn, aŭ eĉ ke vere nova atestaĵo al eterna vero iam povas aperi, kvankam freŝaj aspektoj kaj ilustroj kaj riveloj de ĝi montriĝas ja ĉiutage. Pli ĝuste, mi volas

Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

diri, ke la batalo antaŭe farita tie kaj tie de ĉampionoj unuopaj nun flamas laŭ la tuta linio; ke en la nunaj tagoj, vole aŭ ne, ĉiu troviĝas meze de ĝi; ke neniu povas eviti aŭdi la plej profundajn verojn ĉiudirekte disputataj; kaj ke ni bezonas batalilojn, se ne pli fortikajn, almenaŭ pli facile uzeblajn kaj pli plene elprovitajn, pli honeste niajn, ol eble sufiĉis en antaŭa tempo. Mi kredas, ke pri la realeco de tio, kio sola povas satigi la plej profundajn bezonojn de la homa spirito, ni bezonas pruvon moralan kaj spiritan pli ol nur intelektan. Estas bone, ke kredo religia, kiel ĉiu alia, estu kribrita, kaj provita, kaj korektita, kaj pruvita aŭ refutita, kaj ĉiel traktita laŭ la postuloj de vero. Por tiu, kiu celas sole la veron, timinda estas nenia rezulto el serioza kaj rajta esploro pri ajna demando. Sed post ĉio, restas eterne vere, ke la homo ne povas per esploro trovi Dion; tamen sen Li kiom utilas la vivo? Por efike armi iun kontraŭ liaj malfacilaĵoj, ne sufiĉas liveri al li respondojn la plej saĝajn kaj verajn. En tago kiam ĉia aŭtoritato ĉie estas tiel malŝatata, la kredo de alia malmulte konsolas. Kaj en ĉiu tempo kaj cirkonstanco, io pli ol la teorio estas bezona por la venko.

Ĉar kio, efektive, estas tiu "fido," kiun super ĉiuj aferoj tiu, kiu posedas eĉ grajnon da ĝi nepre deziras proponi al aliaj? "Tiu ĉi estas la venko venkinta la mondon, nia fido." Ĝi estas ne nura kredo, sed povo; kaj povo montriĝas nur en ago, nur venkante reziston. Povo kiu levos super tentojn, super zorgojn, super egoismon; povo kiu faros ĉion nova, kaj submetos ĉion al si; povo per kiu perdo aliformiĝos en gajnon, aflikto en ĝojon, la morto mem en la pordon al eterna vivo: ĉu tio ne estas la vera signifo de fido?

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Mi vidas nenian rimedon disvastigi tian fidon krom ĝin uzi; kaj mem, kiam vojo malfermiĝas, agi juste, atingi promesojn, el malforteco refortiĝi, fariĝi potenca en militado—jes, kaj rericevi siajn mortintojn per revivigo. Jen la pruvoj kiuj konvinkos la mondon "rilate pekon kaj justecon kaj juĝon"; tiuj, ne rezonadoj, estas la pruvoj pri Dia Fonto de vivo kaj povo, kiujn la Amikoj instruiĝis kredi ĉefgravaj. Formularoj eluziĝos, eĉ la siatempe plej perfektaj, kaj la plej respektegindaj laŭ origino. La signifo de vortoj aliiĝas, kaj la ŝanĝiĝantaj lumoj de scio distordas ĉiun formon kiu ne ŝanĝiĝas kun ili; sed la povo de vivo senfina neniam ĉesas influi homajn korojn; kaj la bezono por la helpo de la nubego de atestantoj ĉirkaŭ ni estis neniam pli urĝa ol nun.

De ĉiu flanko venas la krio, voĉita aŭ ne; "Donu al ni el via oleo." Sed ni, kiuj ne estas sen provizo, estas severe instruataj respondi, "Iru prefere al la vendistoj, kaj aĉetu por vi mem."

"Al la vendistoj." La "akvo de vivo" estas por ĉiu soifanto; la "vino kaj lakto" proponiĝas sen mono kaj sen prezo. Sed la oleon, la liveron de lumo por aliaj vivoj, ĉi tion oni devas aĉeti. Ne pere, ne sidante en komforto kaj absorbante la pensojn de aliaj, oni povas fariĝi lampo por elmontri la vojon de la vivo. Unue la propra koro devas baptiĝi en fajro, kaj la scio aĉetiĝi je la kosto de sufero. Nur scio tiel kare aĉetita ebligas levi standardon ĉirkaŭ kiu aliaj kolektiĝos por batali la bonan batalon de la fido.

La aparta barakto de la nuna epoko estas barakto por vero. Kaj ni, kiuj maltimis nin nomi infanoj de la lumo, ĉu ni ne kuraĝe kunplektu la manojn kun ĉiu, kiu

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

baraktas lumen? Ĉu ni ne estu volontaj kaj pretaj formeti ĉion pezan—ne nur ĉiun malhelpan posedaĵon aŭ kutimon, sed ĉiun vanan provon ligi la veron de Dio per homaj formularoj kaj difinoj—kaj senrezerve fidu la vivan instruon de la Spirito por ni mem kaj por aliaj, "serĉantaj Dion *en sankteco*, por ke ni vidu lian povon kaj gloron"?

La sankteco—tio estas, obeo—jen nepre la sola rimedo per kiu konstrui, kvazaŭ sur roko, kredon daŭrontan. Starante firme sur tiu roko, kaj sole tiu, oni povas esperi ricevi kelkajn ekvidojn en la Diajn misterojn. "Nubo kaj mallumo estas ĉirkaŭ li," sed "vero kaj justeco estas la fundamento de lia trono." Ja ne decas provi klarigi ĉiun interrilaton de Dio kun la homoj, ankoraŭ malpli la misterojn de lia Esto kaj Naturo. Ja vane ni entreprenus klarigi al aliaj tion, kio ĉiam restos mistero por eĉ liaj plej fidelaj infanoj. Tamen, ni neniam hezitu atesti pri tio, en kion tra ĉi tiu timiga nubo ni de tempo al tempo permesiĝis ricevi ekvideton. Neniam ni ĉesu laŭeble instigi niajn kunulojn, ke ili ankaŭ levu la okulojn ĉielen, kaj (kvankam la vizio povas malfrui) atendu ĝin kun neŝancelebla pacienco. Povas esti, ke ili nomos nin revantoj, kaj ke ni opinios ilin blindaj. Kiam ni parolas pri la steloj, ili eble diros, ke ni vane fantazias pri nura pentrita plafano. Sed ankoraŭ ne venis la fino. Nenia tegmento homfarita restos eterne. Plimalpli frue, ĉio tera nepre pereos kaj dispeciĝos. Tiam la infanoj de la tago "levos siajn kapojn," sciante ke ilia "elaĉeto proksimiĝas."

Ĉar la vera ankrejo de la animo kuŝas ekster parolo kaj pruvo, kaj ĉiu firme enradikiĝinta vivo liveras al ĝi ateston, kies vortigo estas nek necesa nek ebla. Pli

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

profunda ol ĉiu bezono al nura konvinko estas la bezono al ripozo kaj firmeco. Por libereco necesas trankvileco. En kvieto kaj konfido estas forto. Dum la koro skuiĝas kaj agitiĝas de ĉiu ondo de afliktoplena mondo, dum la ombroj de pasantaĵoj havas povon distri kaj konfuzi la vidon, oni ne povas klare ekkoni tiun veron, kiu sola liberigas.

Vere "restas sabata ripozo por la popolo de Dio"; kontentiga, animonresaniga pleno da ripozo, kiun kelkaj el ni jam gustumis. Kelkaj el ni scias kun certeco, ke la restejo de niaj animoj estas nenio pereema. Kelkaj scias, kio estas esti volonte venigite en ordon kiu fluas percepteble kaj ĉiame el la senŝanĝa volo de Dio, en kiu sola la nia povas akordiĝi kaj firmiĝi. Kelkaj estas lernantaj ĉiam pli kaj pli plene akcepti la volon de la Patro tial, ke ĝi *estas* la volo de la Patro, kaj tagon post tago eniri pli kaj pli vere en la filan spiriton. Sperti proprakore la akordigan, purigan, energiigan povon de la Dia volo, estas trankviliĝi pri si mem kaj pri aliaj; ne liberiĝi de sufero, aŭ ĝin ignori, sed malgraŭ ĝi resti serena—scii, ke malsupre de ĉiu kreitaĵa agitiĝo estas la brakoj eternaj; ricevi forton konsenti ĉion ordonitan de tiu patra volo, kaj rezisti ĉion, kio ĝin kontraŭas.

Tiel prenante sur nin la krucon, ni komencas vidi iom de ĝia gloro, sperti iom de ĝia liberiga povo. Pasinte mem de morto al vivo, kondukite tra "diversaj specoj de morto" en vivon ĉiam pli plenan kaj abundan, ni tiam ja povas atesti la savan povon de Kristo; tiam ni priparolas kion ni scias kaj niaj manoj palpis, koncerne la Vorton de la vivo; tiam ni estas sur propra tero.

Ni ĉiam kredis, ke (per ilia obeo al ĝi, eĉ en nescio pri ĝia Fonto) la lumo de Kristo, la elbrilo de la gloro de la

Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

Patro, purigas la korojn de multaj, kiuj ne voĉas lian nomon—kiuj ĝis nun ne povas rekoni la gloran vizaĝon el kiu la lumo brilas. Sed la pleno de la "lumo neatingebla" estas ja aparte por tiuj, kiuj staras antaŭ la trono de Dio kaj la Ŝafido, kaj kun plenintenca koro adorkliniĝas antaŭ la Sidanto sur ĝi.

Ni pretendas esti popolo trovinta ripozon en Dio, popolo kiu konstruas sian domon sur roko, per obeo al la "vortoj de eterna vivo" donitaj de Kristo, la Vorto. Ni rekonas lian voĉon ne nur en la paĝoj de la Skribo, sed ankaŭ en la tuta vivirado ordigita de li, kaj ankoraŭ pli proksime en la plej interna kamero de la koro; kaj ni deziras cedi al ĝi nedividitan lojalecon.

Nia misio, kiel branĉoj de la vivanta Vinberujo, estas lasi la energiadon de tiu Voĉo, Lumo, Spirito, kaj Graco de Kristo elmontriĝi en niaj vivoj; kaj, kiom la povo doniĝas, atesti al ĝi per vortoj ankaŭ; baptantaj kaj baptiĝantaj en tiun Nomon, en kiu sola estas savo.

Posedante, do, fortikaĵon tiel neatakeblan, fundamenton tiel profundan kaj firman, ni neniam ĉesu rigardi supren, por ke ni eble "vidu la ĉielon malfermitan"; ke ni ricevu en la koron, kaj per la vivo rebriligu kun ĉiam kreskanta pleneco, la radiojn de la Suno de Justeco. Fojon post fojo naĝantaj nuboj povas kaŝi la vizion, nia vido povas manki aŭ ŝanceliĝi; sed senŝanĝa estas la gloro mem, kaj nur per reflekto de tiu gloro povas la homa vizaĝo aspekti al la ĉirkaŭstarantoj "kvazaŭ vizaĝo de anĝelo"—de Dia sendito kun bona sciigo.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from
NEW YORK PUBLIC LIBRARY

ALDONOJ

Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from
NEW YORK PUBLIC LIBRARY

Generated on 2019-12-29 00:52 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from
NEW YORK PUBLIC LIBRARY

ALDONO A

ANTAŬPAROLO AL LA DUA ELDONO

El la komentoj faritaj pri ĉi tiu libro, nur unu mi volas respondi. Kelkaj legantoj bedaŭras, ke troviĝas nenia aludo al iuj fundamentaj Kristanaj doktrinoj, kaj mi timas, ke pli-malpli ili miskomprenis mian silenton tiu-direkte.

Estas vere, ke mi kontentigis min per provo klarigi kio en la praktiko estas la forto de nia speciala situacio kompare kun tiu de niaj kundisĉiploj—klarigi en kio konsistas la fortikaĵoj de tiu aparta atesto, kiun ni deziras subteni en ĝia pureco.

Por tiu celo, ne ŝajnis al mi necese plene detali nian Kristanan kredon—tiun kredon "jam per unu fojo transdonitan al la sanktuloj," kiun ni posedas komune kun la tuta Kristanaro. La Amikoj neniam konfesis apartan teologian aŭ historian kredon; kaj mi ne supozis, ke la severa limigo de mia temo al aferoj de praktiko kaj de spirita sperto povas naski dubojn pri la amplekso kaj pleneco de nia unueco kun aliaj Kristanoj pri la komuna radiko kaj fonto de nia tuta fido kaj espero.

Tamen, sendube en nia teologio, kiel ankaŭ en nia

Generated on 2019-12-29 00:53 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

praktiko, ekzistas io aparta, ĉar la du aferoj ne estas tute apartigeblaj. Kiom mi scias, la ĉefaj punktoj doktrinaj pri kiuj la fruaj Amikoj kutime sin trovis en kontraŭeco al la reganta penso de sia tempo kuŝis en ilia sentime proklamita kredo je "la universaleco de la sava lumo de Kristo," kaj je la ebleco eĉ en la nuna vivo liberiĝi de peko—"stari perfekta en sia nuna rango." Ili kutimis ne nur konsenti, sed insisti, ke la pajenoj, kiuj ne havas eksteran konon pri Kristo, saviĝas per lia povo, lumo, kaj graco sen ĝi, se nur ili estas fidelaj al la lumo kiun ili havas*—"volonte kaj obee" submetiĝas al la Diaj traktoj etenditaj iamezure al ĉiu homo. Kaj samtempe ili indigne forĵetis kiel "pledon por malperfekteco" la ordinaran ideon, ke eĉ la plej plena akcepto al la evangelio en sia pureco ne povas plene liberigi de peko en ĉi tiu vivo. Rilate homojn ĉiuspecajn ili maltime parolis kun senhezita konfido al la justeco kaj la kompatemo de Dio, kiu ĉiun rekompencos laŭ siaj faroj.†

Mi ne diras, ke ĉiu, kiu nun portas la nomon "Amiko," estas ankoraŭ fidela al ĉi tiu atesto. La polemikaj demandoj plej ofte kaj akre diskutataj en la nuna tempo ne estas tiuj, pri kiuj antaŭ ducent jaroj la Amikoj plej forte batalis. Apenaŭ mi scias, ĉu ekster la Societo la aluditaj doktrinoj estus "ortodoksaj" aŭ ne. Sed mi estas certa, ke dum homaj koroj sin interesas pri la eterna bono de siaj fratoj, tiu religio ŝajnos la plej Dia, kiu havas en si malplej de la nure arbitra—kiu malplej fidas por spirita savo al ekstera scio partoprenita nur de la malmultaj; kaj ke tiu kompreno pri Dio justeco ĉiam sentiĝos la malplej malinda, kiu plej firme rifuzas

* Vidu "Nenia kruco, nenia krono," de Wm. Penn—*passim.*
† Vidu la "Apologion" de Barclay (Prop. v, vi, kaj viii).

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:53 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

kredi je la ebleco, ke Dio de ĉiu postulu tion, kion li ne metis en la povon de ĉiu.

Efektive, ambaŭ kredoj aluditaj ŝajnas flui nature el profunda persona sperto de Dia lumo kiel konstanta kaj ĉionpenetra influo, meze de kiu ni vivas kaj moviĝas kaj estas. Rivelo kiu atingas la fundon de eĉ unu homa koro nepre tuŝas ankaŭ la plej vastan amplekson de homaj bezonoj. La lumo de la Suno mem de justeco ne povas esti alia ol centra kaj ĉiontrafa. Povas okazi, kaj efektive okazas, ke la homoj fermas la okulojn al ĝi, kiel al la ekstera taglumo; aŭ obeante ĝin ili povas ne konscii ĝian naturon kaj fonton; sed ne estas eble konfesi ke ĝi estas dia, kaj tamen supozi ĝin malpli universala ol la ekstera sunbrilo donacita de la Patro de ĉio al la justaj kaj la maljustaj.

Tamen, distinga elemento troviĝas malpli en la enhavo de nia teologio, ol en nia sinteno al teologio; kaj tiu karakteriza sinteno de la kvakera menso, kaj mia propra partopreno en ĝi, estas tio, kion mi aparte deziras komprenigi.

Oni scias, ke kvankam la Amikoj ĉiam pro principo ne uzis kredkonfesojn kaj formularojn, aŭ kiel partojn de adoro aŭ kiel kondiĉon de aneco, ili neniam hezitis defendi sian kredon, aŭ en ĝia aparta aŭ en ĝia ĝenerale Kristana aspekto. La tasko ja tiel abunde plenumiĝis kaj de individuaj Amikoj kaj de la Jaraj Kunvenoj en iliaj kolektivaj eldiroj,* ke estus duoble malsaĝe ke mi

* La libro kiun mi jam diversfoje aludis per sia nuna titolo *La Libro de Disciplino* (antaŭe nomita *La Libro de Elĉerpaĵoj*) estas la lasta el serio de similaj volumoj de elĉerpaĵoj el la procedoj de Londona Jara Kunveno, eldonitaj kaj reviziitaj de tempo al tempo kun ĝia sankcio. Al tiuj volumoj mi sendas tiun, kiu deziras vidi la plej plenan klarigon de la teologia instruo de la Societo. La sinsekvaj

Generated on 2019-12-29 00:53 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

provu taskon por kiu mi ne estas kvalifikita. Mi sentas min en plena akordo kun tiu singardo ĉe parolo pri Diaj aferoj, kiu estas tiel profunde enkreskinta karakterizaĵo de la Kvakera menso. La praktiko de silento kiel esenca prepariĝo por edifia proksimiĝo al la interna sanktejo sendube tre influas ĉiun nian kutimon de penso kaj parolo. Ni ne multe provas enbari niajn kredojn en precizaj vortkonturoj. Kun saĝa simpleco, kiun mi deziras partopreni, Amikoj estas dirintaj,* ke ĉe parolo pri la energiado de Elaĉeta Amo "ni preferas la uzon de la terminoj de la Skribo; kaj kontentaj pri tiu scio, kiun la Dia saĝo bontrovis riveli, ni ne provas klarigi tiujn misterojn, kiuj restas malantaŭ la kurteno." Ni ĉiam pli fidis al la influo de la Dia Spirito, ol al formo de vortoj, por gvido en ĉian veron.

Profunda fido je la ĉionpenetra povo de Dia Lumo ankaŭ nature tendencas iagrade bremsi tiun senpaciencon "instrui ĉiu sian najbaron," kiu estas komprenebla ĉe tiu, kiu opinias, ke homa instruo estas la sola ilo per kiu scio kiun oni supozas necesa por savo estas disvastigebla. La tuja rezulto de la ricevo de lumo en la propran koron ja estas la impulso ĝin komuniki, atestante al ĝi; ekbruligi (kiom koro povas en koro) respondan flamon en

eldonoj portas la jenajn datojn: 1783, 1802, 1834 (aldono en 1849), 1861, 1883, 1906-11. Ĉe ĉiu revizio ia ŝanĝo fariĝis en la elekto de la tekstoj cititaj; kaj mi supozas, ke la proporcia aliiĝo de la spaco donita en ili al diversaj aspektoj de la vero reflektas pli-malpli ĝuste la ŝanĝiĝojn grade okazintajn en la reganta penso en la Societo. Mi tute ne povas provi eĉ konturon de tiuj ŝanĝiĝoj, kaj efektive, kvankam ilia studo estus interesa por la scivola pri tio, mi ne sentas, ke ĝi iomete helpus al mi klarigi la idealon al kiu aparte la Amikoj celas.

* "Resumo de la Historio, Doktrino, kaj Disciplino de Amikoj,' eldonita kun la aŭtoritato de la Kunveno por Suferoj, en aŭ ĉirkaŭ 1790.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:53 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

aliaj; kaj tiel, kvazaŭ per signalfajroj, diskonigi de alto al alto la bonan sciigon pri savo. Sed ĉi tiu ekbruligado ne ĉiam, aŭ eĉ plejparte, fariĝas per vortoj. Fojon post fojo vortoj mankas meze de la "bona batalo." La intenseco mem de la fajro de fido tendencas, mi kredas, fandi doktrinon en petegon, kaj vortojn en influon. Zorgo pri la preciza vortado de vero emas konsumiĝi de fervora deziro, ke ĝi estu obeata.

Eble ne estas mirinde, ke multe kaj ofte miskomprenigis nia kutima sindeteno de provo difini la nedifineblan, kaj formuli por transdono al aliaj tiujn misterojn antaŭ kiuj la plej profunda homa saĝo plej forte sentas la propran nesufiĉecon. Ĝi naskis multajn dubojn pri nia ortodokseco kiel aro, kaj kune kun nia forlaso de eksteraj ordinancoj, ĝi igis kelkajn dubi eĉ nian Kristanecon.

Jen kie la misinterpreto de nia silento nature doloras nin. Dubo pri aliula "ortodokseco" tiom libere interŝanĝiĝis ĉiudirekten inter Kristanoj, ke ĝi perdis multon el sia forto. Sed neniu vera Kristano kontente akceptus, ke oni pridubu lian lojalecon al Kristo. Kaj ĉar silento kompreneble povas rezulti el plej diversaj kaŭzoj—el nekredo kaj indiferento, kiom el sankta respekto kaj adoro—mi deziras, pro mi mem, kiom ankaŭ pro tiuj kun kiuj mi havas religian kunulecon, diri plej forte, ke la libero for de formoj kaj formularoj kiun ni postulas—kaj proklamas—ne estas libero pensi la proprajn pensojn, kaj iri la propran vojon. Ĝi estas, kontraŭe, la libero per kiu Kristo mem nin liberigis—la libero de tiu, kiu havante la substancon, scias ke li ne plu bezonas la figuron—la libero de tiu, kiu levas sian krucon kaj sekvas Tiun, kiu mortis por li.

Nia sento kontraŭ formoj ne estas, ke ili tro postulas,

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:53 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

sed pli ĝuste, ke ili tro limigas—ke ili malhelpas kaj bridas la vivan funkciadon de la spirito necesan por vera adoro kaj interna kresko. La Kvakerismo, kiom mi komprenas ĝin, grandaparte estas protesto kontraŭ la provo redukti la spiritan vivon ĝis teknika procedo—ĝis afero de reguloj kaj difinoj konfide aplikotaj kaj transdonotaj de homaj peruloj, aparta de la kresko de la Dia semo en la koro. Ni sentas, ke tiu kresko estas plejparte preter la homa kono—kaŝita nasko, kiu venas el fonto nesondebla por la homa menso.

Kaj se tio estas vera pri tiu parto de "la mistero de pieco" kiu rilatas al la propra vivo kaj sperto—se rilate eĉ tion, kio okazas en la propra koro, oni sentas sanktan timon sin intermeti per intelekta esploro aŭ volpeno en la misterajn procedojn de vivo kaj kresko—kiom pli oni timu glate paroli, aŭ eĉ pensi, pri la naturo de la Fonto mem, el kiu venas nia eterna vivo; pri la sankta kaj mistera maniero laŭ kiu sola, per devigoj ĉiam neesploreblaj por ni, tiu Fonto malfermiĝas?

Scii proprasperte, ke eterna vivo ja libere malfermiĝis por ni—ke ni povas elaĉetiĝi kaj saniĝi kaj fariĝi unu en Kristo, kiel li estas unu kun la Patro; scii, ke pro ni la Filo de Dio demetis la vivon, fariĝante obeema ĝis morto, kaj tio la morto per kruco, ke ni, kredante, havu vivon en lia nomo; scii proprakore kio estas veni sub la humiligan, elaĉetan, purigan povon de la kruco de Kristo; tio pli ol sufiĉas plenigi la lipojn per laŭdo, kaj la korojn per danko, kaj liberigi nin por ĉiam de la deziro por klarigoj pri la nedirebla. Kiel per morto malfermiĝas la vivo, tiel—ĉu malrapide aŭ subite, tamen nepre, kvazaŭ ĉiela mateniĝo—videbliĝas la "Dia Radiado," la "helo de la gloro de la Patro," kaj ni rekonas ĝin, kia ĝi estas—

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:53 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

"la lumo de la scio de la gloro de Dio en la vizaĝo de Jesuo Kristo." Kial la rivelo devas esti per morto—kial ni elaĉetiĝas nur per lia submetiĝo pro ni elporti la honton, eltrinki la plej maldolĉan kalikon iam gustumitan sur la tero, suferi la ekstreman punon de peko kiun li neniam faris—tion ni ja povas parte senti, sed nenia lango povas esprimi.

Se, do, ni ne ĉiam glate priparolas, aŭ precize difinas, nian kredon pri la naturo kaj laboro de nia Sinjoro Jesuo Kristo, tio ne estas pro manko de absoluta kaj adora fido al li kiel la Ŝafido de Dio, kiu forportas la pekon de la mondo; sed ĉar la mistero estas pli granda, kaj la fido pli profunda—pli plena, larĝa, forta—ol vortoj povas esprimi; ĉar ni ne kuraĝas limigi aŭ difini per terminoj de la intelekto tion, komprenebla nur por la koro infaneca; ĉar dum ni "rigardas tiun, kiun ni pikis," sed kiu tamen amis nin per amo eterna, kaj sin donis pro ni, ke la amo de la Patro al ni pekuloj vive riveliĝu al ni—dum ni lin rigardas, la sola ebla por ni lingvaĵo estas tiu de pento, de laŭdo, de amo, kaj de adoro.

C. E. S.

Mount Pleasant, West Malvern.
1890.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:53 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

ALDONO B

ANTAŬPAROLO AL LA KVARA ELDONO

Nun pasis tridek kvin jaroj de kiam mi trovis en la religiaj kunvenoj de Amikoj kion mi povas nomi la indiĝenan elementon de mia interna vivo; kaj kvankam mi estas profunde danka pro ĉio, kion aneco en la Societo signifis por mi, mi tamen dum tiuj jaroj pli kaj pli dubis ĉu la senduba disvastiĝo de kion ni kutimas nomi "la principoj de Amikoj" verŝajne rezultigos grandan kreskon de nia anaro; kaj eĉ ĉu tia rezulto estas tre dezirinda. Tiom longe, kiom niaj religiaj kunvenoj daŭre okazas, kaj niaj principoj ĉiam pli vaste akceptiĝas, ŝajnas al mi, ke ne ekzistas kaŭzo por maltrankviliĝo pri ekstera aŭ formala aneco, kaj ke ni eĉ povas ĝoji pri la malpliiĝo de nia izoleco.

Nia fundamenta principo de obeo al la lumo de Kristo en la koro ja ne estas la distingilo de sekto. La kresko de tiu obeo, mi kredas, mem tendencas al la malapero de formoj kaj limoj homfaritaj. Nia kadro, bela kaj elasta kiel ĝi estas, certe apartenas al la ekstera kaj pereema. La bazo mem de nia idealo estas subigi, kaj se necese oferi, ĉion eksteran kaj pereeman al la interna kaj centra kaj superega.

Generated on 2019-12-29 00:53 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

Sed ekstera kaj pereema estas ne nur la kadro de organizo. La penso ankaŭ havas formojn, kiuj nepre ŝanĝiĝas kaj pereas, dum la vivanta semo de fido kreskas kaj disvolviĝas. Jen kial nia libereco de kredkonfesoj kaj preskribitaj formoj de adoro estas heredaĵo tiel altvalora. Oni ne povas nei, ke kreskanta scio pri la faktoj malkaŝis nesuspektitan gradon de necerteco pri ĉiu skriba raporto, kaj eĉ pri la vortoj atribuitaj al nia Majstro mem. Ja sankta kaj majesta estas la penso, ke dum la ekstera instruo de nia Majstro iĝas ĉiam malpli precize difinita, liaj disĉiploj pli kaj pli dependas de scio ke li estas la Lumo—la vorto de Dio—la helo de la gloro de la Patro—la "Dia Radiado" brilanta en la koron. kaj penetranta en la vivon. Tamen ĉu tiu interna fido ne estas la tagstelo mem leviĝanta en la koro?

Esti preta fordoni la eksteran por la interna, la supraĵan por la centra kaj profunda, la vidatan kaj la tempan por la nevidata kaj eterna—jen la leĝo mem de spirita vivo kaj kresko. Senŝanceliĝe ni ĝin obeu; kaj tiam, eĉ se nia Societo disiĝos kaj forpasos, se niaj moroj kaj tradicioj ŝanĝiĝos, kaj eĉ nia penso mem aliiĝos kaj korektiĝos per la povo de vero, tamen la Lumo brilos pli kaj pli—la Lumo kiu brilas en la plej interna kaj centra regiono de nia kaj de ĉia esto—la Lumo de la Spirito—"la lumo de la scio de la gloro de Dio en la vizaĝo de Jesuo Kristo"—la gloro de la Kruco. Jen la Centra Lumo de Vivo.

C. E. S.

The Porch, Cambridge.
1907.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:53 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google

ALDONO C

La jenajn Konsilojn oni legas unufoje en la jaro je la fino de Unua-Taga matena Kunveno, kaj en Kvaronjaraj kaj Monataj Kunvenoj laŭ bontrovo.

ĜENERALAJ KONSILOJ

AL NIAJ ANOJ, KAJ AL ĈIU KUNVENANTA KUN NI POR KOMUNA DIADORO

ATENTU, karaj Amikoj, ni petas vin, al la energiado de la Sankta Spirito, kiu, per sincera pento, kaj viva fido al la Filo de Dio, gvidas al repaciĝo kun nia Ĉiela Patro, kaj al la glora espero de eterna vivo, aĉetita por ni per la unu ofero de nia Sinjoro kaj Savanto, Jesuo Kristo.

Estu zorgemaj en religia kunveno, respektege vin prezenti antaŭ la Sinjoron; kaj serĉu, helpite de la Sankta Spirito, adori Dion per Jesuo Kristo.

Alte ŝatu la privilegion de aliro per li al la Patro. En preĝado persistu, viglante en ĝi kun danko.

Ofte vin turnu al la Sinjoro en privata sinretiro, honeste

Generated on 2019-12-29 00:53 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

ekzamenante vin pri via kresko en graco, kaj via pretiĝo por la vivo venonta.

Estu diligentaj legi private el la Sanktaj Skriboj; kaj zorgu, ke ĉiutage ili pie legiĝu en viaj familioj.

Atentu, ke vi faru profitan kaj religian uzon el la horoj en la unua tago de la semajno ne okupitaj de niaj Religiaj Kunvenoj.

Vivu en amo kiel Kristanaj fratoj, pretaj helpi unu la alian, kaj kunsente unu kun alia pri la provoj kaj suferoj de la vivo. Gardu unu la alian por bono, elmontrante ardan deziron, ke ĉiu posedu bone bazitan esperon en Kristo.

Serĉu pacon kun ĉiu, dezirante ĉies veran feliĉon. Vivu ne por vi mem, sed por aliaj, penante forigi pezajn ŝarĝojn, kaj liberigi prematojn; memorante, ke al vi estas devo kaj privilegio labori por la fizika, morala, kaj spirita bonstato de viaj kunhomoj.

Dum vi okupiĝas pri la aferoj de la nuna vivo, kun sentema konscienco, laŭ la instruoj de la Evangelio, atentu la limigojn de la Spirito de la Vero.

Lumu via lumo per vivo de honesta laboro kaj pacienca amo. Faru vian eblon subteni vin kaj viajn familiojn en honorinda sendependo; kaj, per prudenta zorgo dum vi sanas, provizi kontraŭ malsano kaj maljuneco.

Konservu severan honestecon en viaj negocoj, kaj en ĉiu ekstera koncerno via. Gardu vin kontraŭ la spirito de spekulado, kaj la kaptilo de amasiĝanta riĉaĵo. Memoru, ke oni estas responda tiom pri la maniero akiri posedaĵojn, kiom pri ilia uzo kaj fina dispono.

Observu simplecon kaj moderecon pri via konduto kaj vestaĵo, la meblado de viaj domoj, kaj la stilo kaj maniero de via vivado.

Generated on 2019-12-29 00:53 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google
Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

Zorge konservu en via propra konduto, kaj kuraĝigu en viaj familioj, veremon kaj sincerecon; kaj evitu mondecon en ĉiu formo.

Vigle gardu vin kontraŭ la enlaso en viajn domojn al eldonaĵoj de malutila tendenco; kaj kontraŭ ĉia kunulo, indulgo, kaj amuzo, aŭ por vi mem aŭ por viaj infanoj, kiu povas iel malhelpi kreskon en graco.

Evitu kaj malkonsilu ĉiun specon de vetado kaj vetludo, kaj ĉiun komercan spekulon de veta karaktero.

Pripensinte la multajn malbonojn kiujn naskas la uzo de ebriigaj trinkaĵoj, preĝeme vin demandu, ĉu via devo al Dio kaj al via najbaro ne postulas, ke vi nek mem uzu ilin, nek proponu ilin al aliaj, nek iel ajn partoprenu ilian fabrikon aŭ vendon.

Proponante al vi edziĝon, precipe tion atentu, kio helpos vin sur la vojaĝo ĉielen. File respektu la konsilon de viaj gepatroj. Memoru la grandan gravon, ĉe tia unuiĝo, de samopinieco pri religiaj principoj kaj praktiko. Petu konsilon de Dio, dezirante, super ĉiu bono monda, ke via unuiĝo ricevu aprobon kaj benon de li.

Viglu kun Kristana amemo super la disvolviĝantaj mensoj de viaj infanoj; hardu ilin al kutimoj de sinrego kaj fila obeo; zorge instruu ilin en scio de la Sanktaj Skriboj; kaj serĉu la kapablon inspiri iliajn korojn per amo al ilia Ĉiela Patro, ilia Elaĉetinto, kaj ilia Sanktiganto.

Fine, karaj Amikoj, via konduto kaj vivado estu indaj je la evangelio. Penu havi konsciencon ĉiam neriproĉeblan antaŭ Dio kaj homoj. Estu konstantaj kaj fidelaj en lojaleco kaj servo al via Sinjoro; restadu en lia amo; penante konservi la unuecon de la Spirito en la ligilo de paco.

Digitized by Google
Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY
Generated on 2019-12-29 00:53 GMT / http://hdl.handle.net/2027/nyp.33433089904779
Public Domain in the United States, Google-digitized / http://www.hathitrust.org/access_use#pd-us-google